

Rudyard Kipling



La Libro
de la
Gangalo.

Verko el la publika fako.

https://fr.wikisource.org/Le_Livre_de_la_jungle

Enhava tabelo.

La Fratoj de Moŭglio.....	3
La ĉasado de Kao.....	28
"Tigron, tigron !".....	59
La Blanka Foko.....	82
Rikki - Tikki - Tavi.....	105
Toomaj de la Elefantoj.....	125
Servo de la Reĝino.....	149

La Fratoj de Moŭglio.

Ŝil Vulturo gvidas la paŝojn de la nokto
Kiun Mang la Vampiro liberigas.
Dormas la brutaroj en la ĉirkaŭbarita brutejo.
La Tero al ni, la ombron liveras Ĝin !
Estas vespera tempo, fiero kaj potenco
Al la ungego, la dentego kaj la ungo.
Ĉu vi aŭdas nin ? Bonan ĉasadon al ĉiuj
Kiuj observas la Leĝon de la Ĝangalo !

Nokta kanto en la Ĝangalo.

Estis la sepa de tre varma vespero, sur la montetoj de **Seonio**, kiam patro lupo vekigis el sia ĉiutaga dormeto, gratis sin, oscedis kaj malstreĉis al si la kruojn, unu post la alia, por disflugigi la senton de mallaboreco kiun li ankoraŭ sentis ĉe iliaj finoj. patrino lupino estis kuŝinta, ŝia dika griza nazo falinta inter ŝiaj kvar etuloj kiuj ludis kaj kriis, kaj la luno brilis tra la aperturo de la kaverno kie ili ĉiuj loĝis.

- Oogrh ! diras patro lupo, estas tempo por rekomenci ĉasi.

Kaj li estis ekĵetiĝonta al la fundo de la valo, kiam ombreto kun densa vosto baris la aperturon kaj bojetis :

- Bonŝancon, ho estro de la lupoj ! Bonŝancon kaj fortajn blankajn dentojn al la noblaj infanoj. Ili povu neniam forgesi en ĉi tiu mondo tiujn kiuj malsatas !

Li estis la ŝakalo - Tabaki la Skrapilo - kaj la lupoj de Barato malestimas Tabaki^{on} ĉar li vagas ĉie farante tumultojn, disvastigante klaĉojn kaj mangante ĉifonojn kaj pecojn de ledo en la rubamasoj ĉe la pordoj de la vilaĝoj. Sed ili ankaŭ timas lin, ĉar Tabaki, pli ol iu ajn alia en la ĝangalo, inklinas iĝi kolera, kaj tiam li forgesas ke li neniam timis iun, kaj li kuras tra la arbarego, mordante ĉion ajn kiun

li trovas sur sia vojo. Eĉ la tigro forkuras kaj kaŝiĝas kiam la malgranda Tabaki koleriĝas, ĉar furiozo estas la plej hontinda afero kiu povas trafi sovaĝan beston. Ni nomas ĝin akvofobion, sed ili nomas ĝin "dewanee⁽¹⁾" - frenezecon - kaj ili forkuras.

- Eniru do kaj serĉu, abrupte diras patro lupu; sed estas nenio por manĝi ĉi tie.

- Por iu lupu, ne, certe, diras Tabaki; sed por tiel maldika persono kiel mi, seka osto estas festeno. Kio ni do estas, ni "Gidur log⁽²⁾" (la ŝakala popolo), por laŭspecigi kaj elekti ?

Li oblikvis al la fundo de la kaverno, tie trovis oston de kapreolo sur kiu restis iom da viando, sidiĝis kaj ĝoje krakigis el ĝi la finon.

- Dankon pro ĉi tiu bona manĝo ! li diras, lekante al si la lipojn. Kiel ili estas belaj, la noblaj infanoj ! Kiaj grandaj okuloj ! Kaj tamen tiel junaj ! Mi fakte devus memori ke la infanoj de la reĝoj estas viroj ekde la lulilo.

Nu, Tabaki sciis tion tiel bone kiel iu ajn, estas nenio pli malbonvena ol laŭdi infanojn tuj antaŭ ilia nazo; li ĝojis vidi ke patrino kaj patro lupu ŝajnis embarasitaj.

Tabaki dummomente restis senmova, ĝojante pro la malbono kiun li ĵus faris; poste li malice rekomencis :

- Ŝer-Kano, la Granda, ŝanĝis la ĉasejon. Li baldaŭ ĉasos sur ĉi tiuj montetoj, je la venonta luno, li diris al mi.

Ŝer-Kano estis la tigro kiu loĝis apud la rivero, la **Vajngunga**, je dudek mejlojn (+/-30Km) pli for.

- Li ne havas la rajton, kolere komencis patro lupu. Laŭ la Leĝo de la Ĝangalo, li ne rajtas ŝanĝi siajn kvartirojn sen dece informi. Li timigos la tutan ĉasbestaron je dek mejlojn (+/-15Km) ĉirkaŭe, kaj mi ... mi ja devas mortigi por du en ĉi tiuj tempoj.

1 Vorto el la hindia, kun la signifo de "la frenezeco".

2 El la hindia, *Gidur* signifas ŝakalo kaj *log*, la homoj.

- Lia patrino ne nomis lin "*Lungr*⁽³⁾" por nenio, diras trankvile patrino lupino : li denaske lamas je unu piedo; tial li ĉiam povis nur mortigi brutojn. Nun la vilaĝanoj de la Vajngunga koleras kontraŭ li, kaj li venas kolerigi la niajn. Ili priserĉos la ĝangalon por trovi lin... li estos for, sed ni kaj niaj infanoj, necesos al ni kuri kiam oni bruligos la herbon. Vere, ni estas tre dankemaj por Ŝer-Kano !

- Ĉu mi parolos al li pri via dankemo ? diris Tabaki.

- Foren ! bruske jelpis patro lupo. Iru ĉasi kun via mastro. Vi faris sufiĉe da damaĝo por unu nokto.

- Mi foriras, diris kviete Tabaki. Vi povas aŭdi Ŝer-Kanoⁿ malsupre, en la densejoj. Mi povintus sendevigi min de la mesaĝo.

patro lupo aŭskultis.

Sube, en la valo kiu malsupreniris al malgranda rivero, li aŭdis la malmildan, incititan, kvereleman kaj melodian plendon de tigro kiu kaptis nenion kaj al kiu malmulta gravas ke la tuta ĝangalo sciu tion.

- La sencerbulo ! diris patro lupo, komenci noktan laboron per tia bruego ! Ĉu li pensas ke niaj kapreoloj estas kiel siaj grasaj bovidoj de Vajngunga ?

- Ŝŝ ! Estas nek bovo nek kapreolo kiun li ĉasas ĉi-vespere, diris patrino lupino, estas la homo.

La plendo ŝanĝiĝis al ia zumanta ronronado kiu ŝajnis veni de ĉiu punkto de la spaco. Estis la bruo kiu misgvidas la hakistojn kaj la vagantojn sub libera ĉielo, kaj kelkfoje kurigas ilin en la faŭkon mem de la tigro.

- La homo ! diris patro lupo, montrante ĉiujn siajn blankajn dentojn. Pu ! Ĉu ne estas sufiĉe da insektoj kaj da ranoj en la pluvuoj ke li devas manĝi homon, kaj sur nia tereno plie ?

La Leĝo pri Ĝangalo, kiu ordonas nenion sen kialo,

3 Vorto el la hindia, kun la signifo de "lamulo".

malpermesas al ĉiu besto manĝi homon, krom kiam ĝi mortigas por montri al siaj infanoj kiel oni mortigas, kaj tiam ĝi devas ĉasi ekster la rezervejoj de sia klano aŭ de sia tribo. La vera kialo estas ke la murdo de la homo signifas, pli malpli frue, la invado de blankuloj armitaj per fusiloj kaj rajdantaj sur elefantoj, kaj de brunuloj, centope, provizitaj per gongoj, raketoj kaj torĉoj. Tiam ĉiuj suferas en la ĝangalo... La kialo kiun bestoj dissciigas inter si, estas ke, la homo estanta la plej malforta kaj la plej senarma el la vivantuloj, estas malinda de ĉasisto tuŝi lin. Ili ankaŭ diras - kaj tio estas vera - ke la hommanĝantoj fariĝas favaj kaj ke ili perdas siajn dentojn.

La rononado kreskis kaj transformiĝis al plengorĝa "Aaarh !" de la tigo kiu sturmas.

Tiam okazis blekado - stranga blekado, malinda de tigo - eligita de Ŝer-Kano.

- Li maltrafis sian celon, diris patrino lupino. Kion ĝi estas ?

Patrino lupino eliris je kelkaj paŝoj de la enirejo; li aŭdis Ŝer-Kanoⁿ sovaĝe grumbli baraktante en la veprejo.

- La sencerbulo havis la ideon salti sur fajron de hakistoj kaj bruligis al si la piedojn ! diris patrino lupino, grumblante. Tabaki estas kun li.

- Io supreniras la monteton, diris patrino lupino, streĉante oreton. Pretigu vin.

Estis mallaŭta susuro de tufarbustoj en la densejo. Patrino lupino, kun siaj koksoj sub li, kuntiris sin, preta por salti. Tiam, se vi ĉeestintus, vi estus vidanta la plej mirindan aferon en la mondo : la Lupino haltigata en duonsalto. Li elanis antaŭ ol scii tion kion li celis, poste li provis sin deteni. Rezultis salton de kvar aŭ kvin futoj (1,3 ĝis 1,5m) rekte en la aero, de kie li falis preskaŭ sur la sama punkto de la grundo kiun li forlasis.

- Homo ! li acide diris. Etulo de homo. Rigardu !

Fakte, antaŭ li, apogante sin sur malalta branĉo, staris nuda bruna bebo, kiu apenaŭ povis paŝi, la plej dolĉa, graspuŝeta, eta atomo kiu neniam venis nokte al la kaverno de iu lupo. Li levis la okulojn por rigardi patron lupon en la vizaĝo kaj ekridis.

- Ĉu li estas etulo de homo ? diris patrino lupino. Mi neniam vidis tion. Alportu lin ĉi tien.

Lupo, al kutimiĝinta transporti siajn proprajn idojn, tre bone povas, se estas necese, preni en sian faŭkon ovon sen frakasi ĝin. Kvankam la makzeloj de patro lupo sin tute refermis sur la dorso de la infano, ne unu dento skrapetis la haŭton kiam li demetis ĝin meze de siaj idoj.

- Kiel li estas ĉarma ! Kiel li estas nuda !... Kaj kiel li estas brava ! milde diris patrino lupino.

La bebo sin ŝovis inter la idojn kontraŭ la varmeco de la varmeta flanko.

- Ha ! Ha ! Li prenas sian manĝon kun la aliaj... Tiel, li estas etulo de homo. Ĉu iam ekzistis iu lupino kiu povu fanfaroni pri hometulo inter siaj infanoj ?

- Mi iufoje aŭdis paroli pri simila afero, sed ne en nia klano aŭ en mia tempo, diris patro lupo. Li ne havas haron, kaj mi povus mortigi lin tuŝante lin per la piedo. Sed vidu, li rigardas min kaj ne timas !

La lunlumo estingiĝis ĉe la buŝo de la kaverno, ĉar la dika kvadrata kapo kaj la fortaj ŝultroj de Ŝer-Kano baris ĝian aperturon kaj provis penetri en ĝi. Tabaki, malantaŭ li, plorpepis :

- Ekscelenco, Ekscelenco, li eniris ĉi tie !

- Ŝer-Kano faras al ni grandan honoron, diris patro lupo kun malbonaj okuloj. Kion volas Ŝer-Kano ?

- Mian predon. Iu etulo de homo laŭiris ĉi tiun vojon. Liaj gepatroj fuĝis. Donu lin al mi !

Ŝer-Kano estis saltinta sur la fajron de tendaro de hakistoj, kiel diris patro lupo, kaj la brulvundo de liaj piedoj

furiozigis lin. Sed patro lupo sciis la aperturon de la kaverno tro mallarĝan por tigro. Eĉ tie kie li staris, la ŝultroj kaj la kruroj de Ŝer-Kano estis kunpremataj pro la manko de spaco, kiel la membroj de homo kiu provus batali en barelo.

- La lupoj estas libera popolo, diris patro lupo. Ili ricevas ordonojn nur de la Supera Konsilio de la klano, kaj tute ne de ia pli-malpli striita mortiganto de bovoj. La hometulo estas nia... por mortigi lin, se ni emas tion.

- Emo aŭ ne emo...! Kia lingvo tio estas ? Per la virbovo kiun mi mortigis, ĉu mi devas atendi, kun la nazo en via kuŝejo de hundoj, kiam temas pri mia plej strikta rajtaĵo ? Estas mi, Ŝer-Kano, kiu parolas.

La rorado de la tigro plenigis la kaverton per ĝia tondro. Patrino lupino skuis la idojn ĉe sia flanko kaj impetis, kun siaj okuloj, kiel du verdaj lunoj en la mallumo, fiksitaj al la flamantaj okuloj de Ŝer-Kano.

- Kaj estas mi, Rakŝa⁽⁴⁾, kiu tuj respondos al vi. La hometulo estas mia, Lungri, la mia al mi ! Li ne estos mortigita. Li vivos por kuri kun la klano kaj por ĉasi kun la klano; kaj, atentu pri tio, ĉasisto de tute nudaj etuloj, manĝanto de ranoj, mortiganto de fiŝoj ! Li persekutos vin ! ... Nun eliru el ĉi tie aŭ, per la akvocervo kiun mi mortigis - ĉar mi ne nutras min per malsatmortita bruto - vi reiros al via patrino, brulkapulo de la ĝangalo, pli lama ol vi neniam naskiĝis. Iru foren !

Patro lupo levis la okulojn, mirigita. Li ne plu memoris pri la tagoj kiam li konkeris patrinon lupinon, en lojala lukto kontraŭ kvin aliaj lupoj, dum la tempo kiam, en la esplorvojaĝoj de la klano, ne estis pro simpla ĝentileco ke oni nomis lin la Demono. Ŝer-Kano povintus kontraŭstari patron lupon, sed li ne kapablis ataki patrinon lupinon ĉar li sciis ke en la pozicio en kiu li estis, ŝi konservis la tutan avantaĝon de

4 Vorto el la hindia, kun la signifo de "la demono".

la loko kaj ke ŝi bataladus ĝismorte. Tial li grumblante retropaŝis el la aperturo; kaj kiam li estis en aperta aero, li kriis :

- Ĉiu hundo bojas en sia propra korto ! Ni vidos tion kion diros la klano, kiel ĝi akceptos ĉi tiun edukadon de hometulo. La etulo estas mia, kaj sub mia dento necesos ja ke fine li falos, ho ŝtelistoj kun vilaj vostoĵoj !

Patrino lupino anhelanta lasis sin refali inter la idoj, kaj patro lupulo serioze diris al ŝi :

- Pri tio, Ŝer-Kano pravas; la etulo devas esti montrita al la klano. Ĉu vi volas ankoraŭ gardi lin, patrino ?

Ŝi murmuris :

- Se mi volas gardi lin !... Li venis tute nuda, nokte, sola kaj malsatmortanta, kaj li eĉ ne timis. Rigardu, li jam pelis unu el niaj beboj flanken. Kaj tiu lama buĉisto mortigintus lin kaj poste fuĝintus al la Vajngunga, dum la vilaĝanoj de ĉi tie alkurintus, tra niaj ripozejoj, batuante por venĝi ofendon !... Ĉu mi gardas lin ? Certe mi gardas lin. Kuŝu vin tie, raneto... Ho vi, Moŭgli⁽⁵⁾, ĉar Moŭgli^{on} la Ranon mi volas nomi vin, la tempo venos kiam vi ĉasos Ŝer-Kanoⁿ kiel li ĉasis vin !

- Sed kion diros nia klano ? diris patro lupulo.

La Leĝo de la Ĝangalo tre klare mencias ke ĉiu lupulo povas, kiam li geedziĝas, ekŝiĝi el la klano al kiu li apartenas; sed, tuj kiam ĝiaj idoj estos sufiĉe aĝaj por stari sur siaj piedoj, ĝi devas alkonduki ilin al la konsilio de la klano, kiu ĝenerale kunvenas unufoje monate dum la plenluno, por ke la aliaj lupuloj povu agnoski ilian identecon. Post ĉi tiu ekzameno, la idoj rajtas kuri tien kien plaĉas al ili, kaj ĝis kiam ili mortigos sian unuan kapreolon, ekzistas nenia valida senkulpigo por lupulo plenkreska kaj de la sama klano, kiu mortigus iun el ili. La puno estas la morto por la murdinto,

5 Vorto el la hindia, kun la signifo de "la rano".

kie ajn oni trovas lin, kaj se vi pripensas dum minuto, vi vidos ke tiel devas esti.

Patro lupo atendis ĝis kiam liaj idoj povis iom kuri, kaj tiam, dum la nokto de la kunveno, li elkondukis ilin kun Moŭgli^{on} kaj patrinojn lupinojn al la Roko de la Konsilio - supro de monteto kovrita de ŝtonoj kaj rulŝtonoj, kie centoj da lupoj povis apartiĝi. Akela, la granda soleca griza lupo, kiun lia fortikeco kaj lerteco metis al la kapo de la klano, estis kuŝinta laŭ sia tuta longeco sur sia ŝtono; iom sub li sidis pli ol kvardek lupoj el ĉiuj staturoj kaj ĉiuj feloj, de la melkoloraj veteranoj, kiuj kapablis per si mem elturniĝi kun kapreolo, ĝis la junaj nigraj trijaraj lupoj, kiu opiniis sin kapablajn. La solulo nun estis ĉe ilia kapo ekde unu jaro. Dum sia junaĝo, li dufoje falis en kaptilon por lupoj, kaj aliffoje li estis svenbatita lasita kvazaŭ morta : tiel li konis la morojn kaj la kutimojn de la homoj.

Oni tre malmulte interbabilis sur la roko. La idoj puŝiĝis unu la alian en la centro de la rondo kie kunsidis iliaj patrinoj kaj iliaj patroj, kaj de tempo al tempo pli aĝa lupoj trankvile sin direktis al iu ido, atente rigardis lin, kaj revenis al sia loko per silentaj paŝoj. Foje patrino puŝis sian idon en plenan lunlumon por certiĝi ke li tute ne restis nerimarkita. Akela, siaflanke, kriis :

- Vi konas la Leĝon, vi konas la Leĝon. Bone rigardu, ho lupoj !

Kaj la patrinoj rediris la krion :

- Rigardu, bone rigardu, ho lupoj !

Finfine (kaj patrino lupino sentis la harojn de sia kolo hirtiĝi kiam alvenis tiu momento), patro lupoj puŝis "Moŭgli^{on} la Ranon", kiel ili nomis lin, meze de la rondo kie li restis sur la grundo ridante kaj ludante kun la ŝtonoj kiuj glimbrilis en la lunlumo.

Akela ne levis sian kapon de inter siaj kruroj, sed daŭrigis la monotonan krion :

- Bone rigardu !...

Obtuza roro eliris el malantaŭ la rokoj; la voĉo de Ŝer-Kano kriis :

- La etulo estas mia. Donu lin al mi. La Libera Popolo, kion ĝi povas fari per tiu hometulo ?

Akela ne eĉ movigis siajn orelojn; li simple diris :

- Bone rigardu, ho gelupoj ! La Libera Popolo, kion ĝi povas fari per la ordonoj de iu ajn, krom tiuj de la Libera Popolo !... Zorge rigardu !

Estis ĥoro de obtuzaj blekadoj, kaj juna kvarjara lupo direktita al Akela, ripetis la demandon de Ŝer-Kano :

La Libera Popolo, kion ĝi povas fari per tiu hometulo ?

Nu la Leĝo de la Ĝangalo, en okazo de disputo pri la rajtoj de ido ĉe la akcepto de la klano, postulas ke almenaŭ du membroj de la klano, kiuj estas nek lia patro nek lia patrino, ekparolu favore al li.

- Kiu parolas por ĉi tiu etulo ? diris Akela. En la Libera Popolo, kiu parolas ?

Ne estis respondo, kaj patrino lupino prepariĝis por tiu kiu estus ŝia lasta batalo, ŝi bone sciis tion, se necesus ekbatali. Tiam, la sola fremdulo kiu estas akceptita en la konsilion de la klano - Baluo⁽⁶⁾, la dormema bruna urso, kiu instruas al la idoj la Ĝangalan Leĝon, la maljuna Baluo kiu povas iri kaj veni ĉien kie plaĉas al li, ĉar li manĝas nur nuksojn, radikojn kaj mielon - ekstaris sin sur sia postaĵo kaj grumblis.

- La hometulo... la hometulo ?... li diris. Estas mi kiu parolas por la hometulo. Ne estas malbono en hometulo. Mi ne havas la talenton de parolado, sed mi diras la veron. Lasu lin kuri kun la klano, kaj ke oni anigu lin inter la aliajn. Estas mi mem kiu donos al li lecionojn.

- Ni ankoraŭ bezonas iun alian, diris Akela. Baluo

6 Vorto el la hindia, kun la signifo de "urso".

parolis, kaj estas li kiu instruas niajn idojn. Kiu parolas kun Baluo ?

Ombro falis meze de la rondo. Estis Baghera⁽⁷⁾, la nigra pantero. Lia felo estas tute nigra kiel inko, sed la markoj de la leopardo vidiĝas, en kelkaj taglumoj, kiel faras la rebriloj de la muaro. Ĉiu konis Bagheraⁿ, kaj neniu zorgis iri kontraŭ liaj intencoj, ĉar li estis tiel ruza kiel Tabaki, tiel riskema kiel la sovaĝa bubalo kaj tiel kuraĝega kiel la vundita elefanto. Sed lia voĉo estis pli dolĉega ol la sovaĝa mielo kiu falas guton post guto de la arboj, kaj lia haŭto pli glata ol la lanugo.

- Ho Akela, kaj vi, Libera Popolo ! li ronronis, mi havas neniun rajton en via kunveno. Sed la Leĝo de la Ĝangalo diras ke, se estiĝus dubo en afero pri nova bebo, en kiu ne temas pri murdo, la vivo de ĉi tiu bebo povas esti aĉetita dank' al prezo. Kaj la Leĝo ne diras kiu rajtas aŭ ne pagi ĉi tiun prezon. Ĉu mi pravas ?

- Tre bone ! Tre bone, eligis la junaj lupoj kiu ĉiam malsatas. Ni aŭskultu Bagheraⁿ. La etulo povas esti elaĉetita. Tio estas la Leĝo.

- Sciante ke mi tute ne rajtas paroli ĉi tie, mi petas vian permeson.

- Parolu do, kriis dudek voĉoj.

- Mortigi nudan etulon estas honto. Plie, li povos helpi nin por ĉasi pli bone kiam li estos sufiĉe aĝa. Baluo parolis favore al li. Nun, al tio kion diris Baluo, mi aldonos la oferton de virbovo, kaj tre grasa, freŝe mortigita je apenaŭ duonmejlo de ĉi tie, se vi akceptas la hometulon, konforme al la Leĝo. Ĉu estas malfacilaĵo ?

Laŭtiĝis dudekoj da voĉa brukriado dirantaj :

- Ne gravas ! Li mortos sub la vintraj pluvoj; li rostiĝos sub la suno... Kian malbonon povas fari al ni nuda rano ?... Ke

7 Vorto el la hindia, kun la signifo de "pantero".

li kuru kun la klano !... Kie estas la virbovo, Baghera ?... Ke ni akceptu ĝin.

Kaj tiam revenis la profunda bojado de Akela.

- Bone rigardu... bone rigardu, ho lupoj !

Moŭgli daŭrigis interesiĝi pri la ŝtonoj; li degnis dediĉi nenian atenton al la lupoj kiuj venis unu post la alia por ekzameni lin.

Finfine, ili ĉiuj malsupreniris la monteton al la eltrovo de la morta virbovo, kaj restis solaj Akela, Baghera, Baluo kaj la lupoj de Moŭgli.

Ŝer-Kano ankoraŭ roris en la nokto, ĉar li estis tre kolera ke Moŭgli ne estis transdonita al li.

- Jes, vi povas rori, diris Baghera en siaj lipharoj : ĉar la tempo venos kiam ĉi tiu nuda eta afero rorigos vin per alia tono, aŭ mi scias nenion pri la viro.

- Ni bone faris, diris Akela : la homoj kaj iliaj idoj estas tre saĝaj uloj. Alvenos la tempo kiam li povos esti utila.

- Estas vere, diris Baghera; alvenos la tempo kiam ni eble bezonos lin : ĉar neniu povas esperi ĉiam gvidi la klanon !

Akela nenion respondis. Li pensis pri la momento kiu alvenos por ĉiu klanestro, kiam lia forto forlasas lin kaj kiam, pli malfortiĝinta tagon post tago, li finfine estos mortigita de la lupoj kaj anstataŭita de nova estro, siavice mortigita pli malfrue.

- Kunprenu lin, li diris al patro lupoj, kaj trejnu lin kiel taŭgas al membro de la Libera Popolo.

Kaj estas tiel ke Moŭgli aniĝis al la klano de la lupoj de Seonio, koste de virbovo kaj pro bona parolo de Baluo.

Nun necesas al vi klopodi por salti dek aŭ dek unu tutajn jarojn, kaj nur imagi la mirigan ekziston kiun Moŭgli vivis inter la lupoj, ĉar se necesus skribi tion, tio plenigus, mi ne scias kiom da libroj. Li kreskis inter la lupidoj, kvankam nature, ili fariĝis lupoj, kiam li mem apenaŭ valoris infanon;

kaj patro lupo instruis al li lian taskon, kaj la signifon de ĉiuj aferoj en la ĝangalo, ĝis tio ke ĉiu tremeto de herbo, ĉiu blovo de varma aero en la nokto, ĉiu tonnuanco de la strigoj super lia kapo, ĉiu bruo de ŝelo skrapetita de la vesperto dum momenta ripozo en la arbo, ĉiu salto de la plej eta fiŝo en la lageto, fariĝu ĝuste tiom signifoplena por li kiom sia oficeja laboro por aferisto. Kiam li ne lernis, li sidis sub la suno kaj dormis, poste manĝis, re-endormiĝis; kiam li sentis sin malpura aŭ tro suferis pro varmeĉo, li banis sin en la lagetoj de la arbarego, kaj kiam li mankis da mielo (Baluo diris al li ke mielo kaj nuksoj estas tute same agrablaj por manĝi kiel la kruda viando), li grimpis arbojn por serĉi ĝin, kaj Baghera montris al li kiel fari tion. Li kuŝis sin sur branĉo kaj alvokis: "Venu ĉi tien, frateto!" kaj Moŭgli komencis grimpi kiel faras bradipo, sed poste li kuraĝis sin ĵeti tra la branĉojn preskaŭ tiel aŭdacie kiel la griza simio.

Li prenis sian lokon ĉe la Roko de la Konsilio, kiam la klano kunsidis, kaj tie li malkovris ke fikse rigardante iun ajn lupon, li povis devigi ĝin mallevi la okulojn: tiel li faris por amuziĝi. En aliaj momentoj, li eltiris la longajn dornojn el la felo de siaj amikoj, ĉar la lupoj terure suferas de la dornoj kaj de ĉiaj pikiloj kiuj lokiĝas en ilia felo. Li nokte malsupreniris la deklivo de la monto al la kultivitaj teroj kaj rigardis kun granda scivolemo la vilaĝanojn en iliaj kabanoj; sed li malfidis la homojn ĉar Baghera montris al li kvadratan skatolon, kun klappordo, tiel lerte kaŝita en la ĝangalo, ke li preskaŭ paŝis sur ĝi, kaj li diris al li ke ĝi estas kaptilo. Tio kion li ŝatis super ĉio, estis enprofundiĝi kun Baghera en la varma nigra koro de la arbarego, por dormi tra la tuta peza tago, kaj vidi, kiam noktiĝis, kiel Baghera traktis por mortigi: li mortigis dekstren, maldekstren, laŭ kaprico de sia malsato, kaj Moŭgli faris sammaniere - krom unu escepto. Tuj kiam li sufiĉe aĝis por kompreni, Baghera diris al li ke li neniam devus tuŝi la brutaron ĉar li estis elaĉetita en la

Konsilio de la Klano, koste de la vivo de virbovo.

- La ĝangalo apartenas al vi, diris Baghera, kaj vi povas mortigi en ĝi ĉion kiun vi estas sufiĉe forta por mortigi; sed, memore al la virbovo kiu elaĉetis vin, vi devas neniam mortigi aŭ manĝi junan aŭ maljunan bruton. Estas la Leĝo de la Ĝangalo.

Moŭgli fidele konformiĝis al tio.

Li tiel kreskis, kaj fariĝis forta kiel kutime fariĝas knabo kiu ne iras al lernejo kaj povas zorgi pri nenio en la vivo nur pri aferoj por manĝi.

Patrino lupino diris al li, unu- aŭ du-foje, ke Ŝer-Kano ne estis ulo al kiu oni devis fidi, kaj ke iam necesos al li mortigi Ŝer-Kanoⁿ; kaj sendube juna lupo memorintus ĉi tiun informon je ĉiu horo de sia vivo, sed Moŭgli forgesis ĝin ĉar li estis nur malgranda knabo - kaj tamen li donintus mem al si la nomon de lupo se li sciintus paroli homan lingvon.

Ŝer-Kano ĉiam troviĝis sur sia vojo en la ĝangalo. Laŭmezure kiel la estro Akela maljuniĝis kaj malfortiĝis, la lama tigro ligis altajn amikajn rilatojn kun la pli junaj lupoj de la tribo, kiuj sekvis lin por akiri liajn restaĵojn, afero kiun Akela neniam permesintus se li kuraĝintus iri ĝis la fino de sia legitima aŭtoritato. Plie Ŝer-Kano flatis ilin : li miris ke tiel belaj junaj ĉasistoj kontentiĝis lasi sin gvidi de mortiganta lupoj kaj de hometulo.

- Oni rakontas al mi, diris Ŝer-Kano, ke vi, en la Konsilio, vi ne kuraĝas rigardi lin en la okuloj !

Kaj la junaj lupoj grumblis kaj hirtigis sian dorson.

Baghera, kiu havis ĉie okulojn kaj orelojn, eksciis ion pri tio, kaj, unu- aŭ du-foje, klare klarigis al Moŭgli ke Ŝer-Kano iam mortigos lin. Kaj Moŭgli ridis, kaj respondis :

- Mi havas la klanon kun mi, mi havas vin... kaj Baluo ja, kvankam li estas tiom pigra, donus unu aŭ du piedbatojn por mia honoro. Kial mi timus ?

Estis dum tago de granda varmeĉo ke ideo, naskita de

kelka aŭdita diro, formiĝis en la cerbo de Baghera. Eble estis Sahi, la histriko, kiu parolis al li pri la afero. Ĉiuokaze li diris al Moŭgli, kiam ili estis plejprofunde de la ĝangalo kaj ke la knabeto estis kuŝinta, kun la kapo sur la bela nigra felo de la pantero :

- Frateto, kiom da fojoj mi avertis vin ke Ŝer-Kano estas via malamiko ?

- Tiom da fojoj kiom estas nuksoj ĉe tiu palmobranĉo ! deklaris Moŭgli, kiu kompreneble ne kapablis kalkuli. Kaj plie poste ?... Mi estas dormema, Baghera, kaj Ŝer-Kano nur vosto kaj blekoj... kiel Mor, la Pavo.

- Sed ne plu estas tempo por dormi. Baluo scias tion, ankaŭ mi scias tion, la tuta klano scias tion, kaj eĉ tiuj sencerbuloj, tiuj sencerbaj damaoj scias tion... Tabaki mem diris tion al vi.

- Ho ! Ho ! diris Moŭgli, Tabaki venis al mi antaŭ ne longe, por rakonti al mi, mi ne plu scias kian malrespektan rakonton : mi estis hometulo, nuda etulo, ne eĉ bona por elfosi fungojn... Sed mi kaptis Tabaki^{on} per la vosto kaj dufoje batpuŝis lin kontraŭ palmon, por lernigi al li pli bonajn manierojn.

- Estis azenaĵo, ĉar se Tabaki estas klaĉulo, li tamen volis paroli al vi pri io kio tuŝas vin de proksime. Malfermu do tiujn okulojn, frateto : Ŝer-Kano ne kuraĝas mortigi vin en la ĝangalo; sed bone memoru ke Akela estas tre maljuna, ke baldaŭ venos la tago kiam li ne plu kapablos mortigi sian kapreolon, kaj ke tiam li ne plu gvidos la klanon. Multaj el la lupoj kiuj ekzamenis vin kiam vi estis prezentita al la Konsilio, nun estas maljunaj, ankaŭ ili, kaj la junaj lupoj pensas - Ŝer-Kano informis ilin - ke etulo de homo ne estas ĉe sia loko en la klano. Baldaŭ vi estos viro...

- Kaj kio estas iu homo kiu ne kurus kun siaj fratoj ? diris Moŭgli. Mi naskiĝis en la ĝangalo, mi obeis la Leĝon de la Ĝangalo, kaj ne estas el niaj lupoj kruroj el kiuj mi ne

eltiris dornon. Ili ja estas miaj fratoj !

Baghera etendiĝis laŭ sia tuta longeco, kaj duone fermis la okulojn.

- Frateto, li diris, metu vian manon sub mian makzelon.

Moŭgli antaŭenŝovis sian fortan brunan manon, kaj ĝuste sub la molhara mentono de Baghera, kie la impresaj muskoloj ruliĝis kaŝitaj en la brila felo, li sentis malgrandan nudan lokon.

- Estas neniu en la ĝangalo kiu scias ke mi, Baghera, surhavas ĉi tiun signon... la spuron de la kolringo; kaj tamen, frateto, mi naskiĝis inter la homoj, kaj estas inter la homoj, ke mia patrino mortis, en la kaĝoj de la reĝa palaco, ĉe [Hodejporo](#). Estas pro tio ke mi pagis la koston ĉe la Konsilio, kiam vi estis kompatinda tute nuda etulo. Jes, mi ankaŭ naskiĝis inter la homoj. Mi neniam estis vidinta la ĝangalon. Oni nutris min malantaŭ la stangoj en fera marmito; sed iun nokton mi sentis ke mi estas Baghera - la pantero - kaj tute ne iu ludilo por la homoj, mi rompis la malŝatindan seruron per piedbato kaj foriris. Poste, ĉar mi lernis la manierojn de la homoj, mi fariĝis pli terura en la ĝangalo ol Ŝer-Kano, ĉu ne ?

- Jes, diris Moŭgli, la tuta ĝangalo timas Bagheraⁿ... la tuta ĝangalo, krom Moŭgli.

- Ho ! Vi, vi estas hometulo ! diris la nigra pantero kun senfina tenereco; kaj same kiel mi revenis al mia ĝangalo, tiel vi finfine devos reiri al la homoj, al la homoj kiuj estas viaj fratoj... se vi ne estas unue mortigita en la Konsilio !

- Sed kial, kial iu dezirus mortigi min ? rebatis Moŭgli.

- Rigardu min, diris Baghera.

Kaj Moŭgli fikse rigardis lin, inter liaj okuloj. La granda pantero turnis la kapon post duonminuto.

- Jen kial ! li diris, krucante siajn krurojn sur la foliojn. Mi mem ne sukcesas rigardi vin en la okulojn, kaj tamen mi naskiĝis inter la homoj, kaj mi amas vin, frateto. La aliaj, ili

malamas vin ĉar iliaj okuloj ne kapablas subteni la viajn; ĉar vi estas saĝa; ĉar vi eltiris el iliaj piedoj la dornojn; ĉar vi estas viro.

- Mi ne sciis ĉi tiujn aferojn, diris Moŭgli per paŭtoma tono.

Kaj li kuntiris siajn pezajn nigrajn brovojn.

- Kio estas la Leĝo de la Ĝangalo ? Unue frapu, kaj laŭtigu la voĉon. De via senzorgeco mem, ili vidas ke vi estas viro. Sed estu gardema. Mi havas en mia koro certecon : la unuan fojon kiam la maljuna Akela maltrafos sian predon - kaj ĉiutage li pli kaj pli penege kaptas sian kapreolon - la klano sin turnos kontraŭ li kaj kontraŭ vi. Ili okazigos kunvenon sur la Roko, kaj tiam... kaj tiam... mi rememoras tion ! diris Baghera saltleviĝante. - Rapide malsupreniru al la kabanoj de la homoj en la valo, kaj tie prenu iom da Ruĝa Floro kiun ili kreskigas tie; tiel kiam la tempo estos veninta, vi havos kunhelpanton eĉ pli fortan ol mi aŭ Baluo aŭ tiuj de la tribo kiuj amas vin. Iru serĉi la Ruĝan Floron.

Per Ruĝa Floro, Baghera volis diri la fajron. Sed neniu estulo en la ĝangalo nomis la fajron per sia vera nomo. Ĉiu besto dum sia tuta vivo sentas pri tio mortigan timon, kaj elpensas cent manierojn priskribi ĝin sen nomi ĝin.

- La Ruĝa Floro ! diris Moŭgli. Tio kreskas dum la krepusko proksime de iliaj kabanoj. Mi iros serĉi tion.

- Jen ja la hometulo kiu parolas ! diris Baghera orgojle. Memoru ke ĝi kreskas en malgrandaj potoj. Rapide ekprenu unu, kaj gardu ĝin kun vi por kiam vi bezonos ĝin.

- Bone, diris Moŭgli, mi iras tien. Sed ĉu vi certas, ho Baghera mia - li metis sian brakon ĉirkaŭ la belegan kolon kaj enŝovis siajn okulojn funde de la grandaj okuloj - ĉu vi certas ke ĉi ĉio estas la faritaĵo de Ŝer-Kano ?

- Per la rompita seruro kiu liberigis min, mi pri tio estas certa, frateto !

- Do, per la Virbovo kiu elaĉetis min ! Mi pagos al Ŝer-

Kano tion kion mi ŝuldas al li, honeste; eblas eĉ ke li ricevu iom pli ol sia konto.

Kaj Moŭgli per unu salto foriris.

- Jen la viro ! Jen ja la viro, diris al si mem la pantero rekuŝiĝante. Ho ! Ŝer-Kano, vi neniam ĉasis pli danĝere ol en ĉi tiu ĉaso de rano, antaŭ dek jaroj !

Moŭgli jam estis for en la arbarego, firme trotanta, kaj li sentis sian koron tute varma en sia brusto. Li alvenis al la kaverno ĉe la momento kiam la vespera nebulo leviĝis; li reakiris la spiron kaj rigardis malsupren, en la valon. La etaj lupoj estis ekstere, sed la patrino, en la fundo de la kaverno, komprenis per lia spiro, ke io malkvietigis sian ranon.

- Kio estas, filo ? ŝi diris.

- Klaĉoj de vespertoj pri Ŝer-Kano ! li respondis. Mi ĉi-vespere ĉasos sur plugita tero.

Kaj li sin ĵetis en la veprojn por atingi la rivereton, tute funde de la valo. Tie li haltis, ĉar li aŭdis la kriojn de la klano ĉasanta, li aŭdis ĉaspelitan akvocervon muĝi, la stertoron de la besto en senespera situacio. Poste leviĝis blekadoj de mokado kaj de malico : estis la junaj lupoj.

- Akela ! Akela ! Ke la Solulo montru sian forton !...

Lasu lokon al la klanestro ! Eksaltu, Akela !

La solulo devis salti kaj maltrafi sian predon, ĉar Moŭgli aŭdis la klakon de liaj dentoj kaj ĝemadon kiam la akvocervo, per siaj antaŭaj piedoj, forpuŝis lin. Li ne restis por pli aŭskulti, sed ekĵetiĝis antaŭen; kaj la blekoj mallaŭtiĝis malantaŭ li, laŭmezure kiel li rapidis al la kultivitaj kampoj kie loĝis la vilaĝanoj.

- Baghera diris vere ! li murmuris, kaŝante sin inter la amasigita furaĝo sub la fenestro de kabano. Morgaŭ estos la tago de Akela kaj la mia.

Tiam li almetis sian vizaĝon sur la fenestron kaj konsideris la fajron en la fajrujo; li vidis la edzinon de la kampulo stariĝi dum la nokto kaj nutri la flamon per nigraj

buloj; kaj kiam venis la mateno, ĉe la horo kiam blankiĝis la malvarma nebuleto, li vidis la infanon de la viro preni korbon el vimeno interne tegitan de tero, plenigi ĝin per ruĝaj karboj, involvi ĝin en sian kovrilon, kaj foriri gardi la bovinojn.

- Ĉu estas nur tio ? diris Moŭgli. Se infano povas fari tion, mi devas timi nenion.

Li turniris post la angulo de la domo, renkontis la knabon vizaĝon kontraŭ vizaĝo, elprenis de li la fajron el la manoj kaj malaperis en la nebuleto, dum la alia kriegis pro ektimigo.

- Ili estas tute similaj al mi ! diris Moŭgli, blovante sur la poton da braĝoj, kiel li vidis la virinon fari. Ĉi tiu afero mortos, se mi nenion donas al ĝi por manĝi...

Kaj li enĵetis kelkajn branĉetojn kaj pecojn da seka ŝelo sur la ruĝa afero. Duonvoje de la monteto, li renkontis Bagheraⁿ, sur kies felo matena roso brilis kiel lunŝtonoj.

- Akela malsukcesis sian trafon, diris la pantero. Ili mortigintus lin lastnokte, sed ili ankaŭ volis vin. Ili serĉis vin sur la monteto.

- Mi estis en la plugitaj teroj. Mi estas preta. Vidu !
Moŭgli prezentis al li la poton plenan de fajro.

- Bone !... Nun mi vidis la homojn enĵeti sekan branĉon en ĉi tiun aferon kaj tuj la Ruĝa Floro ekfloris ĉe la fino... Ĉu vi ne timas ?

- Ne. Kial mi timus ? Mi nun memoras... se tio ne estas songo... ke antaŭ ol esti lupo mi kuŝiĝis apud la Ruĝa Floro, kaj tie estis varme kaj bone.

Dum tiu tuta tago, Moŭgli restis sida en la kaverno, prizorgante sian poton da braĝoj kaj enŝovante en ĝi sekajn branĉojn por vidi kiel ili brulis. Li serĉis kaj trovis branĉon kiu ŝajnis al li laŭdezire, kaj vespere kiam Tabaki venis al la kaverno diri al li sufiĉe krude ke oni petis lin ĉe la Rokon de la Konsilio, li ekridis ĝis Tabaki fuĝis. Kaj Moŭgli iris al la

Konsilio, ankoraŭ ridante.

Akela la Solulo kuŝis apud sia ŝtono por montri ke lia sukcedado estas permesata, kaj Ŝer-Kano kun sia sekvantaro da lupoj nutritaj de restaĵoj, paŝis tien kaj reen, celo de videblaj flatoj. Baghera estis kuŝinta apud Moŭgli, kaj la infano tenis la poton da braĝoj inter siaj genuoj. Kiam ili estis ĉiuj kunigitaj, Ŝer-Kano ekparolis - okazaĵo kiun li neniam kuraĝus fari dum la feliĉaj tagoj de Akela.

- Li ne rajtas, Baghera murmuris. Diru tion. Li estas filo de hundo. Li timos.

Moŭgli saltleviĝis.

- Libera Popolo, li ekkriis, ĉu Ŝer-Kano estas nia estro ?
... Kion tigro havas por fari kun la gvidado de la klano ?

- Vidante ke la sukcedado estis permesata, kaj ĉar oni petegis min paroli..., komencis Ŝer-Kano.

- Kiu petegis vin ? eligis Moŭgli. Ĉu ni estas ĉiuj ŝakaloj por flataĉi ĉi tiun buĉiston ? La gvidado de la klano koncernas la klanon mem.

Okazis kriegoj :

- Silentu, vi, vireto !

- Lasu lin paroli. Li observis nian leĝon !

Kaj, ĉe la fino, la plejaĝuloj de la klano tondris :

- Lasu paroli la Mortanta Lupo !

Kiam klanestro maltrafis sian predon, oni nomas lin la "Mortanta Lupo" tiel longe kiel restas al li por vivi, tio kio ne estas longedaŭra.

Akela dolore levis sian maljunan kapon, dolore :

- Libera Popolo, kaj ankaŭ vi, ŝakaloj de Ŝer-Kano, dum dek du sezonoj mi gvidis vin al ĉasado kaj revenigis vin, kaj dum ĉi tiu tuta tempo, neniu el vi estis enkapitata aŭ kripligita. Mi ĵus maltrafis mian predon. Vi scias kiel estis preparita ĉi tiun intrigon. Vi scias kiel vi kondukis min al kapreolo kiu estis ne lacepelita, por montri mian malfortecon. Tio estis lerte farita. Vi nun rajtas mortigi

min sur la Roko de la Konsilio. Tial mi demandas : Kiu venas por finmortigi la Solulon ? Ĉar tio estas mia rajto, laŭ la Leĝo de la Ĝangalo, ke vi venu unu post la alia.

Okazis longa silento : neniu lupo zorgis pri mortiga duelo kontraŭ la solulo. Tiam Ŝer-Kano roris :

- Ba ! Kion ni povas rilati al ĉi tiu maljuna sendentulo ? Li estas kondamnita al morto ! Estas la hometulo kiu tro longtempe vivis. Libera Popolo, li estis mia predo ekde la komenco. Donu lin al mi. Mi laciĝas pri ĉi tiu ŝerco de lupfantomo -. Li malkvietigis la ĝangalon dum dek sezonoj. Donu al mi la hometulon, aŭ mi ĉiam ĉasos sur tiu ĉi flanko, kaj ne donos al vi oston. Li estas viro, infano de homo, kaj, en la medolo de miaj ostoj, mi malamas lin !

Tiam pli ol duono de la klano kriegis :

- Viro ! Viro ! Kion homo povas rilati al ni ? Li foriru kun siaj samuloj.

- Estas tio ! Por turni kontraŭ ni la tutan popolon de la vilaĝoj ? kolerkriis Ŝer-Kano. Ne, ne, donu lin al mi. Li estas viro, kaj neniu el ni kapablas fikse rigardi lin en la okulojn.

Akela denove levis la kapon kaj diris :

- Li partoprenis en nia manĝo. Li dormis kun ni. Li alpelis la ĉasbestojn por ni. Li ne malobservis ununuran vorton de la Leĝo de la Ĝangalo !

- Kaj mi, mi elaĉetis lin koste de virbovo kiam li estis akceptata : virbovo, tio estas bagatelo; sed la honoro de Baghera eble valoras batalon ! diris Baghera per sia plej milda voĉo.

- Virbovo pagita antaŭ dek jaroj ! grumblis la ĉeestantaro. Kion gravas por ni ostoj kiuj havas dek jarojn !

- Kaj ia ĵuro ? Baghera diris, kuspante sian lipon sur siaj blankaj dentoj. Ha ! ni bone faras nomante vin la Liberan Popolon !

- Nenia hometulo devas kuri kun la Popolo de la

Ĝangalo ! roris Ŝer-Kano. Donu lin al mi !

- Li estas nia frato en ĉio, krom per sango, daŭrigis Akela; kaj vi mortigus lin ĉi tie !... Vere, mi tro longe vivis. Kelkaj el vi estas brutmanĝantoj, kaj mi aŭdis diri ke aliaj, obeante la lecionojn de Ŝer-Kano, en nigra nokto iras forrabi infanojn ĉe la sojloj de la vilaĝanoj. Do mi scias ke vi estas kovardaj kaj estas al malkuraĝuloj kiujn mi parolas. Certas ke mi devas morti, kaj mia vivo ne plu valoras multon; alie, mi oferus ĝin por tiu de la Hometulo. Sed, por savi la honoron de la klano... preskaŭ nenio, verŝajne, ke ade vivi sen estro vi forgesis... mi devontigas min, se vi lasas la Hometulon reiri ĉe la siajn, ne montri denton kiam la momento venos al mi por morti. Mi mortos sen defendi min. La klano tiel gajnos almenaŭ tri ekzistojn. Mi ne povas fari pli; sed se vi konsentas, mi povas ŝpari al vi honton mortigi fraton al kiu oni povas riproĉi neniun malbonon... fraton kiu estis postulita, elaĉetita, por esti akceptita en la klano laŭ la Leĝo de la Ĝangalo.

- Li estas viro !... Viro !... Viro ! tondris la ĉeestantaro.

Kaj la plejmulto el la lupoj ŝajnis grupiĝi ĉirkaŭ Ŝer-Kano, kies vosto komencis vipadi la flankojn.

- Nun la afero estas en viaj manoj ! Baghera diris al Moŭgli. Ni mem, ni povas nenion pli krom batali.

Moŭgli stariĝis kun la poto da braĝoj en la manoj. Poste li etendiĝis kaj oscedis spite al la Konsilio; sed li estis plena de kolero kaj de malĝojo, ĉar kiel lupoj kiujn ili estis, ili neniam diris al li kiom ili malamis lin.

- Aŭskultu ! Ne necesas kriaĉi kiel hundoj. Vi tro ofte diris al mi ĉi tiun vesperon ke mi estas viro (kaj tamen mi restus lupo kun vi, ĝis la fino de mia vivo); mi sentas la veron de viaj vortoj. Tial mi ne plu nomas vin miajn fratojn, sed sag⁽⁸⁾, kiel vi nomas viron... Tio kion vi faros, kaj tio kion vi ne

8 Tiu persa unusilabo signifa "hundo" kun malestima senco.

faros, ne estas al vi por diri tion. Estas mi ke tio koncernas, kaj por ke ni povu klarigi la aferon, mi ja, la viro, alportis ĉi tie iom da Ruĝa Floro kiun vi, hundoj, timas.

Li ĵetis la poton sur la grundon, kaj kelkaj ruĝaj karboj ekbruligis sekan muskotufon kiu flamis, dum la tuta Konsilio retropaŝis pro teruro antaŭ la saltoj de la flamo.

Moŭgli enŝovis la mortan branĉon en la fajron, ĝis kiam li vidis branĉetojn tordiĝi kaj kraketadi, poste li turnsvingis ĝin super sia kapo meze de la lupoj kiuj rampis pro teruro.

- Vi estas la mastro ! mallaŭte eligis Baghera. Savu Akelaⁿ de morto. Li ĉiam estis via amiko.

Akela, sovaĝa maljuna lupo, kiu neniam plorpetis indulgon dum sia vivo, ĵetis petegan rigardon al Moŭgli, staranta apud li, tute nuda, kun lia longa nigra hararo fluanta sur liaj ŝultroj, en la lumo de la flagranta branĉo. kiu dancigis kaj tremetigis la ombrojn.

- Bone ! diris Moŭgli, malrapide vagrigardante ĉirkaŭ li. Mi vidas ke vi estas hundoj. Mi forlasas vin por reiri al miaj samspeculoj... se vere ili estas miaj samspeculoj... La Ĝangalo estas fermita por mi, mi devas forgesi vian lingvon kaj vian kunestadon; sed mi estos pli kompatema ol vi : ĉar mi estis via frato en ĉio, krom per la sango, mi promesas, kiam mi estos viro inter homoj, ne perfidi vin ĉe ili, kiel vi perfidis min.

Li piedbatis la fajron, kaj la fajreroj flugis.

- Tute ne estos milito inter iu ajn el ni en la klano. Sed estas ŝuldo kiun necesas al mi pagi antaŭ ol foriri.

Li paŝis per grandaj paŝoj al la loko kie Ŝer-Kano estis kuŝinta, stupore palpebrumante antaŭ la flamoj, kaj ekkaptis lin per la vilo sub la mentono. Baghera sekvis en okazo de akcidento.

- Stariĝu, hundo ! kriis Moŭgli. Stariĝu kiam viro parolas, aŭ mi ekbruligu vian felon !

La oreloj de Ŝer-Kano platiĝis sur lia kapo, kaj li fermis

la okulojn ĉar la flagranta branĉo estis tute proksime al li.

- Ĉi tiu buĉisto de bruto diris ke li mortigus min meze de konsilio, ĉar li ne mortigis min kiam mi estis infaneto. Jen... kaj jen... kaj jen... kiel ni, viroj, ni batadas hundojn. Tremigu nur unu lipharon, Lungri, kaj mi enŝovas al vi la Ruĝan Floron en la gorĝon !

Li frapis Ŝer-Kanoⁿ per sia branĉo sur la kapon, dum la tigo ĝemis kaj ploretis en senhelpeco pro teruro.

- Pa ! brunbruligita kato de ĝangalo, foriru nun, sed memoru pri miaj vortoj : la unuan fojon kiam mi revenos al la Konsilio de la Roko, kiel decas ke homo venu, tio estos kun la haŭto de Ŝer-Kano sur mia kapo. Koncerne la ceteron, Akela estas libera vivi kiel plaĉos al li. Vi ne mortigos lin, ĉar mi ne volas tion. Mi cetere opinias ke vi ne pli longtempe restos ĉi tie lasante pendigi viajn langojn kvazaŭ vi estus famulo, anstataŭ esti hundoj kiujn mi ĉasas... do... foriru !

La fajro furioze brulis ĉe la fino de la branĉo, kaj Moŭgli frapis dekstren kaj maldekstren ĉirkaŭ la rondo, kaj la lupoj forfuĝis, blekante sub la fajreroj kiuj bruligis ilian felon. Fine, restis nur la maljuna Akela, Baghera kaj eble dek lupoj kiuj aprobis Moŭgli^{on}. Tiam Moŭgli komencis senti ion dolora funde de si mem, ion kiun li ne memoris esti iam sentante tion ĝis nun; li reakiris la spiron kaj plorsingultis, kaj larmoj fluis sur lia vizaĝo.

- Kio tio estas ? Kio tio estas ? li diris. Mi ne deziras forlasi la ĝangalon... kaj mi ne scias tion kion mi havas. Ĉu mi mortos, Baghera ?

- Ne, frateto. Estas nur larmoj, kiel tio okazas al homoj, diris Baghera. Nun mi vidas ke vi estas viro, kaj ne plu hometulo. Jes, la ĝangalo estas ja fermita al vi de nun... Lasu ilin flui, Moŭgli. Estas nur larmoj.

Tiam Moŭgli sidiĝis kaj ploris kvazaŭ lia koro baldaŭ rompiĝus; li neniam antaŭe ploris dum sia tuta vivo.

- Nun, li diris, mi tuj iros al la homoj. Sed unue necesas

ke mi adiaŭu mian patrinnon.

Kaj li iris al la kaverno kie ŝi loĝis kun patro lupo, kaj li ploris en ŝia felo, dum la aliaj idoj kompatinde plorblekis.

- Vi ne forgesos min, diris Moŭgli.

- Neniam, tiel longe kiel ni povos sekvi spuron ! diris la idoj. Venu ĉe la piedon de la monteto kiam vi estos viro, kaj ni parolos al vi; kaj ni nokte venos en la plugejojn por ludi kun vi.

- Revenu baldaŭ ! diris patro lupo. Ho saĝa eta Rano; revenu al ni baldaŭ, ĉar ni estas maljunaj, via patrino kaj mi.

- Revenu baldaŭ ! diris patrino lupino, mia eta tute nuda; ĉar, aŭskultu, infano de homo, mi amis vin pli ol mi iam amis la miajn.

- Mi certe revenos, diris Moŭgli; kaj kiam mi revenos, estos por etendi la haŭton de Ŝer-Kano sur la Roko de la Konsilio. Ne forgesu min ! Diru al ili en la ĝangalo neniam forgesi min !

La tagiĝo komencis eklumi, kiam Moŭgli malsupreniris la monteton, tute sola, survoje al ĉi tiuj misteraj estuloj kiujn oni nomas la homojn.

* * *

Ĉe la pinto de tagiĝo, akvocervo muĝis
Unu, du, poste pli !
Damao eksaltis, damao trasaltis
La arbitaron de la laĝeto kie trinkas cervoj.
Mi sola, batuante la arbaron, mi vidis tion,
Unu, du, poste pli !

Ĉe la pinto de tagiĝo, akvocervo muĝis
Unu, du, poste pli !
Per velurpiedeto, per velurpiedeto,
Iru alporti la novaĵon al la lupklano,
Serĉu, trovu, kaj poste plengorĝe ĉiuj !
Unu, du, poste pli !

Ĉe la pinto de tagiĝo, la klano blekegis
Unu, du, poste pli !
Piedo kiu, sen lasi spuron, fuĝas,
Okulo kiu povas travidi la nokton - la nokton !
Laŭtigu la voĉon ! Aŭskultu la bruon !
Unu, du, poste pli.

ĈASA KANTO DE LA KLANO DE SEONIO.

* * *

La ĉasado de Kao.

Ĝiaj makuloj estas la fiereco de la servalo, ĝiaj kornoj de la bubalo estas la honoro.

Estu klara, ĉar per la brilo de la felo oni konas la fortunon de la ĉasisto.

La akvocervo havu la kornon akra, kaj la virbovo la muskolojn fortaj,

Ne zorgu instrui tion al ni : ni tion sciis jam de dek jaroj.

Neniam molestu la idojn de aliaj, sed nomu ilin, Fratino kaj Frato.

Sendube ili estas malfortaj kaj mallertaj, sed eble la Ursino estas ilia patrino.

La junularo diras : "Kiu do valoras min !" pro la fiereco de sia unua ĉasaĵo;

Sed la Ĝangalo estas granda kaj la junulo estas malgranda. Li devas silenti kaj mediti.

Maksimoj de Baluo.

Ĉio kion ni tuj diros ĉi tie, okazis kelkan tempon antaŭ ol Moŭgli estis forpelita el la klano de lupoj de Seonio kaj venĝis al Ŝer-Kano, la tigro.

Estis dum la tagoj kiam Baluo instruis al li la Leĝon de la Ĝangalo. La granda bruna urso, maljuna kaj serioza, ĝojis pro lernanto kun tiel rapida inteligenteco; ĉar la junaj lupoj volas lerni pri la Leĝo de la Ĝangalo nur tion kio koncernas ilian klanon kaj ilian tribon, kaj forkuras tuj kiam ili kapablas ripeti la ĉasan refrenon : "Piedoj kiuj ne bruas; okuloj kiuj vidas en la ombro; oreloj streĉitaj en la vento de la fundo de kavernoj, kaj blankaj dentoj por mordi; tiu kiu surhavas ĉi tiujn signojn estas el niaj fratoj, krom Tabaki la Ŝakalo kaj la Hieno, kiujn ni malamas". Sed Moŭgli, kiel etulo de homo,

pri tio devis lerni multe pli.

Kelkfoje Baghera, la nigra pantero, venis vagante tra la ĝangalo por vidi tion kio fariĝis lia favorato, kaj restis ronronante kun la kapo kontraŭ arbo, dum Moŭgli recitis al Baluo la lecionon de la tago. La infano sciis grimpi preskaŭ tiel bone kiel li sciis naĝi, kaj naĝi preskaŭ tiel bone kiel li sciis kuri. Tial Baluo, la instruisto pri la Leĝo, lernigis al li la Leĝojn pri la Arbaroj kaj la Akvoj : distingi putrintan branĉon de sana branĉo; ĝentile paroli al sovaĝaj abeloj kiam li neatendite renkontis unu el iliaj svarmoj je kvindek futojn (+/-15m) super la grundo; la paroloj por diri al Mang, la Vesperto kiam li ĝenis lin en la branĉoj meze de la tago; kaj kiel averti la kolubrojn en marĉetoj antaŭ ol plonĝi meze de ili. En la ĝangalo, neniu ŝatas esti ĝenita, kaj oni ĉiam estas preta ataki la entrudiĝanton.

Krome, Moŭgli ankaŭ lernis la ĉaskrion de la fremdulo, kiun loĝanto de la Ĝangalo, ĉiufoje kiam li ĉasas ekster sia terpeco, devas laŭte ripeti ĝis kiam li estas ricevanta la respondon. Tradukita, ĝi signifas : "Donu al mi liberecon ĉasi ĉi tie, mi malsatas"; la respondo estas : "Ĉasu do pro via malsato, sed ne pro via plezuro".

Ĉio ĉi donos al vi ideon pri tio kion Moŭgli devis parkere lerni; kaj li multe laciĝis pro devi centfoje ripetadi la samon. Sed, kiel Baluo diris al Baghera, iam kiam Moŭgli ricevis punan piedbaton kaj foriris paŭti :

- Etulo de homo estas etulo de homo, kaj li devas lerni la tutan... vi bone aŭdas, la tutan Leĝon de la Ĝangalo.

- Jes, sed li estas tute malgranda, pensu pri tio, diris la nigra pantero, kiu estus trodorlotanta Moŭgli^{on} se li farus laŭ lia plaĉo. Kiel lia malgranda kapo kapablas gardi ĉiujn viajn longajn prelegojn ?

- Ĉu estas io en la ĝangalo tro malgranda por esti mortigita ? Ne. Tial mi instruas al li ĉion ĉi, kaj tial mi punbatas lin, ho tre milde, kiam li forgesas.

- Milde ! Vi estas sperta pri mildeco, maljuna Piedo el Fero, grumblis Baghera. Ĝi bele kontuzis al li la vizaĝon, hodiaŭ, via... mildeco. Fi al vi !

- Mi pli ŝatas vidi lin kontuzita de la kapo al la piedoj fare de mi kiu amas lin, ol vidi okazi al li domaĝo pro lia nescio, varmege respondis Baluo. Mi estas instruanta al li la Esencajn Vortojn de la ĝangalo celantajn protekti lin ĉe la birdoj, la Serpenta Popolo, kaj ĉe ĉiuj kiuj ĉasas sur kvar piedoj, krom tiuj de sia propra klano. Li nun povas, se li volas nur memori la vortojn, peti protekton al la tuta ĝangalo. Ĉu tio ne valoras malfortan punfrapon ?

- Nu, ĉiuokaze, atentu tute ne mortigi la hometulon. Li ne estas arbotrunko bona por akriĝi viajn eluzitajn ungegojn. Sed kiuj estas ĉi tiuj Esencaj Vortoj ? Mi ŝajne estas plivole farita por konsenti helpon ol peti ĝin. - Baghera etendis unu el siaj kruroj por admiri de ĝi la ungegojn kies blua ŝtalo akriĝis ĉe la fino kiel frida ĉizilo⁽⁹⁾. - Tamen mi ŝatus scii.

- Mi tuj alvokos Moŭgli^{on} por ke li diru ilin al vi... se li estas bonvola. Venu, Frateto !

- Mia kapo sonas kiel arbo por abeloj, diris malafabla voĉeto super iliaj kapoj.

Kaj Moŭgli lasis sin gliti laŭlonge de arbotrunko. Li havis koleran mienon, kaj estis kun indigno ke, ĉe la momento tuŝi la grundon, li aldonis :

- Mi venas por Baghera kaj ne por vi, maljuna Baluo !

- Tio estas egala al mi, diris Baluo ofendata kaj afliktata. Ripetu do al Baghera la Esencajn Vortojn de la ĝangalo, kiujn mi hodiaŭ lernigis al vi.

- La Esencaj Vortoj por kiu popolo ? demandis Moŭgli, ravata sin valorigi. La ĝangalo havas multajn lingvojn, kaj mi konas ĉiujn el ili.

9 Ĉizilo uzita por tranĉi fridan ferpecon, oston ks.

- Vi scias ion, sed ne multon... Vidu, Baghera, ili neniam dankas sian majstron. Neniam la plej malgrava lupido venis danki la maljunan Baluoⁿ pro siaj lecionoj ?... Diru la vorton por la Ĉasantaj Popoloj, tiam... fama scienculo.

- Ni estas el la sama sango, vi kaj mi, diris Moŭgli donante al la vortoj la ursan akĉenton kies ĉiuj ĉasistoj uzas.

- Bone... Nun por la birdoj.

Moŭgli ripetis, aldonante la blekon de la vulturo ĉe la fino de la sentenco.

- Nun por la Serpenta Popolo, diris Baghera.

La respondo estis tute nepriskribebla fajfo, post tio Moŭgli batis sin per la piedo sur la postaĵo, brufrapis la manojn por mem aplaŭdi sin, kaj eksaltis sur la dorson de Baghera, kie li sidiĝis por tiamaniere ludi tamburon per siaj kalkanoj sur la brila felo, kaj fari al Baluo la plej malbelajn grimacojn kiujn li kapablis imagi.

- Jen... jen ! Tio vere valoris malgravan punbaton, tenere diris la bruna urso. Iam vi povos memori pri mi.

Poste li turnis sin por diri al Baghera kiel la infano lernis la Esencajn Vortojn de Hati, la sovaĝa elefanto kiu scias ĉion kiu rilatas al tiuj aferoj, kaj kiel Hati kondukis Moŭgli^{on} al marĉeto por sciiĝi de kolubro la vorton de Serpentoj kiujn Baluo ne kapablis prononci; kaj kiel Moŭgli nun estis sufiĉe ŝirmita kontraŭ ĉiuj eblaj akcidentoj de la Ĝangalo, ĉar nek serpento, nek birdo, nek kvarpieda besto farus malbonon al li.

- Neniu do estas por timi, konkludis Baluo karesante kun orgojlo sian dikan felplenan ventron.

- Escepte pri tiuj de sia propra tribo, mallaŭte diris Baghera.

Poste, laŭte, alparolante al Moŭgli :

- Atentigu pri miaj ripoj, Frateto; kio okazas al vi por tiel danci ?

Moŭgli, volante esti aŭdita, ambaŭmane tiris per la felo

sur la ŝultro de Baghera kaj donis al li fortajn piedbatojn. Kiam finfine ili ambaŭ streĉis la orelojn, li plenpulme kriis :

- Ankaŭ mi havos tribon por mi, tribon por gvidi tra la branĉoj dum la tuta tago.

- Kiu estas ĉi tiu nova frenezaĵo, eta konstruisto de fantazioj ? diris Baghera.

- Jes, kaj ĵeti branĉojn kaj fekbulojn al maljuna Baluo, daŭrigis Moŭgli. Ili promesis tion al mi. Ha !

- Ŭoof !

La dika mano de Baluo ĵetis Moŭgli^{on} malsupren de la dorso de Baghera, kaj la infano, kiu restis etendita inter la dikaj antaŭaj kruroj, povis vidi ke la urso estis kolera.

- Moŭgli, diris Baluo, vi parolis al la Bandar-Log⁽¹⁰⁾, ... la Simia Popolo.

Moŭgli rigardis Bagheraⁿ por vidi ĉu la pantero ankaŭ estis kolera. la okuloj de Baghera estis tiel malmildaj kiel ŝtonoj el jado.

- Vi iris ĉe la Simia Popolo, ... la grizaj simioj... la popolo sen leĝo... la manĝantoj de ĉio. Estas granda honto.

- Kiam Baluo dolorigis mian kapon, diris Moŭgli (li ankoraŭ estis sur la dorso), mi foriris, kaj la grizaj simioj malsupreniris el la arboj por kompati al mi. Neniu alia zorgis pri mi.

Li komencis ploreti.

- La kompatado de la Simia Popolo ! grumblis Baluo. La kvieto de la torento de la monto ! La malvarmeteco de la suno de somero !... Kaj do, hometulo ?

- Kaj do... tiam ili donis al mi nuksojn kaj multe da bonaj aferoj por manĝi, kaj ili... ili kunportis min en siaj brakoj ĉe la supron de la arboj, por diri al mi ke mi estas ilia frato laŭ la sango, krom ke mi ne havis voston, kaj ke iam mi estos ilia estro.

10 Vorto el la hindia, kun la signifo de "Simia Popolo".

- Ili ne havas estrojn, diris Baghera. Ili mensogas, ili ĉiam mensogis.

- Ili estis tre bonaj, kaj petegis min reveni. Kial oni neniam kondukis min ĉe Simian Popolon ? Ili staras sur la piedoj kiel mi. Ili ne frapas per dikaj manoj. Ili ludas dum la tuta tago... Lasu min supreniri !... Fia Baluo, lasu min supreniri. Mi volas reiri ludi kun ili.

- Aŭskultu, hometulo, diris la Urso, kaj lia voĉo muĝis kiel tondro en la varma nokto. Mi instruis al vi la tutan Leĝon de la Ĝangalo por ĉiuj popoloj de la ĝangalo... krom la Simia Popolo kiu loĝas en la arboj. Ili ne havas leĝon. Ili ne havas hejmlandon. Ili ne havas lingvon por ili, sed ili uzas ŝtelitajn vortojn, hazarde aŭdatajn kiam ili aŭskultas kaj spionas nin, tie supre, embuske en la branĉoj. Ilia vojo ne estas nia. Ili ne havas estrojn. Ili ne havas memoron. Ili fanfaronas kaj babilas, kaj asertas sin gravan popolon pretan por fari gravajn aferojn en la ĝangalo; sed la falo de unu nukso sufiĉas por delogi iliajn ideojn, ili ridas, kaj ĉio estas forgesita. Ni ja en la ĝangalo havas nenian rilaton kun ili. Ni ne trinkas tie kie trinkas la simioj; ni ne iras tie kien iras la simioj; ni ne ĉasas tie kie ili ĉasas; ni ne mortas tie kie ili mortas. Ĉu vi iam, ĝis ĉi tiu tago, aŭdis paroli pri la Bandar-Log ?

- Ne, diris Moŭgli mallaŭte, ĉar la silento estis tre alta en la arbarego nun kiam Baluo finis paroli.

- La popolo de la ĝangalo elpelis ilian nomon el sia buŝo kaj el sia penso. Ili estas multnombraj, malicaj, malpuraj, senhontaj, kaj ili deziras, tiom kiom ili kapablas fiksi deziron, ke la popolo de la ĝangalo atentu ilin... Sed ni tute ne atentis ilin, eĉ kiam ili ĵetas al ni nuksoj kaj rubaĵojn sur la kapo.

Li apenaŭ diris tion ke hajlo da nuksoj kaj branĉetoj falegis tra la foliaro; kaj oni povis aŭdi tusojn, blekadojn, kaj kolerajn saltojn, altege en la branĉoj.

- La Simia Popolo estas malpermesita, deklaris Baluo, malpermesita ĉe la popolo de la ĝangalo. Memoru tion.

- Malpermesita, ripetis Baghera; sed mi tamen pensas ke Baluo devintus antaŭsciigi vin pri ili...

- Mi... mi ? Kiel mi konjektintus ke li irus ludi kun tia rubaĵo... La Simia Popolo ! Pu !

Nova hajlo falis sur iliajn kapojn kaj ili trote foriris, kuntirante Moŭgli^{on} kun ili.

Tio kion Baluo diris pri la simioj estis perfekte vera. Ili apartenas al la suproj de la arboj; kaj ĉar la bestoj tre malofte rigardas supren, la okazo apenaŭ prezentiĝus al ili kaj la ĝangala popolo renkontiĝi; sed ĉiufoje kiam ili trovis malsanan lupon, aŭ vunditan tigron, aŭ urson, la simioj turmentis ĝin, kaj ili kutimis ĵeti bastonojn kaj nuksojn al ia ajn besto, por ridi kaj esperante ke oni rimarkus ilin. Poste ili plengorĝe blekis kaj kriegis kantojn tute sen senco; kaj ili invitis la ĝangalan popolon grimpi la arbojn por lukti kun ili, aŭ sen kialo, ekĵetis sin en furiozaj bataloj, unu kontraŭ la aliaj, zorgante lasi la mortintajn simiojn tie kie la ĝangala popolo povus vidi ilin. Ili ĉiam estas havonta estron, leĝojn kaj proprajn kutimojn, sed ili neniam faris tion, ĉar ilia memoro estis nekapabla memorteni ion ajn de iu tago al la alia; tial ili aranĝis la aferojn per sentenco, "Tio kion la Bandar-Log nun pensas, la ĝangalo poste pensos tion", tio kio estis por ili granda konsoliĝo. Neniu besto povis atingi ilin, sed, aliflanke, neniu besto atentis pri ili, kaj estas pro tio ke ili estis tiel ĉarmitaj vidi Moŭgli^{on} veni ludi kun ili, kaj aŭdi kiom Baluo estis iritata de tio.

Ili ne intencis fari pli - la Bandar-Log neniam havas intencon - sed unu el ili imagis, kaj la ideo ŝajnis al li bonega, diri al la aliaj ke Moŭgli estus utila persono por posedi en la tribo, ĉar li sciis interplekti branĉojn laŭ ŝirmo kontraŭ la vento; kaj ke, se ili ekkaptus lin, ili povus devigi lin instrui ilin. Nature Moŭgli, kiel infano de hakisto, heredis ĉiajn

instinktojn, kaj ofte amuziĝis fabriki malgrandajn kabanojn per falintaj branĉoj, sen scii kial; kaj la Simia Popolo, gvatante en la arboj, konsideris ĉi tiun ludon kiel la plej mirindan aferon. Ĉi-foje, ili diris, ili estis reale havontaj estron kaj fariĝonta la plej saĝa popolo de la ĝangalo... tiel saĝa ke ili estus por ĉiuj aliaj celo de rimarkigo kaj de envio. Tial ili sekvis Baluoⁿ, Bagheraⁿ kaj Moŭgli^{on} tra la ĝangalo, tre silente, ĝis kiam venis la horo de la tagmeza dormeto. Tiam Moŭgli, oni ne povas pli honta pri si mem, endormiĝis inter la pantero kaj la urso, decida havi nenion pli komune kun la Simia Popolo.

La unua afero kiun li poste sentis, estis impresio de manoj sur siaj kruroj kaj siaj brakoj... malgrandaj malglataj kaj fortaj manoj... poste de branĉoj vipetantaj la vizaĝon; kaj lia rigardo enprofundiĝis tra la movado de la branĉaro, dum Baluo vekis la ĝangalon per siaj obtuzaj krioj kaj dum Baghera saltegis laŭ la trunko kun ĉiuj liaj dentegoj malŝirmitaj. La Bandar-log triumfe blekegis kaj baraktis por kiu plej rapide atingus la suprajn branĉojn kie Baghera timus sekvi ilin, kriante :

- Ŝi rimarkis nin ! Baghera rimarkis nin ! La tuta popolo de la ĝangalo admiras nin pro nia lerteco kaj nia ruzeco !

Tiam ili komencis sian fuĝon, kaj la fuĝo de la Simia Popolo tra la medio de la arboj estas io kiun neniu iam priskribos. Ili havas tie siajn regulajn vojojn kaj siajn ŝparvojojn, supren- kaj malsupren-irejojn, ĉiuj aranĝitaj je kvindek, sesdek aŭ cent futoj (15/18/30m) super grundo, kaj tra kiuj ili vojaĝas, eĉ nokte se necese. Du el la plej fortaj simioj estis kaptintaj Moŭgli^{on} sub la brakoj kaj flugis tra la suproj de la arboj per saltegoj de dudek futoj (6m) ĉiufoje. Se ili estus solaj, ili progresintu duoble pli rapide, sed la pezo de la infano malrapidigis ilin. Tute malkomforta kaj kaptita de kapturino ke li sentis sin, Moŭgli ne povis reteni sin ĝui pro ĉi tiu furioza kurado; sed li estis timigata fulme

videti la grundon tiel for sub li; kaj la teruraj ekbatoj kaj skuoj, fine de ĉiu salto kiu svingis lin tra la malpleno, *metis al li la koron inter la dentoj*⁽¹¹⁾. Lia akompanantaro sagis kun li al supro de arbo ĝis kiam li sentis la ekstremajn branĉetojn kraketi kaj fleksiĝi sub ilia pezo; poste, kun gorga *hej*, ili sin ĵetis, desegnis en la aero malsupreniran kurbon kaj falis pendigante sin per la manoj kaj per la piedoj ĉe la malaltajn branĉojn de la najbara arbo.

Foje, li malkovris mejlojn kaj mejlojn da trankvila verda ĝangalo, same kiel homo ĉe la supro de masto povas de supre rigardi trans mejlojn en la horizonton de la maro; poste branĉoj kaj folioj vipis al li la vizaĝon, kaj tuj poste, liaj du gardistoj kaj li malsupreniris preskaŭ ĝis denove tuŝi la teron.

Tiel estas, helpe de saltegoj, de bruegoj, de penadoj, de blekoj, ke la tute kompleta tribo de la Bandar-Log^{oj} sagis tra la vojoj de la arboj, kun Moŭgli sia kaptito.

Unue, li timis ke oni lasus lin fali; poste li sentis koleron pliiĝi. Sed li sciis la senutilecon de la lukto, kaj li ekpensis. La unua farenda afero estis averti Baluoⁿ kaj Bagheraⁿ, ĉar pro tio kiel iris la simioj, li sciis ke siaj amikoj estus rapide postlasitaj. Rigardi malsupren, tio estis senutila, ĉar li povis vidi nur la supron de la branĉoj; tial li direktis siajn okulojn en la aeron kaj vidis, malproksime en la bluo, Ŝil la Vulturon ŝvebante kaj kirliĝante super la ĝangalo kiun li esploris atendente mortontan aferon. Ŝil ekrimarkis ke la simioj kunportis li ne sciis kion, kaj lasis sin falis dum kelkaj centoj da futoj (*100 futoj=30m*) por vidi ĉu ilia portaĵo estas bona por manĝi. Li fajfis pro surprizo kiam li vidis Moŭgli^{on} trenata ĉe la supro de arbo kaj aŭdis lin ĵeti la alvokon de la vulturo :

- Ni estas el la sama sango, vi kaj mi.

La ondoj de branĉoj refermiĝis super la infano; sed Ŝil,

11 Franca esprimo kun la signifo de "naŭzis lin".

per flugilfrapo, direktiĝis super la sekvan arbon, sufiĉe akurate por vidi la etan brunan vizaĝon denove remalsupreniri :

- Notu mian lokon, kriis Moŭgli. Sciigu Baluoⁿ de la tribo de Seonio, kaj Bagheraⁿ de la Konsilio de la Roko.

- Por kies nomo, frato ?

Ŝil neniam antaŭe vidis Moŭgli^{on}, kvankam kompreneble li aŭdis paroli pri li.

- Por Moŭgli, la ranon... la hometulon... ili nomigas min !... Notu mian lo... kon !

La lastaj vortoj estis plejlaŭte kriitaj en la momento kiam li troviĝis svingata en la aero; sed Ŝil signis konsenton, kaj levigis en orta linio ĝis kiam li ŝajnis ne pli dika ol sablero; tiam li ŝvebante restis por sekvi per la teleskopo de siaj okuloj la sulkon en la suproj, dum la eskorto de Moŭgli kirle trairis ĝin.

- Ili neniam iras for, li diris kun eta rido, ili neniam faras tion kion ili planis fari. Ĉiam pretaj, la Bandar-Log^{oj}, por taŭzeti la novaĵojn. Ĉi-foje, se mi havas bonan okulon, ili ŝovis la nazon en io kiu klopodigos ilin, ĉar Baluo ne estas kokido, kaj Baghera povas, mi scias tion, mortigi pli bone ol kaproj.

Post tio, li sin lulis sur siaj flugiloj, kun la kruroj tiritaj sub li, kaj atendis.

Dum tiu tempo, Baluo kaj Baghera turmentadis sin pro kolerego kaj ĉagreno. Baghera grimpis tiel kiel neniam en lia vivo li grimpis, sed la maldikaj branĉoj rompiĝis sub lia pezo, kaj li glitis ĝis malsupren, kun plene da ŝelo en la ungegoj.

- Kial vi ne antaŭsciigis la hometulon ? li roris al la oreloj de la kompatinda Baluo kiu ekestis vojiranta, per sia peza troto, kun la espero reatingi la simiojn. Kia utileco mortigi lin per batoj, se vi ne antaŭsciigis lin ?

- Rapide !... Ha, rapide !... Ni... povas ankoraŭ reatingi ilin ! anhelis Baluo.

- Per tiu paŝado !... Li ne lacepelus vunditan bovinon. Instruisto de la leĝo... frapanto de infanoj... unu mejlo por tiel ruliĝi kaj tangi, kaj vi eksplodus. Sidigu vin trankvile kaj pripensu ! Planu; ne estas la momento por persekuti ilin. Ili eble faligintus lin, se ni sekvus ilin tro proksime.

- Arrula ! Ŭu !... Ili eble jam lasis lin fali, lacaj pro kunporti lin. Kiu povas fidi al Bandar-Log ?... Ke oni metu al mi mortintajn vespertojn sur la kapon !... Ke oni donu al mi nigrajn ostojn por rongi !... Ke oni rulu min en la abelujon de sovaĝaj abeloj por ke mi tie estu mortpikita, kaj ke oni enterigu min kun la hieno, ĉar mi estas la plej mizera el la ursoj !... Arrulala ! Ŭakoa !... Ho Moŭgli, Moŭgli ! Kial mi ne avertis vin kontraŭ la Simia Popolo anstataŭ rompi al li la kapon ? Kiu scias nun ĉu miaj batoj ne forflugigis el lia memoro la lecionon de la tago, kaj ĉu li ne troviĝos sola en la ĝangalo sen la Esencaj Vortoj ?

Baluo prenis al si la kapon inter la kruroj kaj komencis ruliĝi dekstren kaj maldekstren, ĝemante.

- Ĉiaokaze, li tre ĝuste recitis al mi ĉiujn vortojn antaŭ nelonge, Baghera senpacience diris. Baluo, vi havas nek memoron nek respekton al vi mem. Kion pensus la ĝangalo se mi, la nigra pantero, ruliĝus kiel Sahi, la histriko, por komenci bleki.

- Mi ja fajfas pri tio kion pensas la ĝangalo ! Li eble estas morta en la horo kiu estas.

- Krom se ili lasis lin fali de la branĉoj kiel tempopasigo, se ili mortigis lin pro pigreco, aŭ ĝis kiam ili faros tion, mi ne timas pri la hometulo. Li estas saĝa, li scias iojn, kaj super ĉio, li havas tiujn okulojn kiujn timas la ĝangala popolo. Sed, kaj tio estas granda malfeliĉo, li estas sub la povo de la Bandar-Log; kaj ĉar ili vivas en la arboj, ili antaŭtimas neniun inter ni.

Baghera penseme lekis unu el siaj antaŭaj kruroj.

- Maljuna stultulo kiun mi estas ! Mallertulo kun brunaj

haroj, fama prifosanto de radikoj, diris Baluo, subite sin malvolvante; estas vera tio kion diras Hati, la sovaĝa elefanto : al ĉiu sia timo. Kaj ili, la Bandar-Log, timas Kaoⁿ, la roka serpento. Li grimpas tiel bone kiel ili. Li vespere ŝtelas la junajn simiojn. Nur la murmuro de lia nomo frostigas ilin ĝis la fino de iliaj malbonaj vostoj. Ni iru trovi Kaoⁿ.

- Kion li faros por ni ? Li ne estas el nia tribo, ĉar li estas sen piedoj, kaj... li havas la okulojn la plej pereigajn, diris Baghera.

- Li estas tiel maljuna kiel ruza. Super ĉio, li ĉiam malsatas, diris Baluo esperplena. Promesu al li multajn kaprojn.

- Li dormas plenan monaton post ĉiu manĝo. Eblas ke li nun dormas, kaj se li estus veka, li eble preferus mem mortigi siajn kaprojn.

Baghera kiu ne sciis multe pri Kao, nature malfidis.

- Tiukaze, per ni du, spertaj ĉasistoj, ni povus prudentigi lin.

Post tio, Baluo frotis la rufiĝintan felon de sia bruna ŝultro kontraŭ la pantero kaj ili kune foriris al la serĉado de Kao, la Roka Pitono.

Ili trovis lin kuŝanta sur ĝibaĵo de roko kiun varmigis la tagmeza suno, admiranta la belegecon de sia nova vestaĵo, ĉar li ĵus dediĉis dek tagojn de izoleco por ŝanĝi la haŭton, kaj nun li aperis en sia tuta pompo : lia dika platnaza kapo metita samnivele kun la grundo, la tridek-futa (+/-9m) longo de lia korpo, tordita en nodoj kaj sensaciaj kurboj, kaj lekanta al si la lipojn je la penso de la venonta tagmanĝo.

- Li ne manĝis, diris Baluo, grumblante pro kvietigo ĉe la vido de la pompa vestaĵo marmorumita de bruno kaj flavo. Atentu, Baghera ! Li ĉiam estas iom miopa post esti ŝanĝinta la haŭton, kaj tre rapida por ataki.

Kao ne estis venena serpento, fakte li prefere malestimis venenajn serpentojn, kiujn li konsideras kiel

senkuraĝaj, sed lia forto kuŝas en lia stringo, kaj tuj kiam li ĉirkaŭvolvis siajn grandegajn ringojn ĉirkaŭ kiu ajn, nenio pli estas farenda.

- Bonan ĉasadon ! kriis Baluo, sidiĝante sur siaj koksoj.

Kiel ĉiuj serpentoj el sia speco, Kao estis preskaŭ surda, kaj unuatempe li ne aŭdis la alvokon. Tamen li stariĝis, preta por ĉiu ajn okazaĵo, kun la kapo mallevita :

- Bonan ĉasadon al ni ĉiuj, li fine respondis. Ho ! Ho ! Baluo, kion vi faras ĉi tie ?... Bonan ĉasadon, Baghera... Unu el ni almenaŭ bezonas nutraĝon. Ĉu ni aŭdis paroli pri vivanta ĉasbesto ? Iu cervino eble, aŭ eĉ iu juna kapreolo ? Mi estas tiel malplena kiel seka puto.

- Ni estas ĉasantaj, senzorge diris Baluo.

Li sciis ke oni ne devas urĝigi Kaoⁿ. Li estas tro dika.

- Permesu al mi kuniĝi kun vi, diris Kao. Iu plia aŭ malplia piedbato estas nenio por vi, Baghera, nek por vi, Baluo; dum por mi... mi devas atendi kaj atendi dum tagoj en pado, kaj grimpi dum duonokto por la malgrava hazardo de juna simio. Psŝaŭ ! La arboj ne estas tio kio ili estis dum mia junaĝo. Ĉiuj putraj frondoj kaj sekaj branĉoj.

- Povas esti ke via granda pezo havas iom da respondeco en tio, rebatis Baluo.

- Jes, mi havas bonaspektan longecon, bonaspektan longecon, diris Kao kun iomete da orgojlo. Sed tamen, estas la kulpo de ĉi tiu nova arbaro. Mi estis tute preta fali ĉe mia lasta ĉasakiro... vere tute preta... kaj glitante, ĉar mia vosto ne preme ĉirkaŭvolvis la arbon, mi vekis la Bandar-Log^{ojn} kiu donis al mi la plej malbelajn nomojn.

- Senkrurulo, flava lumbriko, diris Baghera en siaj lipharoj, kvazaŭ li provis rememori.

- Sssss ! Ĉu ili tiel nomis min ? Kao demandis.

- Estis io simila kiun ili blekaĉis al ni je la lasta luno, sed ni ne atentis pri tio. Ili diras ion ajn... eĉ, ekzemple, ke vi perdis viajn dentojn, kaj ke vi ne kuraĝas alfronti ion pli

dikan ol kapridon, ĉar (ili vere havas nenian diskretecon, tiuj Bandar-Log)... ĉar vi timas la kornojn de la virkaproj, dolĉege daŭrigis Baghera.

Nu, serpento, kaj ĉefe maljuna singarda pitono el la speco de Kao, malofte montras ke li koleras, sed Baluo kaj Baghera povis vidi la dikajn englutajn muskolojn ondadi kaj ŝveliĝi ambaŭflanke de lia gorĝo.

- La Bandar-Log ŝanĝis terenon, li trankvile diris. Kiam mi supreniris ĉi tien sub la suno, hodiaŭ, mi aŭdis iliajn huadojn inter la suproj de la arboj.

- Estas... estas la Bandar-Log^{oj} kiujn ni sekvas ĉimomente..., diris Baluo.

Sed la vortoj sufokiĝis en lia gorĝo, ĉar estis la unua fojo, laŭ lia memoro, ke ĝangala besto konfesis interesiĝi pri la faroj de la simioj.

- Sendube do ke tute ne estas eta afero kiu gvidas du tiajn ĉasistojn... ĉefojn en ilian propran ĝangalon, mi certas pri tio..., sur la spuro de la Bandar-Log^{oj}, ĝentile respondis Kao, ŝvelante pro scivolemo.

- Verdire, komencis Baluo, mi estas nenio pli ol la maljuna kaj kelkfoje neantaŭzorgema Instruisto de Leĝo de la lupidoj de Seonio, kaj Baghera ĉi tie...

- Estas Baghera, diris la nigra pantero.

Kaj liaj makzeloj refermiĝis kun seka bruo, ĉar la humileco ne estis lia kutimo.

- Jen la afero, Kao : tiuj ŝtelistoj de nuksoj kaj plukistoj de palmfruktoj kunprenis nian hometulon, pri kiu vi eble aŭdis paroli.

- Mi aŭdis rakonti de Sahi (liaj pinglegoj tro memfidigas lin) ke speco de homo eniris en iu klano de lupoj, sed mi ne kredis lin. Sahi estas plena de rakontoj duone aŭditaj kaj tre malbone ripetitaj.

- Nu, estas vere. Temas pri etulo de homo kiel ni neniam vidis tion, diris Baluo. La plej bona, la plej saĝa kaj la

plej aŭdaca el la hometuloj... mia propra lernanto, kiu famigos la nomon de Baluo tra la tutaj ĝangaloj; kaj plie, mi... ni... amas lin, Kao.

- Ts ! Ts ! diris Kao svingante sian kapon laŭ naveda movo. Ankaŭ mi konis tenerecon. Estas rakontoj kiujn mi povus diri...

- Kiujn necesus klaran nokton kaj plenan stomakon por digne laŭdi, vigne diris Baghera. Nia hometulo estas en la horo kiu estas, inter la manoj de la Bandar-Log^{oj}, kaj ni scias ke, el la tuta popolo de la ĝangalo, Kao estas la sola kiun ili timegas.

- Mi estas la sola kiun ili timegas... Ili vere pravas, diris Kao. Babilado, frenezaĵo, senceleco... Senceleco, frenezaĵo kaj babilado ! Jen la simioj. Sed, pri homa afero, estas malbona sorto fali inter iliajn manojn. Ili rapide laciĝas pro la nuksoj kiujn ili plukas, kaj forĵetas ilin. Ili kuntiras branĉon duontage, kun intenco fari per ĝi grandajn aferojn, kaj subite ili duone rompas ĝin. Ĉi tiu hometo ne estas enviinda. Ili ankaŭ nomis min Flavan Fiŝon, ĉu ne ?

- Lum... Lum... Lumbrikon, diris Baghera... kaj multajn aliajn aferojn kiujn mi nun ne povas ripeti, pro diskreteco.

- Ili bezonas ke oni instruu ilin paroli pri ilia mastro, Aaa-ssh ! Ili bezonas ke oni helpu ilian mankon de memoro. Ĉimomente, kien ili iris kun la etulo ?

- Nur la ĝangalo scias tion. Al la sunsubiro, mi kredas, diris Baluo. Ni pensis ke vi scius, Kao.

- Mi ? Kiel ?... Mi kaptas ilin kiam ili venas sur mia vojo, sed mi ne ĉasas la Bandar-Log^{ojn}, ne pli ol la ranojn, aŭ la verdan ŝaŭmon sur la akvotruoj... koncerne tion. Hsss !

- Ĉi tie, supren ! Supren, supren ! Hiiilo ! Hiiilo ! Hiiilo, supren rigardu, Baluo de la Klano de la Lupoj de Seonio.

Baluo suprenlevis la okulojn por vidi de kie venis la voĉo, kaj Ŝil la Vulturo aperis. Li malsupreniris balaante la aeron, kaj la suno brilis sur la levitaj franĝoj de siaj flugiloj.

Preskaŭ estis la horo de la enlitiĝo por Ŝil, sed li iradis tien kaj tien en la tuta vasteco de la ĝangalo serĉante la Urson, sen povi malkovri lin sub la densa foliaro.

- Kio tio estas ? diris Baluo.

- Mi vidis Moŭgli^{on} meze de la Bandar-Log^{oj}. Li petis min diri tion al vi. Mi atentis. La Bandar-Log^{oj} kunportis lin trans la riveron, ĉe la urbo de la simioj... en la malvarmaj Kavernoj. Eblas ke ili restu tie dum unu nokto, dek noktoj, unu horo.

Mi diris al la vespertoj gvati ilin dum la malhelaj horoj. Jen mia mesaĝo. Bonan ĉasadon, vi ĉiuj malsupre !

- Plenan gorĝon kaj profundan dormon, Ŝil, kriis Baghera. Mi memoros pri vi dum mia sekvanta ĉasakiro, kaj apartigos la kapon por vi sola... ho la plej bona el la vulturoj !

- Ne indas... Ne indas... La infano havis la Esencan Vorton. Mi povis fari nenion malpli.

Kaj Ŝil resupreniris desegnante ringo por reatingi sian neston.

- Li ne forgesis uzi lian lingvon, diris Baluo kun eta rido de orgojlo. Tiel juna kaj rememori pri la Esenca Vorto eĉ de la birdoj dum oni estas trenataj tra la arboj !

- Oni enkapigis ĝin sufiĉe firme, diris Baghera. Sed mi fieras pri li... Kaj nun necesas al ni iri al la Malvarmaj Kavernoj.

Ili ĉiuj sciis kie troviĝis la loko, sed malmultaj inter la ĝangala popolo iam iris tien. Tio kion ili fakte nomis la Malvarmaj Kavernoj estis malnova forlasita urbo, perdita kaj kaŝita en la ĝangalo; kaj la bestoj malofte vizitadas lokon kiun la homoj jam vizitis. Okazas ja al la aproj fari tion, sed neniam la triboj kiuj ĉasas. Plie, la simioj loĝis tie, tiom kiom ili povas pasi por loĝi ie, kaj neniu besto kiu sin respektas, estus alproksimiĝanta ĝin videble de ili, krom en tempoj de sekeco, kiam la cisterno kaj akvujoj duone difektitaj ankoraŭ enhavis iom da akvo.

- Estas duonnokta vojaĝo,... plenrapide, diris Baghera.

Kaj Baluo ekaspektis zorgoplena :

- Mi iros tiel rapide kiel mi kapablos, li maltrankvile diris.

- Ni ne riskos atendi vin. Sekvu nin, Baluo. Necesas al ni kuri per rapidmova piedo... Kao kaj mi.

- Kun aŭ sen piedoj, mi paŝos samrange kun vi sur viaj kvar, seke diris Kao.

Baluo klopodis hasti, sed li devis sidiĝi anhelanta, tial ili lasis lin veni pli poste, kaj Baghera urĝis al la celo sian rapidan galopon de pantero. Kao diris nenion, sed kian ajn penon kiun faris Baghera, la grandega Roka Pitono iris samnivele. Ĉe la transiro de monta torento, Baghera antaŭiĝis ĉar li transpasis ĝin per saltego dum Kao transnaĝis, kun la kapo kaj du futoj (+/-60cm) de kolo ekster la akvo, sed sur ebena tereno, Kao regajnis la distancon.

- Per la rompita Seruro kiu liberigis min, diris Baghera, kiam krepusko estis, vi ne estas sengrava paŝanto !

- Mi malsatas, diris Kao. Krome ili nomis min punktitan ranon.

- Lum... Lumbrikon,... kaj flava, plie.

- Estas tutsame. Nu.

Kaj Kao ŝajnis mem ŝutiĝi sur la grundo kie liaj senmankaj okuloj elektis la plej mallongan vojon kiun li kapablu sekvi.

En la malvarmaj Kavernoj, Simia Popolo tute ne pensis pri la amikoj de Moŭgli. Ili kunportis la infanon en la Perditan Urbon, kaj trovis sin nun tre kontentaj pri si mem. Moŭgli neniam antaŭe vidis hinduan urbon, kaj kvankam tiu ĉi estis nur apenaŭ amaso da ruinoj, la spektaklo ŝajnis al li tiom belega kiom miriga. Iu reĝo konstruis ĝin en la iama tempo sur malgranda monteto. Oni povis ankoraŭ distingi la ŝoseojn el ŝtonoj kiuj kondukis al la ruinigitaj pordoj, kie lastaj pecoj el ligno pendis de la pordhokoj morditaj de rusto. Arboj elkreskis inter la ŝtonoj de la muroj, kreneloj

estis falintaj kaj pecetiĝis sur la grundo, sovaĝaj lianoj, ĉe la fenestroj de la turoj, balanciĝis laŭ dikaj tufoj laŭlonge de la muroj.

Granda palaco sen tegmento kronis la monteton, la marmoro de la honoraj kortoj kaj de la fontanoj fendiĝis, tute makulita per ruĝo kaj verdo, kaj la rulŝtonoj mem de la kortoj, kie antaŭ nelonge loĝis la elefantoj de la reĝo, estis levitaj kaj deŝovitaj de la herboj kaj la junaj arboj. De la palaco, oni povis vidi la sennombrajn vicojn da domoj sen tegmento kiuj konsistigis la urbon, simile al malplenaj ĉelaroj da mielo plenigitaj de mallumo; la senforman blokon de ŝtono, kiu estis idolo sur la placo kie renkontiĝis kvar vojoj; la putojn kaj la defluiloj ĉe la anguloj de la stratoj kie iam troviĝis la publikaj akvujoj, kaj la rompitaĵn kupolojn de la temploj kun la sovaĝaj figarboj kiuj eliris el iliaj flankoj.

La simioj nomis ĉi tiun lokon ilian urbon, kaj afektis malestimi la popolon de la ĝangalo ĉar ili vivas en la arbarego. Kaj tamen ili neniam sciis por kiu uzo estis destinitaj la konstruaĵoj aŭ kiel uzi ilin. Ili ronde sidiĝis en la vestiblo kondukanta al la ĉambro de la reĝa konsilio, gratis siajn pulojn, kaj diris esti homoj; aŭ ili kuris tra la domoj sen tegmento, kolektis en iu angulo gipsorubojn kaj malnovajn brikojn, poste forgesis kie ili kaŝis ilin; aŭ ili interbatalis, kriis, amase interpuŝiĝis, poste subite ĉesis por ludi de supre ĝis malsupre de la terasoj, en la ĝardenoj de la reĝo kie ili skuis la rozujon kaj la oranĝujojn kun la plezuro vidi fali la fruktojn kaj la florojn. Ili esploris ĉiujn pasejojn, ĉiujn tunelojn de la palaco kaj la centojn da malgrandaj malhelaj ĉambroj, sed ili neniam rememoris tion kion ili vidis aŭ ne; kaj ili tiel hazarde vagis, unuope, duope, aŭ grupe, dirante sin unu la alia ke ili agis kiel la homoj. Ili trinkis en la akvujoj kies ili malklarigis la akvon kaj interbatalis por alproksimiĝi al ili, poste sin ĵetis ĉiuj kune laŭ kompaktaĵoj kaj amasoj kaj kriis :

- Estas neniu en la ĝangalo tiel saĝa, tiel bona, tiel inteligenta, tiel forta kaj tiel agrabla kiel la Bandar-Log^{oj}.

Poste ili rekomencis ĝis kiam, lacaĵ de la urbo, ili revenis al la suproj de la arboj, kun la espero ke la popolo de la ĝangalo rimarku ilin.

Moŭgli, kiu estis edukita laŭ la Ĝangala Leĝo, nek amis nek komprenis ĉi tian vivon. Estis malfrue posttagmeze kiam la simioj, trenante lin, alvenis al la Malvarmaj Kavernoj. Kaj, anstataŭ iri dormi, kiel Moŭgli estintus faranta tion post longa vojaĝo, ili prenis sin man' en mano kaj ekdancis kantante siajn plej frenezajn kantojn. Unu el la simioj faris paroladon, kaj diris al siaj kunuloj ke la kaptado de Moŭgli estigis novan etapon en la historio de la Bandar-log, ĉar li baldaŭ montros al ili kiel oni interplektis branĉojn kaj kanojn por fari al si ŝirmejon kontraŭ pluvo kaj vento. Moŭgli plukis kelkajn lianojn kaj komencis plekti ilin; la simioj provis imiti lin, sed post kelkaj minutoj, ili jam ne plu interesiĝis pri tio kaj komencis tiri la vostojn de siaj kamaradoj, aŭ kvarpiede salti tusante.

- Mi volus manĝi, diris Moŭgli. Mi estas fremdulo en ĉi tiu parto de la ĝangalo. Alportu al mi nutraĵon, aŭ permesu al mi ĉasi ĉi tie.

Dudek aŭ tridek simioj eksaltis eksteren, por alporti al li nuksojn kaj sovaĝajn **papaŭojn**; sed ili komencis survoje interbatali, kaj tio donintus al ili tro da penoj reveni kun tio kio restis el la fruktoj. Moŭgli estis dolorigita kaj furioza tiom kiom malsata, kaj li vagis en la malplenan urbon, ĵetante de tempo al tempo la ĉaskrion de la fremduloj, sed neniu respondis al li, kaj li pensis ke vere estis malbona loĝejo kiun li ĉi tie atingis.

- Ĉio kion Baluo diris pri la Bandar-Log, estas vera, li pensis en si mem. Ili estas sen leĝo, sen ĉaskrionoj, kaj sen estroj... nur sensencaĵoj kaj per malgrandaj manoj lertaj kaj rabemaj. Tiel ke se mi malsatmortos aŭ estos

mortigata en ĉi tiu loko, tio estos pro mia propra kulpo. Sed necesas ke mi provas reiri al mia ĝangalo. Baluo certe batos min, sed tio pli bone valoros ol ĉasi vanaĵojn kune kun la Bandar-Log.

Apenaŭ li direktis sin al la urba muro, kiam la simioj retrotiris lin, dirante al li ke li ne konis sian feliĉon, kaj pinĉante lin por doni al li ŝuldosenton. Li kunpremis la dentojn kaj diris nenion, sed paŝis, meze de la tumulto de la blekantaj simioj, ĝis teraso kiu superstaris la akvuojn el ruĝa sabloŝtono duonplenigitajn de pluvakvo. Centre de la teraso staris la ruinoj de pavilono, tute el blanka marmoro, konstruita por reĝinoj mortintaj antaŭ cent jaroj. La kupolforma tegmento estis duone disfalinta kaj ŝtopis la subteran pasejon tra kiu la reĝinoj kutimis veni de la palaco. Sed la muroj estis faritaj de paneloj el tranĉita marmoro, mirinda verko de plektaĵoj blankaj kiel lakto, inkrustitaj de agatoj, karneoloj, jaspoj kaj lazuritoj; kaj kiam la luno aperis super la monto, ĝi brilis tra la aĵura plektaĵo, ĵetante sur la grudon ombrojn similajn al brodaĵo el nigra veluro.

Tute vundita, laca kaj malsatega ke li estis, Moŭgli tamen ne sukcesis deteni sin ridi kiam la Bandar-Log po dudekope komencis samtempe diri al li kiom ili estis gravaj, saĝaj, fortaj kaj dolĉanimaj, kaj kia frenezo estis por li voli forlasi ilin.

- Ni estas gravaj. Ni estas liberaj. Ni estas mirigaj. Ni estas la plej miriga popolo en la tuta ĝangalo ! Ni ĉiuj diras tion, tial tio devas esti vera, ili kriis. Nun, ĉar vi aŭdas nin por la unua fojo, kaj ĉar vi kapablas transdiri niajn parolojn al la ĝangala popolo, por ke ĝi estonte rimarku nin, ni diros al vi ĉion kio koncernas niajn bonegajn personojn.

Moŭgli metis nenian kontraŭdiron, kaj la simioj amasiĝis po centoj kaj centoj sur la terason por aŭskulti siajn proprajn oratorojn kanti la laŭdojn de la Bandar-Log, kaj ĉiujn fojojn kiam oratoro haltis pro manko de spiro, ili kriis

Ĉiuj kune :

- Estas vere, ni ĉiuj havas saman opinion.

Moŭgli balancis la kapon, palpebrumis kaj diris "jes", kiam ili metis al li demandon; sed tiom da bruo sentigis al li la kapturnon.

- Tabaki, la ŝakalo, devas esti mordinta ĉiujn ĉi homojn, li diris al si, kaj nun ili suferas rabion. Certe ĝi estas la Deŭane⁽¹²⁾, la frenezo. Ĉu ili do neniam dormas ?... Nu jen nubo antaŭ tiu malbonaŭgura luno. Se almenaŭ ĝi estus nubo sufiĉe dika por ke mi povu provi forkuri en la mallumo. Sed... mi estas tiel laca !

Du fideluloj gvatis la saman nubon de la fundo de la ruinita fosaĵo, malsupre de la urba muro; ĉar Baghera kaj Kao, bone sciantaj la danĝeron kiun la Simia Popolo amase prezentis, ne volis preni nenecesajn riskojn. La simioj neniam luktas escepte se ili estas cent kontraŭ unu, kaj malmulte da homoj en la ĝangalo volegas riski tian ludon.

- Mi tuj iros al la okcidenta muro, murmuris Kao, kaj abrupte alsturmos ilin profitante de la dekliva grundo. Ili ne ĵetos sin sur mian dorson, al mi, malgraŭ ilia nombro, sed...

- Mi scias tion, diris Baghera, ke Baluo ne estas ĉi tie ! Sed necesas fari tion kion ni povas. Kiam ĉi tiu nubo kovros la lunon, mi iros al la teraso: ili kunsidas tie por ia konsilo pri la infano.

- Bonan ĉason, diris Kao kun senindulga mieno.

Kaj li rampis al la okcidenta muro. Ĝi estis la malplej en ruinoj, kaj la dika serpento malŝparis iom da tempo por trovi vojon por atingi la supron de la ŝtonoj. La nubo kaŝis la lunon, kaj ĉar Moŭgli demandis sin tion kio baldaŭ okazos, li aŭdis la malpezan paŝadon de Baghera sur la teraso. La nigra pantero estis grimpinta la deklivaĵon preskaŭ sen bruo, kaj sciante ke necesis ne malŝpari sian tempon por mordi, frapis

12 Vorto el la hindia, kun la signifo de "frenezo, rabio".

ĉirkaŭ si dekstren kaj maldekstren inter la simioj ronde sidantaj ĉirkaŭ Moŭgli per kvindekopa kaj sesdekopa vicoj dense. Aŭdiĝis blekado de timego kaj kolero, kaj ĉar Baghera stumblis sur la korpoj kiuj ruliĝis sub li baraktantaj, iu simio kriis :

- Estas nur unu ĉi tie ! Mortigu lin ! Mortigu !

Konfuza miksbatalo de simioj, mordanta, ungovundanta, disŝiranta, derompanta, sin fermis sur Baghera, dum kvin aŭ ses el ili, ekkaptante Moŭgli^{on}, posttrenis lin ĝis la supro de la pavilono kaj puŝis lin tra la truon de la rompita kupolo. Infano edukita de homoj estus multege vundiĝinta ĉar la falo estis almenaŭ dek kvin futojn (+/-4,5m) alta, sed Moŭgli falis kiel Baluo instruis lin fali, kaj tuŝis la grundon kun piedoj antaŭe.

- Restu ĉi tie, kriis la simioj, ĝis kiam ni mortigu viajn amikojn, kaj pli poste ni revenos ludi kun vi... se la Venena Popolo lasos vin vivanta.

- Ni estas el la sama sango, vi kaj mi, vigle diris Moŭgli aŭdigante la serpentan alvokon. Li sukcesis aŭdi susuron kaj sibladojn en la ruinaĵoj tute ĉirkaŭ li, kaj li duafoje aŭdigis la alvokon por esti certa.

- Bone, sss... ! For la kapuĉoj, vi ĉiuj ! diris duondekduo da mallaŭtaj voĉoj (*ĉiu ruino en Barato fariĝas pli malpli frue kaŝejo de serpentoj, kaj la malnova pavilono svarmis je kobroj*). Restu trankvila, frateto, ĉar viaj piedoj povus dolorigi nin.

Moŭgli sin tenis senmova tiom kiom eblis al li, observante tra la reto de marmoro kaj streĉante la orelon al furiozan bruegon en kiu luktis la nigra pantero : blekadoj, kriegoj, interpuŝiĝadoj, kiujn superis la raŭka kaj profunda stertoro de Baghera, dum li rompis, rapidegis, dronis kaj turniĝadis sub la kompaktaj amasoj de siaj malamikoj. Por la unua fojo ekde sia naskiĝo, Baghera luktis por defendi sian vivon.

- Baluo devas esti proksima; Baghera ne estus venanta sola, pensis Moŭgli.

Kaj li laŭte kriis : Al la akvujo ! Baghera. Atingu la cisternojn. Atingu ilin kaj enakviĝu ! Al la akvo !

Baghera aŭdis, kaj la krio kiu sciigis al li la saviĝon de Moŭgli, redonis al li novan kuraĝon. Li malfermis al si vojon, per senesperaj klopodoj, colon (2,5cm) post colo, rekte direkte al la pluvujoj, pene antaŭenirante en silento. Tiam, de la ruinita muro, la plej proksima de la ĝangalo, leviĝis kiel tondrado, la milita krio de Baluo. La maljuna urso faris sian plejbonon, sed li ne sukcesis alveni pli frue.

- Baghera, li kriis, jen mi. Mi grimpas ! Mi hastas ! Ahuŭora ! La ŝtonoj glitas sub miaj piedoj ! Atendu, mi alvenas, ho tre senhonoraj Bandar-Log^{oj} !

Li aperis, anhelante ĉe la supro de la teraso, nur por malaperi ĝis la kapo sub ondo da simioj; sed li klare firmigis sin sur siaj koksoj, kaj malfermante siajn antaŭajn kruojn, li ĉirkaŭpremis tiom el ili kiom li kapablis teni kaj komencis frapi per regula movado, bat... bat... bat..., kiun oni konfuzintus kun kadenca ritmo de padelrado. Bruo de falo kaj de resaltanta akvo avertis Moŭgli^{on} ke Baghera faris al si vojon ĝis la akvujo kie la simioj ne povis sekvi. La pantero restis tie, sufokita, kun la kapo ĝuste ekster la akvo, dum la simioj, viciĝintaj sur la ruĝaj ŝtupoj laŭ tri vicoj profunde, dancis pro kolerego de supre malsupren, pretaj ataki lin samtempe de ĉiuj flankoj, se li ŝajnis eliri por veni helpi Baluoⁿ. Estis tiam kiam Baghera levis la mentonon tute degutantan de akvo kaj de malespero, aŭdigis la serpentan alvokon por peti protekton :

- Ni estas el la sama sango, vi kaj mi.

Kao, li pensis, lastminute forkuris. Kaj Baluo, duonsufokita sub la simioj rande de la teraso, ne sukcesis bridi rikanon, aŭdante la nigran panteron voki helpon.

Kao apenaŭ ĵus boris al si vojon super la okcidenta

muro, surterigante per strebo kiu delokigis unu el la ŝtonoj de la kresto por sendi ĝin ruliĝi en la fosaĵon. Li ne intencis perdi iun ajn el la avantaĝoj de la tereno; tial li volviĝis kaj malvolviĝis unu aŭ du fojojn, por esti certa ke ĉiu futo de sia longa korpo estas en bona kondiĉo. Dum tiu tempo, la lukto kun Baluo daŭris, la simioj jelpis en la rezervejo ĉirkaŭ Baghera, kaj Mang, la vesperto, fluganta tien kaj tien, portis la novaĵon de la granda batalo tra la ĝangalo, tiel bone ke Hati, la sovaĝa elefanto mem, komencis elefantbleki kaj ke, tre malproksime, disaj bandoj da simioj kiujn la bruo vekis, alkuris, saltante tra la arbovojoj, al la helpo de siaj kamaradoj de la Malvarmaj Kavernoj, dum la bruego de la lukto fortimigis ĉiujn tagbirdojn je mejloj (1,6Km) ĉirkaŭe.

Tiam venis Kao, tute rekte, rapide, kun hasto por mortigi. La batalpotenco de pitono kuŝas en la albato de ĝia kapo premata de la tuta forto kaj de la tuta pezo de ĝia korpo. Se vi povas bildigi lancon, aŭ murrompilon, aŭ pezan martelegon de proksimume duontuno, direktata kaj loĝata de malvarma kaj trankvila volo, vi povas proksimume imagi al kio similis Kao en batalo. Iu pitono kun kvar aŭ kvin futoj (+/-1,2 aŭ 1,5m) kapablas faligi homon se ĝi frapas lin ĝuste sur la brusto; nu, Kao, vi scias tion, estis longa tridek futojn (+/- 9m). Lia unua bato trafis la koron mem de la amaso da simioj, kiuj furiozis kontraŭ Baluo, sendita al sia celo, kun buŝo fermita kaj sen bruo. Ne bezonis duan. La simioj disiĝis pro la krioj de :

- Kao ! Estas Kao ! Forkuru ! Forkuru !...

Ekde generacioj, la simioj estis malhelpitaj de la timego en kiu ĵetis ilin la rakontoj de iliaj pliaĝuloj pri Kao, la nokta ŝtelisto kiu glitas laŭlonge de branĉoj tiel senhaste kiel sternaĝas la musko, kaj facile forrabas la plej vivoplenan simion; de la maljuna Kao kiu kapablas tiel similigi sin kiel mortinta branĉo aŭ putra stumpo, ke la plej prudentaj lasas sin kapti, ĝis kiam la branĉo ekkaptas ilin. Kao estis ĉio kion

timis la simioj en la ĝangalo, ĉar neniu el ili sciis kie finiĝis lia potenco, neniu el ili kapablis rigardi lin vidalvide, kaj neniu el ili iam eliris vivanta el lia ĉirkaŭpremo.

Tial ili fuĝis, balbutante pro teruro, sur la murojn kaj la tegmentojn de la domoj, dum Baluo eligis profundan elspiron pro kvietigo. Kvankam lia felo estis multe pli dika ol tiu de Baghera, li kruele suferis pro la lukto. Tiam Kao unuafoje malfermis la buŝon : longa vorto siblis, kaj la simioj kiuj fore rapidis veni al la defendo de la Malvarmaj Kavernoj, haltis tie kie ili estis, rigidiĝintaj pro teruro, dum la branĉoj kiujn ili ŝarĝis, fleksiĝis kaj krakrompiĝis sub ilia pezo. La simioj, sur la muroj kaj la malplenaj domoj, subite silentigis siajn kriojn, kaj en la silento kiu falis sur la urbo, Moŭgli aŭdis Baghera skui siajn malsekajn flankojn elirante el la pluvujo. Poste la brukriado rekomencis. La simioj eksaltis pli alten sur la muroj; ili alkroĉiĝis al la koloj de la grandaj idoloj el ŝtono kaj ŝrikis saltetante laŭlonge de la kreneloj, dum Moŭgli, kiu dancis pro ĝojo en la pavilono, gluis sian okulon al la marmoraj aĵuroj kaj huadis kiel strigoj, inter siaj antaŭaj dentoj, por moki kaj montri sian malestimon.

- Regrimpu la hometulon tra la klappordo; mi ne povas fari pli, senspire kriis Baghera. Prenu la hometulon, kaj ni forkuru. Ili kapablus denove ataki nin.

- Ili ne plu moviĝos ĝis kiam mi ordonos tion al ili.

Restu. Ssss !

Kao siblis, kaj la silento plian fojon disvastiĝis super la urbo.

- Mi ne povis veni pli frue, kamarado... sed... mi vere kredis aŭdi vin alvoki...

Ĉi tio estis direktita al Baghera.

- Mi... mi povas esti krianta dum la lukto, respondi Baghera. Baluo, ĉu vi estas vundita ?

- Mi ne certas ke ili ne tranĉis min al cent etaj ursidoj, diris Baluo, serioze skuante siajn krurojn unu post la alia.

Ŭoŭ! Mi estas disbatita. Kao, ni ŝuldas al vi, mi pensas, la vivon... Baghera kaj mi.

- Ne gravas. Kie estas la hometo ?

- Ĉi tie, en klappordo; mi ne sukcesas grimpi, kriis

Moŭgli.

La kurbo de la rompita kupolo volbiĝis super sia kapo.

- Kunprenu lin! Li dancas kiel Mor, la pavo. Li baldaŭ dispecigos niajn idojn, diris la kobroj de interne.

- Ha! Ha! diris Kao kun eta rido; li ĉie havas amikojn, ĉi tiu hometo! Retroiru, etulo, kaj kaŝu vin, Venena Popolo. Mi tuj frakasos la muron.

Kao zorge ekzamenis la masonaĵon, ĝis kiam li malkovris, en la plektaĵo de la marmoraĵo, pli palan fendeton indikantan vundan punkton. Li donis du aŭ tri malfortajn kapbatojn por konscii pri la distanco; poste levante ses futojn (+/-1,8m) de sia korpo super la grundon, li ĵetis per ĉiuj siaj fortoj, kun la nazo antaŭe, duondekduon da kapbatoj. La aĵura verko cedis, dispeciĝis en nubon da polvo kaj da ŝtonruboj, kaj Moŭgli per unu saltego sin ĵetis tra la aperturo inter Baluoⁿ kaj Bagheraⁿ... kun unu brako metita ĉirkaŭ ĉiu dika kolo.

- Ĉu vi estas vundita? demandis Baluo, dolĉe brakumante lin.

- Mi estas vundita, mi malsatas, kaj mi ne estas duone disbatita. Sed... Ho!... Ili kruele mistraktis vin, miaj fratoj. Vi sangas.

- Tiaj estas aliaj, diris Baghera, lekante al si la lipojn kaj rigardante la mortintajn simiojn sur la teraso kaj ĉirkaŭ la pluvujo.

- Tio estas nenio, tio estas nenio, se vi estas senvunda, ho mia orgojlo inter ĉiuj malgrandaj ranoj! ploris Baluo.

- Ni juĝos pri tio pli poste, diris Baghera per seka tono kiu tute ne plaĉis al Moŭgli. Sed jen Kao, al kiu ni ŝuldas la finsolvon de la batalo, kaj vi, la vivon. Danku lin laŭ niaj kutimoj, Moŭgli.

Moŭgli turnis sin kaj vidis la kapon de la granda Pitono kiu balanciĝis je unu futo (+/-30cm) super la sia.

- Tiel tie estas tiu hometo, diris Kao. Lia haŭto estas tre glata, kaj li ne multe malsimilas al la Bandar-Log. Zorgu, etulo, ke mi neniam rigardu vin kiel simion en iu krepusko, dum kiu mi estus antaŭnelonge ŝanĝinta mian veston.

- Ni estas el la sama sango, vi kaj mi, respondis Moŭgli. Mi ŝuldas al vi la vivon ĉinokte. Mia predo estos via predo, se iam vi malsatas, ho Kao !

- Ĉiujn miajn dankojn, frateto, diris Kao kies la mokema okulo brilis. Kaj kion kapablas mortigi tiel maltima ĉasisto ? Mi petas sekvi la sekvontan fojon kiam li ekmoviĝos.

- Mi nenion mortigas..., mi estas tro malgranda... sed mi alpelas la kaprojn renkonten al tiuj kiuj scias uzi ilin. Kiam vi sentos vin malplena, venu al mi, kaj vi vidos ĉu mi diras la veron. Mi havas kelkan lertecon dank' al tio, *li montris siajn manojn*, kaj se vi iam falus en kaptilon, mi povas pagi la ŝuldon kiun mi ŝuldas al vi, tiel kiel tiun kiun mi ŝuldas al Baghera kaj Baluo ĉi estantaj. Bonan ĉasadon al vi ĉiuj, miaj mastroj.

- Bone dirita ! grumbletis Baluo.

Ĉar Moŭgli bele esprimis siajn dankojn.

La Pitono lasis faleti sian kapon dum unu minuto sur la ŝultron de Moŭgli.

- Brava koro kaj ĝentila lango, li diris, ili kondukos vin foren en la ĝangalon, etulo... Sed nun rapide foriru kun viaj amikoj. Iru dormi, ĉar la luno subiras, kaj pli bone valoras ke vi ne vidu tion kio tuj sekvos.

La luno sinkis malantaŭ la montetoj, kaj la vicoj da tremantaj simioj, premitaj unuj kontraŭ la aliaj sur la muroj kaj la kreneloj, ŝajnis kiel timtremantaj kaj disŝiritaj franĝoj. Baluo malsupreniris al la akvujo por tie trinki, kaj Baghera komencis bonarangî sian felon, dum Kao rampis al la centro de la teraso kaj fermis siajn makzelojn kun sonora

klakado kiu altiris al li la okulojn de ĉiuj simioj.

- La luno subiras, li diris. Ĉu estas ankoraŭ sufiĉe da lumo por vidi ?

De la muroj venis ĝemo kiel tiu de la vento ĉe la pintoj de la arboj :

- Ni vidas, ho Kao !

- Bone. Kaj nun, jen la danco... la danco de la malsato de Kao. Restu trankvile kaj rigardu !

Li volvis sin du- aŭ tri-foje laŭ granda rondo, svingante sian kapon de ambaŭ flankoj per naveda movado. Poste li komencis fari buklojn kaj okformojn per sia korpo, viskozajn triangulojn kiuj fandiĝis al molaj kvadratoj, al kvinanguloj, al ŝanĝiĝemaj teramasoj, ĉio tuta sen ripozoj, sen hasti, sen iam interrompi la obtuzan zumadon de sia kanto. La nokto fariĝis pli kaj pli malluma; baldaŭ oni ne plu distingis la malrapidan kaj ŝanĝiĝantan ondomovon de la korpo, sed oni povis aŭdi la susuradon de la skvamoj.

Baluo kaj Baghera staris senmovaj kiel ŝtonoj, kun grumbladoj funde de la gorĝo, la kolo hirta, kaj Moŭgli tute mira rigardis.

- Bandar-Log, fine diris la voĉo de Kao, ĉu vi povas movi manojn aŭ piedojn sen mia ordono ? Parolu !

- Sen via ordono ni povas movi nek piedojn nek manojn, ho Kao !

- Bone ! Alpaŝu unu paŝon pli proksime al mi.

La vicoj da simioj nerezisteble ondiĝis antaŭen, kaj Baluo kaj Baghera faris kun ili unu firman paŝon.

- Pli proksimaj ! sibliĝis Kao.

Kaj ĉiuj denove ekmoviĝis.

Moŭgli metis siajn manojn sur Baluo kaj Baghera por ilin kuntiri foren, kaj la du dikaj bestoj ekstremis kvazaŭ oni vekis ilin meze de sonĝo.

- Lasu vian manon sur mia ŝultro, Baghera murmuris. Lasu ĝin, aŭ mi devos reiri... reiri al Kao. Haa !

Sed estas nur la maljuna Kao faranta rondojn en la polvo, diris Moŭgli, ni foriru.

Kaj ĉiuj tri ŝteliris tra breĉo de la muroj por atingi la ĝangalon.

- Ŭoof ! diris Baluo, kiam li retroviĝis en la trankvila etoso de la arboj. Neniam plu mi faros aliancon kun Kao.

Kaj li skuis sin de supre malsupren.

- Li scias pli ol ni, diris Baghera, tremetante. Iom pli, se mi tie restus, mi alpaŝus en lian faŭkon.

- Pli ol unu sekvos ĉi tiun vojon antaŭ ol la luno denove levigōs, diris Baluo. Li faros bonan ĉasadon... laŭ sia maniero.

- Sed kion ĉio tute signifis ? diris Moŭgli, kiu nenion sciis pri la fascina potenco de la pitono. Mi vidis nenion pli ol dikan serpenton farante ridindajn rondojn ĝis kiam iĝis malluma. Kaj lia nazo estis tute difektita. Ho ! Ho !

- Moŭgli, diris Baghera incitite, lia nazo difektiĝis pro vi, kiel estas pro vi ke estas ŝirvunditaj miaj oreloj kaj miaj flankoj kaj miaj kruroj, same kiel la muzelo kaj ŝultroj de Baluo. Nek Baluo nek Baghera estos ema por plezure ĉasi dum longaj tagoj.

- Ne gravas, diris Baluo, ni estas reposedantaj la hometulon.

- Estas vere, sed li multe kostas al ni; li kostis al ni tempon kiun ni povintus pasigi en utilaj ĉasoj, vundojn, harojn (mi estas duone senharigita laŭ la tuta dorso) kaj fine honoron. Mi diras honoron, ĉar memoru, Moŭgli, ke mi, la nigra pantero, estis devigata alvoki Kaoⁿ por helpo, kaj ke vi vidis nin, Baluo kaj mi, resti stuporaj kiel birdetoj antaŭ la Danco de Malsato. Ĉio ĉi, hometulo, devenas de viaj ludoj kun la Bandar-Log.

- Estas vere, estas vere, diris Moŭgli ĉagrene. Mi estas malbona hometulo, kaj mi sentas mian koron tre malĝoja.

- Hm ! Kion diras la Leĝo de la Ĝangalo, Baluo ?

Baluo ne volis premeĝi Moŭgli^{on}, sed li ne povis moderigi

la leĝon; tial li malklare murmuris :

- Ĉagreno ne estas puno. Sed memoru tion, Baghera... li estas tute juna !

- Mi memoros tion; sed li malbone agis, kaj la batoj nun meritas batojn. Moŭgli, ĉu vi havas ion por diri ?

- Nenion. Mi malpravis. Baluo kaj vi, vi estas vunditaj. Tio estas justa.

Baghera donis al li duondekduon da manfrapoj, amikaj por iu pantero (ili apenaŭ vekintus unu el siaj propraj idoj), sed kiuj estis por sepjara infano tiel severa puno kiel oni povus deziri eviti tion. Kiam ĝi finiĝis, Moŭgli ternis, kaj provis denove regi sin, sen unu vorto.

- Nun, diris Baghera, saltu sur mian dorson, frateto, kaj ni reiru hejmen.

Unu el la belaĵoj de la Ĝangala Leĝo estas ke puno reguligas ĉiujn kontojn. Poste estas finita pri ĉiuj ĉikanaĵoj.

Moŭgli lasis fali sian kapon sur la dorson de Baghera, kaj endormiĝis tiel profunde ke li eĉ ne vekigis kiam oni demetis lin en la kavernon de siaj fratoj.

* * *

Vidu nin pasi festonantaj la nebulon
Duonvoje al la ĵaluza luno !
Ĉu vi ne envias niajn liberajn tribojn ?
Kion vi pensus pri du pliaj manoj ?
Ĉu vi ne ŝatus ĉi tiun volvan voston ?
Pli harmonia ol la Am-arko ?...
Ĉu vi koleras ?... Ne gravas.
Frato, rigardu vian voston kiu pendas !

Sur la alta branĉo, en vicoj, ni revas
Pri belaj sekretoj kiujn nur ni scias,
Pripensante pri la grandfaroj kiujn la mondo esperas,
Kaj ke nia genio nuntempe faras,
Io nobla kaj saĝa farita
Je la nomo de simpla deziro...
Kion ?... Mi ne plu scias... Ĉu gravis ?
Frato, rigardu vian voston kiu pendas !

Ĉiuj malsamaj lingvoj aŭ blekoj
De birdo, de rampulo aŭ de bestioj, lernitaj,
Plumo, skvamo, haro, kantoj de ebena aŭ de arbaro,
Ni rapide babilu ilin kaj ĉiuj samtempe !
Bonegaj ! Perfektaj ! Jen kiuj ni estas
Nun tute samaj kiel homoj !
Ni ludu homon... ĉu tre gravas ?
Frato, rigardu vian voston kiu pendas !

La simia popolo estas mirinda.
Venu ! Nia svarmo, salteganta en la arbaregoj, iras supren malsupren
Rakete al malpezaj pintoj kie maturiĝas la sovaĝaj vinberoj,
Per la mortinta ligno kiun ni rompas kaj la bela bruo kiun ni faras,
Ho, estu certa ke ni tuj konsumos subliman verkon !

VOJKANTO DE LA BANDAR-LOG.

* * *

"Tigron, tigron !".

Ĉu vi revenas feliĉa, fiera ĉasisto ?

Frato, en embusko, mi hieraŭ malvarmiĝis.

Ĉu estas via ĉasaĵo kiun mi videtas ?

Frato, li ankoraŭ paŝtiĝas en la arbaro.

Kie do via forto kaj via orgojlo ?

Frato, ili fuĝis mian koron en funebro.

Tiel rapide, kial do kuri ?

Frato, en mian truon mi iras morti.

Kiam Moŭgli forlasis la lupan kavernon, post sia kverelo kun la klano ĉe la Roko de la Konsilio, li malsupreniris al la kultivitaj kampoj kie loĝis la vilaĝanoj, sed li ne volis halti tie : la ĝangalo estis tro proksima, kaj li sciis ke li faris al si almenaŭ unu danĝeran malamikon en la Konsilio. Li daŭrigis sian migradon laŭ la malebena vojo kiu malsupreniris al la valon; li trotege sekvis ĝin, per unu vojiro, dum ĉirkaŭ dudek mejlojn (+/-32Km), kaj atingis regionon kiun li ne konis. La valo rigardis al granda ebenaĵo punktita de rokoj kaj tranĉita de ravinoj. Ĉe iu fino troviĝis malgranda vilaĝo, kaj ĉe la alia la densa ĝangalo rapide malleviĝis al la paŝtejoj kaj tie haltis subite, kvazaŭ oni tranĉis ĝin per bato de ŝpato. Ĉie sur la ebenaĵo la bovoj kaj la bubaloj paŝtiĝis, kaj kiam la knabetoj kiuj estas komisiitaj pri la gardado de la gregoj ekvidis Moŭgli^{on}, ili eligis kriojn kaj forkuris, kaj la flavaj **duonsovaĝaj** hundoj kiuj ĉiam vagadas ĉirkaŭ la hinduaj vilaĝoj, ekbojis. Moŭgli antaŭeniris ĉar li sentis sin tre malsata, kaj alvenante ĉe la pordego de la vilaĝo, li vidis la dikan dornan arbustaron, kiun oni ĉiutage tiris antaŭen ĉe la krepuskiĝo, puŝita ĉe unu el la flankoj.

- Hm ! li diris, ĉar li renkontis pli ol unu el ĉi tiuj

barikadoj dum siaj noktaj esplorvojaĝoj serĉante manĝaĵojn. Tiel, la homoj timas la ĝangalan popolon eĉ ĉi tie !

Li sidiĝis apud la pordego, kaj kiam la unua viro eliris, li stariĝis, malfermis la buŝon kaj fingre montris la fundon de ĝi, por indiki ke li bezonis nutraĵon. La viro streĉis la okulojn, kaj suprenkuris la ununuran straton de la vilaĝo, alvokante la pastron kiu estis dikulo blanke vestita kun ruĝa kaj flava marko sur la frunto. La pastro venis al la pordego, kaj kun li pli ol cent homoj, ankaŭ streĉantaj la okulojn, parolantaj, kriantaj, kaj montrantaj Moŭgli^{on} per la fingro.

- Ili ne havas bonajn manierojn, ĉi tiuj uloj kiuj oni nomas homojn ! pensis Moŭgli. Estas nur la griza simio kapabla konduti kiel ili faras.

Kaj li dorsen ĵetis siajn longajn harojn kaj kuntiris brovon rigardante la homamason.

- Kio estas timiga tie ? diris la pastro. Rigardu la spurojn sur liaj brakoj kaj liaj kruroj. Estas la mordovundoj de lupoj. Li estas nur sovaĝa infano eskapinta el la ĝangalo.

Nature, ludante kun li, la etaj lupoj ofte mordis Moŭgli^{on} pli forte ol ili volis, kaj li havis la kruroj kaj la brakojn kovritajn de blankaj strekcikatroj. Sed li estus la lasta persono de la mondo por nomi tion mordvundojn, ĉar li sciis tion kion mordi volas diri.

- Arej⁽¹³⁾ ! Arej ! kriis samtempe du aŭ tri virinoj. Mordita de lupoj, kompatinda infano ! Li estas bela knabo. Li havas la okulojn kiel fajron. Honestan parolon, Mesua, li aspektas kiel via knabo kiu estis forrabita de la tigo.

- Lasu min vidi ! diris virino kiu portis pezajn kuprajn ringojn sur la pojnjoj kaj la maleoloj.

Kaj ŝi etendis la manon super siajn okulojn por atente rigardi Moŭgli^{on}.

- Estas vere. Li estas pli malgrasa, sed li tute havas la

13 Hindia interjekcio (*Arré*), ofte celanta knabon, por esprimi aŭ indignon aŭ surprizon.

rigardon de mia knabo.

La pastro estis lerta viro, kaj li sciis ke Mesua estas la edzino de la plej riĉa loĝanto de la loko. Li turnis la okulojn al ĉielo dum minuto, kaj solene diris :

- Tio kion la ĝangalo prenis, la ĝangalo redonis.

Kunprenu ĉi tiun knabon viahejmen, fratino mia, kaj ne forgesu honori la pastron kiu vidas tiel for en la vivo de la homoj.

- Per la virbovo kiu elaĉetis min ! diris Moŭgli en si mem, estus mirinde se, per ĉi ĉiuj vortoj, oni ne kredus sin en alia ekzameno de la klano ! Nu, ĉar mi estas viro, necesas konduki kiel viro.

La homamaso disiĝis samtempe kiam la virino signis al Moŭgli veni en sian kabanon, kie estis ruĝe lakita lito, larĝa kofro de grajnoj el terakoto, ornamita de strangaj reliefaj desegnaĵoj, duondekduo da kaseroloj el kupro, la bildo de hindua dio en malgranda niĉo, kaj sur la muro, vera spegulo tiel kiel ĝi troviĝas po ok soldoj (+/-1€) en kamparaj foiroj.

Ŝi donis al li grandan glason da lakto kaj panon, poste ŝi metis la manon sur la kapon kaj rigardis lin funde de la okuloj... Ŝi pensis ke eble li estis ŝia filo, ŝia filo reveninta el la ĝangalo, kie la tigro alportis lin. Tial ŝi diris al li :

- Nattoo, Nattoo !...

Moŭgli ne ŝajnis koni ĉi tiun nomon.

- Ĉu vi ne memoras la tagon kiam mi donis al vi novajn ŝuojn ?

Ŝi tuŝis liajn piedojn, ili estis preskaŭ tiel malmolaj kiel korno.

- Ne, ŝi malgaje eligis : tiuj piedoj neniam surmetis ŝuojn; sed vi tute aspektas kiel mia Nattoo, kaj vi estos mia filo.

Moŭgli travivis ĝenon, ĉar li neniam en sia vivo estis sub tegmento; sed rigardante la pajlon, li komprenis ke li povus eltiri ĝin ĉiufoje kiam li volus foriri; kaj cetere, la fenestro

ne fermiĝis.

Poste li diris al si : "Por kio vere esti homo, se oni ne komprenas la homan lingvon ? Nuntempe mi estas tiel stulta kaj tiel muta kiel tia estus viro kun ni en la ĝangalo. Necesas ke mi parolu ilian lingvon".

Ne estis nur per ludado ke li lernis, dum li vivis kun lupoj, imiti la alvokon de la kapreolo en la ĝangalo, kaj la grunton de la apreto. Same, tuj kiam Mesua prononcis vorton, Moŭgli imitis ŝin preskaŭ perfekte, kaj antaŭ la nokto li lernis la nomon de multaj aferoj en la kabano.

Malfacilaĵo prezentiĝis je la horo de la enlitiĝo, ĉar Moŭgli ne volis dormi malliberigita de io kio similis al enfalujo por panteroj tiel kiel ĉi tiu kabano kaj kiam oni fermis la pordon, li eliris tra la fenestron.

- Lasu lin fari, diris la edzo de Mesua. Memoru ke li eble neniam dormis en lito. Se li efektive estis sendita al ni por anstataŭi nian filon, li ne forkuros.

Moŭgli iris kuŝiĝi sur la longaj kaj brilaj herboj kiuj borderis la kampon; sed li ne jam fermis la okulojn ke silka griza muzelo enŝoviĝis sub lia mentono.

- Pu ! grumbletis Frato Grizulo (li estis la plejaĝa el la idoj de patrino lupino). Jen malriĉa rekompenco pro esti sekvintaj vin dum dudek mejloj (+/-32km)! Vi odoras la lignofumon kaj la stalon, tute kiel viro, jam... Vekiĝu, frateto, mi alportas novaĵojn.

- Ĉu ĉiuj bone fartas en la ĝangalo ? diris Moŭgli, brakumante lin.

- Ĉiuj, krom la lupoj kiuj estis bruligitaj de la Ruĝa Floro. Nun aŭskultu. Ŝer-Kano iris ĉasi en la foraĵo ĝis kiam lia vestaĵo rekreskis ĉar li estas malbelege brunbruligita. Li ĵuras ke je sia reveno, li kuŝigos viajn ostojn en la Vajngunga.

- Ni estas du por ĵuri : ankaŭ mi faris promeseton. Sed la novaĵo ĉiam estas bonaj por scii. Mi estas laca, ĉivespere, tre laca pro ĉiuj ĉi novaĵoj, Frato Grizulo... sed ĉiam

informigu min.

- Vi ne forgesos ke vi estas lupoj ? La homoj ne forgesigos tion al vi ? diris Frato Grizulo per maltrankvila voĉo.

- Neniame. Mi ĉiam memoros ke mi amas vin kaj ĉiujn de nia kaverno; sed mi ĉiam ankaŭ memoros ke mi estis forpelita el la klano.

- Kaj ke vi povas esti forpelita el alia klano !... Homoj estas nur homoj, frateto, kaj ilia babilado estas simila al babilado de la ranoj en la lago. Kiam mi revenos ĉi tien, mi atendos vin en la bambuoj, sur la rando de la paŝtejo...

Dum la tri monatoj kiuj sekvis ĉi tiun nokton, Moŭgli apenaŭ transiris la portegon de la vilaĝo, tiom li okupiĝis pri lernado de kutimoj kaj moroj de homoj. Unue li devis surmeti zontukon ĉirkaŭ la lumbojn, tio kio abomene tedis lin; poste necesis al li lerni tion kio estas mono, pri kio li komprenis tute nenion kaj la plugado, pri kio li ne komprenis la utilon. Poste la malgrandaj infanoj de la vilaĝo kolerigis lin. Feliĉe la Ĝangala Leĝo instruis lin ne koleriĝi, ĉar en la ĝangalo, vivo kaj nutraĵo dependas de memrego; sed kiam ili mokis lin ĉar li rifuzis ludi iliajn ludojn, kiel flugigi kajton, aŭ ĉar li misprononcis vorton, li bezonis rememori ke estas malinda por ĉasisto mortigi tute nudajn idojn, por sin deteni ekkapti kaj duige rompi ilin. Li eĉ ne iom konsciis pri sia forto. En la ĝangalo, li sciis sin malforta kompare kun la bestoj; sed, en la vilaĝo, la homoj diris ke li estis forta kiel virbovo.

Li certe havis neniun ideon pri kio povis esti la timo : la tago kiam la pastro de la vilaĝo diris al li, ke se li ŝtelus liajn mangojn, la dio de la templo estus kolera, li iris kunpreni la di-bildon, alportis ĝin al la pastro en lian domon, kaj petis lin kolerigi la dion, ĉar li ĝojus batali kun li. Estis horora skandalo, sed la pastro estingis ĝin, kaj la edzo de Mesua pagis multe da bonan monon por kvietigi la dion.

Moŭgli ankaŭ ne havis plej malgrandan konscion pri la diferenco kiun kasto estigas inter iu viro kaj alia viro. Kiam la azeno de la potisto glitis en la argilejo, Moŭgli eltiris ĝin per la vosto; kaj li helpis stakigi la potojn kiam ili foriris al la bazaro de Kanhiŭara. Tio estis, oni ne povas pli ŝoka : ĉar la potisto estas viro de malalta kasto, kaj lia azeno ankoraŭ pli malalta. Se la pastro admonis lin, Moŭgli minacis lin ankaŭ lasi lin sur la azeno, kaj la pastro konsilis la edzon de Mesua gvidi la infanon al laboro kiel eble plej tuj; sekve, la vilaĝestro diris al Moŭgli ke li devos akompani la bubalojn la sekvantan tagon, kaj gardi ilin dum ili paŝtiĝos.

Nenio povis pli plezurigi Moŭgli^{on}; kaj samvespere, ĉar li estis komisiita de publika servo, li direktis sin al rondo da homoj kiuj ĉiutage kunsidis sur platformo el masonaĵo en la ombro de granda figujo. Ĝi estis la vilaĝklubo, kaj la estro, la gardisto kaj la barbiro, kiuj sciis ĉiujn klaĉojn de la loko, kaj la maljuna Buldeo⁽¹⁴⁾, la vilaĝa ĉasisto kiu posedis muskedon, kuniĝis kaj fumis tie. La simioj babilis, sidantaj sur la supraj branĉoj, kaj sub la platformo estis truo kie vivis kobro al kiu oni servis malgrandan bovlon da lakto ĉiuvespere, ĉar ĝi estis sankta; kaj la maljunuloj, sidantaj ĉirkaŭ la arbo, babilis kaj suĉis siajn dikajn nargileojn ĝis tre malfrue en la nokto. Ili rakontis mirindajn rakontojn pri dioj, homoj kaj fantomoj; kaj Buldeo rakontis el ili ankoraŭ pli mirindajn pri la kutimoj de bestoj en la ĝangalo, ĝis eligi la okulojn el la kapoj⁽¹⁵⁾ ĉe la infanoj, sidantaj ekster la rondo. La plimultaj rakontoj koncernis bestojn, ĉar por ĉi tiuj vilaĝanoj, la ĝangalo ĉiam estis ĉe ilia pordo. La damao kaj la apro esploris iliajn rikoltojn, kaj de tempo al tempo la tigro krepuske forrabis homon ĉe vido de la vilaĝa pordego.

Moŭgli kiu komprenble iom konis la aferojn pri kiuj ili parolis, bezonis kaŝi al si la vizaĝon por ke oni ne vidu lin ridi,

14 Ĉi tiu nomo devenas de la hindia vorto "Baladeva", kiu signifus sorĉiston.

15 Franca esprimo kiu signifus "Ne plu povi elteni tion".

dum Buldeo, kun sia muskedo transverse de la genuoj, iris de mirinda rakonto al alia ankoraŭ pli mirinda; kaj la ŝultroj de Moŭgli pro tio tremegis.

Buldeo nun klarigis kiel la tigro, kiu forrabis la filon de Mesua, estis fantoma tigro, korpo loĝata de la animo de maljuna fripona uzuristo, morta antaŭ kelkaj jaroj.

- Kaj mi scias ke ĉi tio estas vera, li diris, ĉar Purun Daso ĉiam lamis pro la bato kiun li ricevis en tumulto kiam liaj kontolibroj estis bruligitaj, kaj la tigro pri kiu mi parolas al vi ankaŭ lamas, ĉar la spuroj de ĝiaj kruroj estas neregulaj.

- Estas vere, estas vere, tio devas esti la vero, kune aprobis lin la grizbarbuloj.

- Ĉu ĉiuj viaj rakontoj estas nur tiaj sensencaĵoj, tiaj neeblaĵoj ? diris Moŭgli. Ĉi tiu tigro lamas ĉar li naskiĝis lama, kiel ĉiuj scias tion. Kaj paroli pri la animo de uzuristo en besto kiu neniam havis la kuraĝon de ŝakalo, estas paroli kiel infano.

La surprizo lasis Buldeoⁿ sen parolo dum momento, kaj la vilaĝestro larĝe malfermis la okulojn.

- Ho, ho ! Li estas la bubo de la ĝangalo, ĉu ne ? Buldeo fine diris. Ĉar vi estas tiel inteligenta, vi pli bone farus alportante lian haŭton al Kaniŭara, ĉar la registaro anoncis prezon por ĝia kapo de cent rupioj... Sed vi ankoraŭ farus pli bone silenti kiam viaj pliaĝuloj parolas !

Moŭgli stariĝis por foriri.

- La tutan vesperon, mi tie restis por aŭskulti, li ĵetis super sian ŝultron kaj krom unu aŭ du fojoj, Buldeo ne diris unu veran vorton pri la ĝangalo, kiu estas ĉe lia pordo... Kiel do kredi al rakontoj pri fantomoj, pri dioj kaj pri koboldoj, kiujn li asertas esti vidinta ?

- Urĝas ke ĉi tiu knabo iru gardi la brutarojn ! diris la vilaĝestro, dum Buldeo kolere spiregis kaj ĝemis pro la nerespekto de Moŭgli.

Laŭ la kutimo de la plejmulto el la hinduaj vilaĝoj, kelkaj junaj paŝtistoj frumatene elkondukis brutaron kaj bubalojn kaj revenigis ilin ĉe noktiĝo; kaj la samaj brutoj kiuj ĝismorte piedpremus blankulon, lasis sin esti frapataj, pelataj kaj timigataj de infanoj kies kapo apenaŭ atingas la altecon de iliaj muzeloj. Tiel longe kiel la infanoj restas kun la brutaro, ili estas sekuraj, ĉar la tigro mem ne kuraĝas sturmi la grandnombran brutaron; sed se ili malproksimiĝas por pluki florojn aŭ kuri post lacertojn, okazas al ili esti forrabitaj. Moŭgli tagiĝe malsuprenpaŝis laŭ la vilaĝa strato sidanta sur la dorso de Rama, la granda virbubalo de la brutaro; kaj la ardezbluaj bubaloj, kun siaj longaj kurbiĝantaj kornoj kaj iliaj kruelaj okuloj, unuope leviĝis el siaj staloj kaj sekvis lin; kaj Moŭgli, al la infanoj kiuj akompanis, tre klare sciigis ke li estas la estro. Li frapis la bubalojn per longa glata bambuo, kaj diris al Kamia, unu el la knaboj, lasi paŝtiĝi la brutaro dum li iris antaŭen kun la bubaloj, kaj bone atenti por ne foriĝi de la brutaro.

Hinda paŝtejo estas tute el rokoj, el terbuloj, el truoj kaj el malgrandaj ravinoj, inter kiuj la brutaroj disiĝas kaj malaperas. La bubaloj ĝenerale ŝatas marĉetojn kaj ŝlimajn lokojn, kie ili sin rulas kaj varmiĝas en la varma koto dum horoj. Moŭgli kondukis ilin ĝis la rando de la ebenaĵo, kie la Vajngunga eliĝis el la ĝangalo; tie li lasis sin gliti de la dorso de Rama, kaj foriris trotante al bosketo da bambuoj kie li trovis Fraton Grizulon.

- Ha! diris Frato Grizulo, mi venis atendi ĉi tie multajn sinsekvajn tagojn. Kion signifas ĉi tiu laboro gardi la brutaron?

- Ordono kiun mi ricevis, diris Moŭgli; mi portempe estas paŝtisto de la vilaĝo. Kiaj novaĵoj pri Ŝer-Kano?

- Li revenis en la landon kaj longe gvertis vin ĉi tie. Nun li reiris, ĉar ĉasbesto estas malofta. Sed li volas mortigi vin.

- Tre bone, eligis Moŭgli. Tiom longe kiom li estos for,

venu sidiĝi sur ĉi tiun rokon, vi aŭ unu el viaj fratoj, tiel ke mi povu vidi vin elirante el la vilaĝo. Kiam li revenos, atendu min en la ravino proksime de la *dhak*-arbo, meze de la ebenaĵo. Ne necesas kuri en la faŭkon de Ŝer-Kano.

Poste Moŭgli elektis lokon en la ombro, kuŝiĝis kaj dormis dum la bubaloj paŝtiĝis ĉirkaŭ li. La gardado de brutaroj en Barato estas unu el la plej pigraj metioj en la mondo. La brutaro ŝanĝas lokon kaj paŝtas, poste kuŝiĝas kaj denove ŝanĝas lokon, sen muĝi, preskaŭ neniam. Ĝi nur grumblas. Koncerne la bubalojn, ili malofte diras ion, sed eniras unu post la alia en la ŝlimaj marĉetoj, enŝoviĝas en la koton ĝis kiam iliaj muzeloj kaj iliaj grandaj fajenc-blauaj okuloj sole sin montras ĉe la surfaco, kaj tie ili restas senmovaj kiel blokoj. La suno flagrigas la rokojn en la varmego de la atmosfero, kaj la malgrandaj paŝtistoj aŭdas vulturon, neniam pli, sibli preskaŭ ekster videbleco super siaj kapoj; kaj ili scias ke se ili mortus, aŭ se bovo mortus, ĉi tiu vulturo sobirus balaante la aeron, ke la plej proksima vulturo, je mejlojn pli for, vidus ĝin fali kaj sekvus, kaj tiel plu, unu post la alia, kaj ke eĉ antaŭ ol ili mortintus, estus tie dudekkelke da malsataj vulturoj venantaj el nenie.

Foje ili dormas, viglas, reendormiĝas; ili plektas malgrandajn korbojn el seka herbo kaj enmetas en ili lokustojn, aŭ kaptas du mantojn por fari ilin interbatiĝi; ili surfadenigas por kolieroj ruĝajn kaj nigrajn ĝangalajn nuksojn, gvas la lacerton kiu varmiĝas sur la roko, aŭ la serpenton postsekvante ranon apud la ŝlimejoj. Foje ili kantas longajn, longajn kantojn kun strangaj enlandaj triloj ĉe la fino de la frazoj, kaj la tago ŝajnas al ili pli longa ol al la plejmulto da viroj la tuta vivo; foje ili starigas kastelon el koto kun figuretoj de homoj, de ĉevaloj, de bubaloj, ankaŭ modlitaj de koto, kaj metas kanojn en la manojn de homoj, kaj asertas ke ili estas reĝoj kun siaj armeoj, aŭ dioj kiuj necesas adori. Poste vespero venas, la infanoj kriante

kunigas la bestojn, la bubaloj eltiras sin el la glueca koto kun bruo simila al fusilpafoj forirantaj unu post la alia, kaj ĉiuj viciĝas tra la griza ebenaĵo por reiri al la lumoj kiuj briletas tie, en la vilaĝo.

Ĉiutage Moŭgli alkondukis la bubalojn al iliaj marĉejoj, kaj ĉiutage li vidis la dorson de Frato Grizulo je unu kaj duono mejlo (+/-2,5km) en la ebenaĵo, li tiel sciis ke Ŝer-Kano ne estis reveninta, kaj ĉiutage, li kuŝiĝis sur la herbaro, aŭskultante la onidirojn kiuj aŭdiĝis ĉirkaŭ li, kaj revante pri la malnovaj tagoj en la ĝangalo. Ŝer-Kano farintus mispaŝon pro sia lama kruro tie for en la ĝangaloj, rande de la Vajngunga, ke Moŭgli aŭdintus tion dum tiuj longaj silentaj matenoj.

Iam finfine, li ne vidis Fraton Grizulon ĉe la interkonsentita posteno. Li ridis kaj direktis siajn bubalojn al la ravino proksime de la dhak-arbo kiu estis tute kovrita de or-ruĝaj floroj. Tie staris Frato Grizulo, ĉiu haro de la dorso hirtigita.

- Li kaŝis sin dum unu monato por eligi vin ekster viaj singardecoj. Li transiris la kampojn dum la lasta nokto, kun Tabaki kaj sekvis vian varman spuron, diris la lupo anhelanta.

Moŭgli kuntiris la brovojn : "Mi ne timas Ŝer-Kano", sed Tabaki scias pli ol unu ruzaĵon !"

- Ne timu, diris Frato Grizulo malpeze pasigante al si la langon sur la lipoj, mi renkontis Tabaki^{on} je la sunleviĝo; li nun instruas sian sciencon al vulturoj... Sed li ĉion rakontis al mi, antaŭ ol mi rompu al li la lumbojn. La plano de Ŝer-Kano estas ĉi vespere atendi vin ĉe la pordego de la vilaĝo..., atendi vin, vin kaj neniun alian. Ĉimomente li dormas en la granda sekiĝinta ravino de Vajngunga.

- Ĉu li manĝis hodiaŭ, aŭ ĉu li malplena ĉasas ? eligis Moŭgli.

Ĉar la respondo, por li, signifis vivon aŭ morton.

- Li mortigis je la ektagiĝo... apron... Kaj li ankaŭ

trinkis... Rememoru ke Ŝer-Kano neniam povas resti nemanĝinte, eĉ kiam temas pri sia venĝo.

- Ho ! la malsaĝulo, la malsaĝulo ! Kian trioblan infanon tio faras !... Manĝinta kaj trinkinta ! Kaj li imagas al si ke mi atendos ke li estu dorminta !... Nune, kie li tie estas kuŝinta ? Se ni estus nur dek el ni, ni povus supervenki lin dum li estas kuŝinta. Sed ĉi tiuj bubaloj ne sturmos sen ke li estu flarata, kaj mi ne scias ilian lingvon. Ĉu ni kapablas ĉirkaŭiri lin kaj trovi malantaŭen lian spuron, tiel ke ili povu flari lin ?

- Li alvale naĝis laŭ la Vajngunga el forega almonto por interrompi la spuron, diris Frato Grizulo.

- Estis Tabaki, mi certas, kiu donis al li la ideon ! Li neniam elpensus tion per si mem.

Moŭgli staris pensema, kun fingro en la buŝo :

- La granda ravino de la Vajngunga..., ĝi enfluas en la ebenaĵon je malpli ol duonmejlo (+/-800m) de ĉi tie. Mi povas ĉirkaŭiri tra la ĝangalo, alkonduki la brutaron ĝis la enirejo de la ravino, kaj tiam, malsuprenirante, esplori ĉion... sed li eskapos tra la alia fino. Necesas al ni malebligi tiun elfuĝejon. Frato Grizulo, ĉu vi povas fari komplezon al mi duigante la brutaron ?

- Ne tute sola, eble... sed mi alkondukis helpon, iun ruzan.

Frato Grizulo trote malproksimiĝis kaj lasis sin fali en truon. Tiam, el ĉi tiu truo leviĝis enorma griza kapo kiun Moŭgli bone rekonis, kaj la varma aero pleniĝis per la plej afliktitan krion de la tuta ĝangalo,... la ĉasblekado de lupo plentagmeze.

- Akela ! Akela ! diris Moŭgli, batante la manojn. Mi devintus scii ke vi ne forgesu min... Ni havas laboron sur niaj manoj ! Dividu la brutaron en du, Akela. Gardu la bubalinojn kaj bubalidojn iufanke, kaj la virbubalojn aliflanke kun la plug-bubaloj.

La du lupoj trairis kurante, tien kaj tien kiel en kvadrilo, la brutaron kiu skuiĝis, levis la kapon kaj disiĝis laŭ du amasojn.

Iuflanke, la bubalinoj pelitaj ĉirkaŭ iliajn bubalidojn kiuj kunpremiĝis en la centro, ĵetis furiozajn rigardojn kaj stamfis, pretaj, se iu el la lupoj dummomente haltis, sturmi lin kaj treti lin sub siaj hufoj. Aliflanke, la plenkreskaj kaj junaj virbubaloj ankaŭ skuiĝis kaj stamfis, sed, kvankam ili ŝajnis pli imponaj, ili estis multe malpli danĝeraj, ĉar ili ne havis bubalidojn por defendi. Ses viroj ne sukcesus tiel klare dividi la brutaron.

- Kiaj ordonoj ? Akela anhelis. Ili provas rekuniĝi.

Moŭgli suriris sur la dorson de Rama :

- Pelu la virbubalojn maldekstren, Akela. Frato Grizulo, kiam ni estos foririntaj, bone tenu la bubalinojn kune, kaj faru ilin resupreniri tra la elfuĝejon de la ravino.

- Ĝis kie ? diris Frato Grizulo, anhelante kaj mordante dekstren kaj maldekstren.

- Ĝis tie kie la flankoj sufiĉe altiĝas tiel ke Ŝer-Kano ne sukcesu transpasi ilin ! kriis Moŭgli. Gardu ilin tie ĝis kiam ni malsupreniros.

La virbubaloj forkuris pro la bojadoj de Akela, kaj Frato Grizulo haltis antaŭ la bubalinoj. Ili impetegis al li, kaj li forkuris antaŭ ili ĝis la elfuĝejo de la ravino, dum Akela postkuris la virbubalojn for maldekstren.

- Bone farata ! Alia galopa tempo kiel ĉi tiu, kaj ili estos bele ĵetitaj... Tute bone, nun, tute bone, Akela ! Iun troan dentobaton, kaj la virbubaloj sturmas... Hujah ! Ĝi estas pli sekura laboro ol kurĉasi nigran kapreolon. Vi ne estus kredinta ke ĉi tiuj plumpuloj povis iri tiel rapide ? kriis Moŭgli.

- Mi... mi ankaŭ ĉasis ĝin dum mia tempo, anhelis Akela en la nubo de polvo. Ĉu necesas alpeli ilin al la ĝangalo ?

- Jes ! Alpelu ilin tre rapide ! Rama koleras kiel rabia

hundo. Ho ! se mi nur kapablas komprenigi al li tion kion mi volas de li hodiaŭ.

La virbubaloj ĉifoje estis dekstren alpelitaj, kaj sin ĵetis en la densejon kiun ili bruege penetris. La aliaj malgrandaj paŝtistoj, kiuj rigardis en la kompanio de siaj brutaroj, je duonmejlo (+/-0,8m) pli for, kuregis al la vilaĝo tiel rapide kiel iliaj kruroj kapablis porti ilin, kriante ke la bubaloj frenezigiĝis kaj forfuĝis. Sed la plano de Moŭgli estis simpla. Li volis sekvi grandan rondon suprenirante, atingi la kapon de la ravino, poste malsuprenirigi ĝin de la virbubaloj, kaj kapti Ŝer-Kanoⁿ inter ili kaj la bubalinoj. Li sciis ke post manĝi kaj trinki la tigro ne kapablas batali aŭ grimpi sur la flankoj de la ravino. Nun li trankviligis per la voĉo siajn bubalojn, kaj Akela, restanta for malantaŭe, kontentiĝis jelpi de tempo al tempo por urĝigi la ariergardon. Tio faris vastan, tre vastan cirklon : ili ne volis tro apudiĝi al la ravino por ne jam vigligi Ŝer-Kanoⁿ. Ĉe la fino, Moŭgli sukcesis kunigi la panikatan brutaron al la enirejo de la ravino, sur herboriĉan deklivon kiu rapide alvalis al la ravino mem. De tiu altaĵo oni povis vidi super la arbopintoj ĝis la ebenaĵo kiu sterniĝis sube; sed tio kion Moŭgli rigardis, estis la flankoj de la ravino. Li povis konstati kun forta kontentiĝo ke ili preskaŭ apike supreniris, kaj ke vitoj kaj lianoj kovrantaj la vandojn, ne permesus tenon al tigro kiu volus eskapi tra tie.

- Lasu ilin spiregi, Akela, li diris levante la manon. Ili ne jam flaris lin. Lasu ilin spiregi. Estas tempo por anonci sin al Ŝer-Kano. Ni tenas la beston en la kaptilo.

Li metis siajn manojn kiel voĉtubo, alvokis direkte al la ravino - estis preskaŭ samafero kiel alvoki en tunelo - kaj la eĥoj eksaltis de roko al roko.

Fine de longa intertempo respondis la treniĝanta kaj dormanta miaŭo de la tutsata tigro kiu vekigiĝis.

- Kiu alvokas ? diris Ŝer-Kano.

Kaj grandioza pavo leviĝis el la ravino, batante la

flugilojn kaj kriante.

- Estas mi, Moŭgli... Ŝtelisto de brutaro, estas tempo por veni al Roko de la Konsilio! Malsupren... Pelu ilin malsupren, Akela!... Malsupren, Rama, malsupren!

La brutaro hezitis dum momento sur la rando de la deklivo, sed Akela, laŭtigante la voĉon, ĵetis sian plenan ĉasblekadon, kaj ili rapidegis unuj post la aliaj absolute kiel vaporŝipoj en rapidfluo, kun sablo kaj ŝtonoj flugantaj ĉirkaŭ ili. Tuj foririntaj, ne plu estis rimedo por halti, kaj antaŭ ol ili estu meze de la fluejo de la ravino, Rama flaris Ŝer-Kanoⁿ kaj muĝis.

- Ha, ha! diris Moŭgli sur lia dorso. Vi scias nun!

Kaj la torento de nigraj kornoj, de ŝaŭmantaj muzeloj, de fiksj okuloj, tumultis en la ravino, absolute kiel ruliĝadas rokoj dum inundo, la pli malfortaj bubaloj ĵetitaj al la flankoj de la ravino kiujn ili balais ŝirante la rubusojn. Ili nun sciis kian laboron atendis ilin antaŭen - la teruran sturmon de la bubaloj kontraŭ kiu neniu tigro povas esperi rezisti. Ŝer-Kano aŭdis la tondron de iliaj hufoj, stariĝis kaj peze trenis sin al la malsupro de la ravino, serĉante ĉe iu flanko kaj ĉe alia flanko eskapeblecon; sed la vandoj estis apikaj, necesis al li resti tie, peza pro lia manĝo kaj la akvo kiun li trinkis, preta por ĉio plivole ol batali. La brutaro enakviĝis en la marĉon kiun li ĵus forlasis, sonigante la mallarĝan valon per siaj muĝadoj, Moŭgli aŭdis muĝadojn respondi ĉe la alia fino de la ravino, li vidis Ŝer-Kanoⁿ turni sin (la tigro sciis ke, en tiu senespera kazo, estis ankoraŭ pli bone alfronti la virbubalojn ol la bubalinojn kun iliaj bovidoj); kaj tiam Rama stumblis, preskaŭ falis, daŭrigis sian vojon, surtretante ion malfirman, poste kun la aliaj virbubaloj tuj post li, li enigis en la duan brutaron kun granda bruo, dum la pli malfortaj bubaloj estis levitaj super la grundo kun la kvar kruroj supren pro la albato de la kuntrafiĝo. La sturmo alvenigis al la ebenaĵo la du brutarojn ĝemantajn, kornofrapantajn kaj

stamfantajn. Moŭgli atendis la bonan momenton por lasi sin gliti de la dorso de Rama, kaj frapis dekstren kaj maldekstren ĉirkaŭ si per sia bastono.

- Rapide, Akela! Haltigu ilin! Disigu ilin, alie ili baldaŭ interbatalos kune... Elkonduku ilin, Akela... Haj!... Rama! Haj! Haj! Haj! Miaj infanoj... Tute dolĉe, nun Tute dolĉe! Estas finita.

Akela kaj Frato Grizulo kuris flanken kaj aliflanken, mordetante la bubalojn ĉe la kruroj, kaj kvankam la brutaro unue returniĝis por denove sturmi suprenirante la ravinon, Moŭgli sukcesis turni Ramaⁿ, kaj la aliaj sekvis lin al la marĉetoj. Ne plu bezonis treti Ŝer-Kanoⁿ. Li estis morta kaj la vulturoj jam alvenis.

- Fratoj, li mortis kiel hundo, diris Moŭgli, serĉante per la mano la tranĉilon kiun li ĉiam surhavis en ingo pendigita al sia kolo nun ke li vivis kun la homoj. Sed li neniam estus batalanta... Ŭalah! Lia haŭto efikos bone sur la Rokon de la Konsilio. Necesas tuj lerte eklabori.

Infano edukita inter homoj neniam estus revanta sole senfeliĝi dekfutan (+/-3m) tigron, sed Moŭgli sciis pli bone ol iu ajn kiel tenas haŭto de besto, kaj kiel ĝi foriĝas. Tamen estis malfacila laboro, kaj Moŭgli detranĉis, tiris, penis dum unu horo, dum la lupoj kontemplis lin, kun lango pendanta, aŭ alproksimiĝis kaj helpis lin tiri kiam li ordonis tion. Subite mano falis sur lian ŝultron; kaj suprenrigardante, li vidis Buldeoⁿ kun lia muskedo. La infanoj rakontis en la vilaĝo pri la sturmo de la bubaloj, kaj Buldeo eliris tre kolera, tre urĝata korekti Moŭgli^{on} pro ne esti prizorginta pri la brutaro. La lupoj malaperis tuj kiam ili vidis la viron veni.

- Kio estas ĉi tiu frenezo? diris Buldeo per kolera tono. Kaj vi imagas ke vi kapablas senfeliĝi tigron!... Kie la bubaloj mortigis lin?... Ĝi estas eĉ la lama tigo, kaj estas cent rupioj por ĝia kapo... Nu, bone, ni fermetos la okulojn pri la malzorgo per kiu vi lasis la brutaron forkuri; kaj eble

mi donos al vi unu el la rupioj de la rekompenco kiam mi estos alportinta la felon al Kanhiŭara.

Li priserĉis en sia zontuko, eltiris el ĝi fajroŝtonon kaj fajrilon, kaj kliniĝis por bruligi la lipharojn de Ŝer-Kano. La plejmulto da indiĝenaj ĉasistoj kutimas bruligi la lipharojn de la tigro por malhelpi ĝian fantomon fantomi ilin.

- Hm ! diris Moŭgli kiel al si mem, suprenfaldante la haŭton de unu el la kruroj. Tiel, vi kunportos la felon al Kanhiŭara por akiri rekompencan, kaj vi eble donos al mi rupion ? Nu, ŝajnas al mi ke mi gardos la felon por mi. He, maljunulo, for la fajro !

- Kiu estas ĉi tiu maniero paroli al la ĉefo de la ĉasistoj de la vilaĝo ? Via ŝanco kaj la stulteco de viaj bubaloj helpis vin mortigi ĉi tiun ĉasbeston. La tigro ĵus manĝis : sen tio, ĝi nun estus je dudek mejlojn ($\pm 32\text{km}$) de ĉi tie. Vi eĉ ne kapablas taŭge senfeliĝi ĝin, almozuleto, kaj devas esti mi, Buldeo, kiu lasas diri al mi : "Ne bruligu ĝiajn lipharojn !" Moŭgli, mi ne donos al vi unu anaon ($\approx 1/16$ rupio) de la rekompenco, sed bonan punbatadon, kaj jen ĉio. Lasu ĉi tiun kadavron !

- Per la virbovo kiu elaĉetis min ! diris Moŭgli ekkomencante la ŝultron, ĉu mi devas resti la tutan posttagmezon por babili kun ĉi tiu maljuna simio ? Ĉi tie, Akela ! Tiu viro tedegas min !

Buldeo, ankoraŭ klinita super la kapo de Ŝer-Kano, sin trovis subite sternita en la herbaro, kun griza lupo sur la lumboj, dum Moŭgli daŭrigis senfeliĝi kvazaŭ estus nur li en la tuta Barato.

- Jeees, li diris inter siaj dentoj. Vi finfine pravas, Buldeo, vi neniam donos al mi anaon de la rekompenco !... Estas malnova kverelo inter ĉi tiu lama tigro kaj mi... tre malnova kverelo... kaj mi gajnis !

Por rekoni la meritojn de Buldeo, se li havus dek jarojn malpli kaj se li renkontis Akelaⁿ en la arbaro, li provintus sian

Ŝancon en batalo; sed lupo kiu obeis al la ordonoj de infano, de infano kiu mem havis personajn malfacilaĵojn kun tigroj hommanĝuloj, ĝi ne estis ordinara besto. Tio estis sorĉarto, magio, kaj el la plej malbona speco, pensis Buldeo; kaj li demandis al si, ĉu la amuleto kiun li havis ĉirkaŭ la kolo, sufiĉus por protekti lin. Li restis tie sen aŭdaci moviĝi, ĉiuminute preta vidi Moŭgli mem ŝanĝiĝi al tigo.

- Maharaĝo ! Nobla reĝo ! li fine flustris per embarasa tono.

- Nu ? diris Moŭgli, sen turni la kapon kaj rikanante.

- Mi estas maljunulo. Mi ne sciis ke vi estis io pli ol eta paŝtisto. Ĉu mi povas stariĝi kaj foriri, aŭ ĉu via servanto baldaŭ dispecigos min ?

- Iru, kaj paco estu kun vi !... Sed alifoje, ne entrudiĝu en mia ĉasbestaro... Liberlasu lin, Akela.

Buldeo lampaŝe foriris al la vilaĝo, tiel rapide kiel li kapablis, retrorigardante super sian ŝultron, en la okazo se Moŭgli aliformiĝus en teruraĵon. Apenaŭ alveninta, li rakontis rakonton pri magio, pri ensorĉado, kiu decidigis la pastron afekti tre seriozan mienon.

Moŭgli daŭrigis sian laboron, sed la tago finiĝis ke li kaj la lupoj ne tute apartigis de la korpo la grandan felon kun gajaj koloroj.

- Nun necesas al ni kaŝi tion kaj rehejmenirigi la bubalojn. Helpu min kolekti ilin, Akela.

La rearigita brutaro ekmoviĝis en la krepuska nebulo. Alproksimiĝante al la vilaĝo, Moŭgli vidis lumojn, li aŭdis blovi kaj sonori la konkojn kaj sonorilojn. La duono de la vilaĝo ŝajnis atendi lin ĉe la pordego.

- Estas ĉar mi mortigis Ŝer-Kanoⁿ ! li diris al si.

Sed hajlo da ŝtonoj siblis en liaj oreloj, kaj la vilaĝanoj kriis :

- Sorĉisto ! Filo de lupo ! Ĝangala demono ! Foriru ! Rapidege foriru, aŭ la pastro redonos al vi vian lupan formon.

Pafu, Buldeo, pafu !

La malnova muskedo elpafis kun laŭtega bruo, kaj juna bubalo eligis doloran muĝadon.

- Ankoraŭ sorĉado ! kriis la vilaĝanoj. Li kapablas deviigi la kuglojn... Buldeo, ĝuste estis via bubalo.

- Kio nun ĉi tio estas ? diris Moŭgli panike, dum la ŝtonoj dense defalis ĉirkaŭ li.

- Ili estas tre similaj al tiuj de la klano, viaj fratoj de ĉi tie ! diris Akela kviete sidiĝante. Ŝajnas al mi ke se kugloj volas signifi ion, oni emas forpeli vin.

- Lupo ! Ido de lupo ! Foriru ! kriis la pastro svingante peceton de la sankta planto nomata tulsio⁽¹⁶⁾.

- Ankoraŭ ? La alia fojo, estis ĉar mi estis homo. Ĉi-foje, estas ĉar mi estas lupo. Ni foriru, Akela.

Virino, estis Mesua, kuris al la brutaro kaj plorkriis :

- Ho ! Mia filo, mia filo ! Ili diras ke vi estas sorĉisto kiu kapablas laŭvole ŝanĝiĝi al besto. Mi ne kredas tion, sed foriru, aŭ ili mortigos vin. Buldeo diras ke vi estas magiisto, sed mi scias ke vi venĝis la morton de Natoo.

- Revenu, Mesua ! kriis la homamaso. Revenu aŭ ni ŝtonmortigos vin !

Moŭgli ekridis per malbona seka rido, ŝtono ĵus trafis lin ĉe la buŝon :

- Reiru rapide, Mesua. Estas unu el tiuj ridindaj fabeloj kiujn ili ripetas sub la dika arbo ĉe la noktiĝo. Almenaŭ mi pagis por la vivo de via filo. Adiaŭ, kaj rapidu, ĉar mi tuj resendos la brutaron al ili pli rapide ol alvenas iliaj rompaĵoj. Mi ne estas sorĉisto, Mesua. Adiaŭ !

- Nun ankoraŭ iun penon, Akela ! li kriis. Rehejmenirigu la brutaron.

La bubaloj ne bezonis esti pelitaj por reiri al la vilaĝo. Ĉe la unua bleko de Akela, ili sturmis kiel trombon tra la

16 Sankta bazilio estas speco de ocimo, latine "Ocimum tenuiflorum".

pordegon, diŝjetante la homamason dekstren kaj maldekstren.

- Faru vian kalkulon, kriis malŝate Moŭgli. Mi eble ŝtelis unu. Bone kalkulu ilin, ĉar mi neniam plu estos paŝtisto sur viaj paŝtejoj. Adiaŭ, infanoj de homoj, kaj danku al Mesua pro tio ke mi ne venu kun miaj lupoj postkuri vin en via strato !

Li sin turnis kaj foriris kun la Soleca Lupo; kaj ĉar li rigardis la stelojn, li sentis sin feliĉa.

- Mi laciĝas dormi en enfaluloj, Akela. Ni prenu la haŭton de Ŝer-Kano kaj ni foriru... Ne, ni ne suferigos al la vilaĝo, ĉar Mesua estis bona por mi.

Kiam la luno leviĝis, inundante la ebenaĵon per lakta heleco, la teruritaĵoj vilaĝanoj vidis pasi foren Moŭgli^{on}, kun du lupoj tuj malantaŭ li kaj portaĵo sur la kapo, laŭ tiu vigla troto de la lupoj kiuj formanĝas longajn mejlojn kiel fajro. Tiam ili sonigis la sonorilojn de la templo kaj blovis en la konkoj pli laŭte ol iam; kaj Mesua ploris, kaj Buldeo ŝveligis la rakonton de sia ĝangala aventuro, fine rakontante ke la lupo sin tenis stara sur siaj malantaŭaj kruroj kaj parolis kiel homo.

La luno estis tuj subironta kiam Moŭgli kaj la du lupoj alvenis al la monteto de la Konsilio; ili haltis ĉe la kaverno de patrino lupino.

- Oni forpelis min el la klano de homoj, patrino ! alparolis Moŭgli, sed mi revenas kun la felo de Ŝer-Kano, mi plenumis mian promeson.

Patrino lupino eliris per rigida paŝado, kun siaj idoj malantaŭ si, kaj ŝiaj okuloj ekflamis kiam ŝi ekvidis la haŭton.

- Mi diris al li, la tagon kiam li enŝovis sian kapon kaj siajn ŝultrojn en ĉi tiun kavernon, postulante vian vivon, eta rano..., mi diris al li ke la ĉasisto estos ĉasita. Li tion meritis.

- Bonege, frateto ! diris profunda voĉo kiu venis el la densejo. Ni estis solaj en la ĝangalo sen vi.

Kaj Baghera venis kurante ĝis la nudaj piedoj de Moŭgli. Ili kune grimpis la Rokon de la Konsilio. Moŭgli etendis la haŭton sur la platan ŝtonon kie Akela kutimis sidi, kaj fiksas ĝin per kvar bambuaj splitoj; poste Akela kuŝiĝis sur ĝin kaj ĵetis la malnovan kunvokon al la Konsilio : "Rigardu, atente rigardu, ho lupoj !" Ekzakte kiel li ĵetis ĝin kiam Moŭgli estis alportita tien por la unua fojo.

Ekde kiam Akela estis detronigata, la klano restis sen estro, plenumante ĉasadon kaj batalon laŭ sia bontrovo. Sed ĉiuj, pro kutimo, respondis al la kunvoko : kaj kelkaj lamis pro esti falintaj en kaptilojn, kaj aliaj trenis kruron rompitan de pafaĵo, aliaj ankoraŭ estis favaj pro esti manĝinta aĉajn nutraĵojn, kaj multaj mankis. Sed tiuj kiuj restis venis al la Roko de la Konsilio, kaj tie ili vidis la striitan felon de Ŝer-Kano etendita sur la ŝtono, kaj la grandegajn ungegojn kiuj pendis ĉe la fino de la malplenaj kruroj.

- Atente rigardu, ho lupoj ! Ĉu mi plenumis mian promeson ? diris Moŭgli.

Kaj la lupoj bojis : Jes. Kaj unu el ili, tute disŝirita de vundoj, kriegis :

- Ho Akela ! Konduku nin denove. Ho vi, Hometulo ! ankaŭ gvidu nin : sufiĉas por ni, vivi sen leĝoj, kaj ni vere volas refariĝi la Libera Popolo.

- Ne, ronronis Baghera, tio ne povas esti. Kiam vi estos sataj, la frenezo povos retrafi vin. Ne estas pro nenio ke vi estas nomitaj la Liberan Popolon. Vi batalis por libereco, ĝi apartenas al vi. Manĝu ĝin, lupoj !

- La klano de la homoj kaj la klano de la lupoj forpelis min, diris Moŭgli. Nun mi ĉasos sola en la ĝangalo.

- Kaj ni ĉasos kun vi ! diris la kvar Lupidoj.

Moŭgli foriris kaj ekde tiu tago, li ĉasis en la ĝangalo kun la kvar idoj. Sed li ne ĉiam estis sola, ĉar post kelkaj jaroj, li fariĝis viro kaj edziĝis.

Sed ĉi tio estas rakonto por la plenkreskuloj.

* * *

Estas la kanto de Moŭgli.
Mi, Moŭgli, mi kantas.
Ĝangalo aŭskultu
kiajn aferojn mi faris :

Ŝer-Kano diras ke li mortigus
ke li mortigus !
Ke apud la pordoj, je la krepusko,
li mortigus Moŭgli^{on} la Ranon !

Li manĝis, li trinkis.
Bone trinku, Ŝer-Kano,
kiam vi denove trinkos ?
Dormu kaj songu pri via predo.

Mi estas sola en la paŝtejoj.
Venu, Frato Grizulo !
Kaj vi. Solulo, venu,
ni ĉasos la dikan beston ĉi-vesperen.

Arigu la grandajn virbubalojn,
virbubalojn kun blua haŭto, kun furiozaj okuloj.
Irigu ilin tien kaj tien laŭ tio kion mi ordonas.
Ĉu vi ankoraŭ dormas, Ŝer-Kano ?
Stariĝu, ho ! Stariĝu.
Jen mi venas kaj la virbubaloj malantaŭ mi !

Rama, la reĝo de la bubaloj, stamfis.
Akvoj de Vajngunga kien iris Ŝer-Kano ?

Li tute ne estas Sahi por fosi truojn,
aŭ Mor la Pavo por flugi.
Li tute ne estas Mang, la Vesperto,
por pendigi sin sur la branĉojn.

Malgrandaj bambuoj kiuj kraketas, diru kien li forkuris ?

Oŭ! Li estas tie. Aha! Tie li estas.

Sub la piedoj de Rama kuŝas la lamulo.

Levigu vin, Ŝer-Kano. Levigu vin kaj mortigu!

Jen ĉasbesto; rompu la kolon de la virbubaloj!

Ĉit! Li dormas. Ni ne vekos lin ĉar li estas tre forta.

La vulturoj malsupreniris por vidi lin.

La nigraj formikoj supreniris por koni lin.

Granda kunveno okazas por lia honoro.

Alala! Mi nenion havas por vesti min.

La vulturoj vidos ke mi estas nuda.

Mi hontas antaŭ ĉiuj ĉi tiuj homoj.

Pruntedonu al mi vian felon, Ŝer-Kano.

Pruntedonu al mi vian gajan striitan felon,

por ke mi povu iri al Roko de la Konsilio.

Per la taŭro kiu elaĉetis min,

mi faris promeson, malgravan promeson.

Mankas nur vian felon por ke mi plenumu mian parolon.

Tranĉilo enmane, la tranĉilo kies homoj uzas,

kun tranĉilo de la ĉasisto mi kliniĝos

por elpreni mian meritaĵon.

Akvoj de Vajngunga, atestu

ke Ŝer-Kano donas al mi sian felon,

ĉar li amas min.

Tiru, Frato Grizulo! Tiru, Akela!

Peza estas la haŭto de Ŝer-Kano.

La klano de la homoj estas incitita.

Ili ĵetas ŝtonojn kaj parolas kiel infanoj.

Mia buŝo sangas. Lasu min foriri.

Tra la nokto, la varma nokto,
rapide kuru kun mi, miaj fratoj.
Ni forlasos la vilaĝlumojn,
ni iros al la malalta luno.

Akvoj de Vajngunga, la Klano de la homoj forpelis min.
Mi ne faris malbonon al ili, sed ili timis min. Kial ?

Klano de la lupoj, vi ankaŭ forpelis min.
La Ĝangalo estas fermita por mi,
ankaŭ la pordegoj de la vilaĝo. Kial ?

Tiel same kiel Mang flugas inter bestoj kaj birdoj,
tiel same mi flugas inter la vilaĝo kaj la Ĝangalo. Kial ?

Mi dancas sur la felo de Ŝer-Kano, sed mia koro tre pezas.
La ŝtonoj de la Vilaĝo frapis mian buŝon kaj vundis ĝin.
Sed mia koro estas tre malpeza,
ĉar mi revenis al la Ĝangalo. Kial ?

Ĉi tiuj ambaŭ aferoj batalas en mi,
kiel serpentoj printempe batalas.
La akvo falas el miaj okuloj kaj tamen mi ridas. Kial ?

Mi estas du Moŭgli^{oj},
sed la felo de Ŝer-Kano estas sub miaj piedoj.
La tuta ĝangalo scias ke mi mortigis Ŝer-Kanoⁿ.
Rigardu, bone rigardu, ho lupoj !

Ahae ! Mia koro pezas pro aferoj kiujn mi ne komprenas.

LA KANTO DE MOŬGLI.
(Tiel kiel li kantis ĝin sur la Roko de la Konsilio,
kiam li dancis sur la felo de Ŝer-Kano).

* * *

La Blanka Foko.

Dormu, mia bebo, la nokto estas malantaŭ ni,
Kaj nigraj estas la akvoj kiuj brilis tiel verde;
Super la ŝeroj la luno serĉas nin
Ripoze inter iliaj silkaj kaj dolĉaj mamoj.
Kie la ondo tuŝas la ondon, tie faru vian fermitan neston,
Envolu vian lacan korpon, mia eta naĝanto,
Nek vento, nek ŝarko vekas aŭ vundas vin
Dormantan en la brakoj de malrapidaj lulaj ondoj.
(Foka lulkanto).

La aferoj kiujn mi tuj diros, okazis antaŭ pluraj jaroj en loko nomata Novastosna, ĉe la nordorienta pinto de la insulo **Sankta Paŭlo**, tien, tien, en la **Beringa Maro**. Limerŝino, la vintra regolo, rakontis al mi la historion kiam li estis ĵetita de la vento en la rigon de vaporŝipo survoje al Japanio. Mi malsuprenigis lin al mia kajuto, varmigis kaj nutris lin dum du tagoj, ĝis kiam li kapablis reiri al Sankta Paŭlo. Limerŝino estas stranga birdeto, sed li scias diri la veron.

Neniu venas al Novastosna krom por la aferoj; kaj la solaj estuloj kiuj havas tie regulajn aferojn, estas fokoj. Ili alnaĝas tien dum la someraj monatoj, kaj estas po centoj kaj centoj da miloj ke oni vidas ilin elakviĝi el la malvarma griza maro; ĉar la strando de Novastosna prezentas pli da oportunaĵojn por la fokoj ol neniu loko en la mondo. Marlukto sciis tion; tial, ĉiun printempon, li fornaĝis, de kie ajn li troviĝis, rapidegante kiel torpedoŝipo, rekte al Novastosna, kie li pasigis monaton batalante kontraŭ siaj kamaradoj por bona loko en la rokoj, kiel eble plej proksime al la maro. Marlukto estis dekkvinjaraĝa, li estis grandega grizfoko kies la felo sur la ŝultroj similis al kolharoj, kaj kiu

montris longajn kaninojn kun malbona aspekto. Kiam li leviĝis sur siajn antaŭajn naĝilojn, li superis la grundon je almenaŭ kvar futoj (+/-1,2m), kaj lia pezo, se iu kuraĝintus pezi lin, atingintus preskaŭ sepcent funtojn (+/-320Kg). Li estis tute kovrita de cikatroj de siaj furiozaj bataloj, sed ĉiam preta por plia batalo. Li flankenturnis la kapon, kvazaŭ li timus fronte rigardi sian malamikon; sed li ĵetis ĝin antaŭen, pli rapide ol fulmo, kaj post kiam la fortaj dentoj estis fiksitaj en la kolo de alia foko, la alia foko liberigis sin kiel ĝi kapablis, sed Marlukto ne helpis ĝin. Tamen Marlukto neniam atakus jam batitan fokon, ĉar tio estis kontraŭ la Leĝoj de Strando. Ĉio kion li bezonis, estis sian lokon apud la maro por establi sian mastrumaĵon; sed ĉar ĉiuprintempe estis kvardek aŭ kvindek mil aliaj fokoj serĉantaj la saman aferon, la sibladoj, la muĝadoj, la blekadoj kaj la raŭkaĵoj kiujn oni aŭdis sur la strando donis teruran koncerton. De malalta monteto, nomata Huĉinsono, oni povis malkovri tri kaj duon mejlojn (+/-5,5Km) da tereno kovrita de batalantaj fokoj, kaj la ŝaŭmo punktiĝis tra la tuta golfeto de fokkapoj hastantaj al la tero por partopreni al batalo. Ili interbatalis sur ŝeroj, ili interbatalis sur sablo, ili interbatalis sur bazaltoj, glatigitaj de uzado, rokoj kie enlokiĝis vartejoj, ĉar ili estis tute same stultaj kaj malfacilaj por vivi kiel la homoj. Iliaj kunulinoj neniam alvenis sur la insulon antaŭ la fino de majo aŭ la komenco de junio, ne volante esti dispecigitaj; kaj la junaj fokoj je du, tri kaj kvar jaroj, kiuj ne iam komencis geedzan vivon, antaŭenpaŝis ĝis ĉirkaŭ duonmejlo (+/-750m) internen de la lando, tra la vicoj de batalantoj, kaj ludis sur la dunoj po gregoj kaj po legioj, forviŝante ĉirkaŭe ĝis la plej etan spuron de verdaĵo. Oni nomis ilin la holusĉikiojn⁽¹⁷⁾ - la gefraŭlojn - kaj eble ili estis du aŭ tricent mil nur en Novastosna.

17 Mi nur esperantiĝis la anglan vorton de la origina teksto, ĝi signifas "Maturiĝanta fokido".

Marlukto ĵus elbatalis sian kvardek-kvinan batalon, iun printempon, kiam Matka, lia edzino, la agrabla kaj malsevera Matka kun teneraj okuloj, eliris el la maro. Li ekprenis ŝin ĉe la kolhaŭto, brutale metis ŝin sur sian loĝlokon, kaj grumblis :

- Malfrue kiel kutime ! Kien do vi ja povis iri ?

Marlukto kutimis manĝi nenion dum la kvar monatoj, kiujn li trapasigis sur la strando; tial lia humoro ĝenerale estis grumblema. Matka, tro saĝa por respondi per la sama tono, rigardis ĉirkaŭ si kaj kveris :

- Kia bona penso ! Vi ankoraŭ prenis ĉifoje la malnovan lokon.

- Mi vere kredas ke mi prenis ĝin, diris Marlukto...

Rigardu min.

Li sin montris ŝirita, sanganta en dudek lokoj, kun okulo preskaŭ krevita, la flankoj en ĉifona stato.

- Ho ! Tiuj viroj, tiuj viroj ! diris Matka sin aerumante per sia malantaŭa naĝilo. Kial vi ne povas esti nepostulemaj, kaj trankvile konsenti pri viaj lokoj ? Vi ŝajnas esti kverelinta kun **Orcino**⁽¹⁸⁾.

- Mi ne faris aliaĵon krom batali ekde meze de majo. La strando ĉijare estas plenplena, estas honto. Mi renkontis almenaŭ cent fokojn de Lukanono serĉante loĝejon. Kial homoj ne restas siahejme ?

- Mi ofte pensis ke ni sentus nin multe pli bone alteriĝante al Lutro-insulo anstataŭ elekti ĉi tiun fokplenan strandon, diris Matka.

- Ba ! Nur la holusĉikioj iras al Lutro-insulo. Oni dirus ke ni timas. Necesas konservadi aspektojn, kara mia.

Marlukto fiere firmigis sian kapon inter siaj fortaj ŝultroj kaj ŝajnigis dormi dum kelkaj minutoj, sed nur duone, ĉar li estis strikte singardema cele al ebla batalo.

Nun, kiam ĉiuj fokoj kaj iliaj inoj estis sur la tero, oni

18 El la anglan esprimon "Killer Whale" kiu signifas "Mortiganta baleno", tio estas orcino.

povis aŭdi ilian blekadon plurajn mejlojn foren, super la plej bruaj ŝtormoj. Minimume, estis certe miliono da fokoj sur la strando - maljunaj fokoj, patrinaj fokoj, etaj fokoj kaj holusĉikioj - kune batalantaj, ruliĝantaj, rampantaj kaj ludantaj, malsuprenirantaj en la maron kaj revenantaj po grupoj kaj po regimentoj, kovrantaj ĉiun kvadratan futon de kampo tiel foren kiel la okulo kapablis atingi, irantaj kverele po brigadoj tra la nebulo. Estas preskaŭ ĉiam nebulon en Novastosna, krom kiam la suno aperas por doni al ĉiu afero, dum tempospaco, aspekton de perlo kaj de ĉielarko.

Kotiko, la bebo de Matka, naskiĝis meze de ĉi tiu konfuzo. Li havis fortan kapon kaj fortajn ŝultrojn, kun palaj akvokolore bluaj okuloj, kiel estas la tute malgrandaj fokoj; sed estis io pri la koloro de lia felo, kiu faris lin estis tre proksime ekzamenata de lian patrinon :

- Marlukto, ŝi fine diris, nia bebo estos blanka !

- Malplenaj konkoj kaj seka zosterio ! ternis Marlukto, neniam estis en la mondo io kiu aspektis blankan fokon.

- Tio ne estas mia kulpo, diris Matka; nun estos unu.

Kaj ŝi kantis duonvoĉe la malrapidan kanton kiun ĉiuj patrinaj fakinoj kantas al siaj beboj :

Ne naĝu antaŭ ol esti sessemajnaĝa,

Aŭ via kapo estos sinkigita de viaj kalkanoj;

Kaj someraj musonoj, ŝarkoj kaj balenoj

Estas malbonaj por fokaj beboj.

Malbonaj por fokaj beboj, mia rato,

Pli malbonaj ol io ajn povas esti,

Sed padelu kaj fortigu vin,

Kaj vi neniam malpravos,

Libera infano de la disponebla maro !

Nature, la etulo unue ne komprenis la parolojn. Li vadis kaj padelis apud sia patrino kaj lernis liberigi la kampon kiam lia patro batalis kontraŭ alia foko kaj kiam ambaŭ ruliĝis kaj muĝi tra la glitantaj rokoj. Matka iris marmezen por serĉi

manĝaĵojn, kaj la bebo estis nutrata nur unufoje ĉiun du tagojn; sed tiam li manĝis kiel kvar kaj profitis ĝin.

La unua afero kiun li faris, estis rampi internen; tie li renkontis dekojn da miloj da siaaĝaj beboj kaj ili kune ludis kiel hundetoj, endormiĝante sur la hela sablo kaj denove ludante. La maljunuloj de la vartejoj ne zorgis pri ili, la holusĉikioj tenis sin sur sia propra teritorio, kaj la beboj mirinde amuziĝis. Kiam Matka revenis de sia fiŝkaptado en profunda maro, ŝi rekte iris al ilia ludloko kaj alvokis, kiel ŝafino alvokas sian ŝafidon, ĝis kiam ŝi aŭdis bei Kotiko. Tiam ŝi direktis sin al li laŭ strikte rekta linio, batante flanken kaj aliflanken per siaj antaŭaj naĝiloj kaj ĵetante la junajn fokojn transkapiĝe. Ĉiam estis kelkaj centoj da patrinoj serĉantaj siajn infanojn tra la ludejo, kaj la beboj multe bezonis malfermi la okulon; sed kiel Matka diris al Kotiko :

- Dum vi ne rulu vin en ŝlima akvo por suferi skabion tie, dum vi ne metu al vi sekan sablon en tranĉvundon aŭ skrapvundon, kaj dum vi ne naĝu kiam la maro estas malkvieta, neniu malbono povas okazi al vi ĉi tie.

La etaj fokoj ne kapablas pli bone naĝi ol la etaj infanoj, sed ili ne estas feliĉaj ĝis kiam ili estas lernintaj. La unuan fojon kiam Kotiko malsupreniris al la maro, ondo forprenis lin, perdigis al li la piedtenon, lia dika kapo sinkis, kaj liaj malgrandaj postaj naĝiloj leviĝis en la aero, tute kiel lia patrino diris al li en la kanto; fakte, se la sekva ondo ne ĵetintus lin al la rando, li dronintus. Post tio, li lernis resti kuŝinta en flako de la strando, lasi sin apenaŭ kovri per la fluo de ĉiu ondo kiu levis lin, dum li pagajis; sed li ĉiam viglis per la okulo por vidi alveni la dikajn ondojn kiuj povas suferigi. Fluis du semajnoj antaŭ ol lerni la uzon de liaj naĝiloj, kaj dum ĉi tiu tuta tempo, li sin trenis de marbordo al maro, de maro al marbordo, tusante, grumblante, malsuprenirante ventraltere la strandon, dormante kiel kato

sur la sablo, poste revenante en la akvon ĝis kiam li finfine sentis sin plene regadi sian elementon.

Vi povas imagi kian bonvivon, li tiam estigis kun siaj kamaradoj, la plonĝojn sub la ondoj, la rajdadojn sur la kreston de ŝeroj, la alvenojn sur la teron kun ternado kaj pum, dum la granda ondo foriris ŝaŭmante, tre alte sur la marbordon; la ĝojon senti sin rekte sur sia vosto kaj skrapi al si la kapon, kiel faras la maljunuloj, aŭ ludi "*Mi estas la Reĝo de la Kastelo*" sur la herbokovritaj kaj glitantaj rokoj kiuj aperas samnivele kun ŝaŭmo. Foje li vidis maldikan naĝilon, simila al naĝilo de dika ŝarko drivanta marmeze, ne for de la bordo, kaj li sciis ke li estis la murdema kaĉaloto, la Orcino, kiu manĝas junajn fokojn kiam li sukcesas kapti ilin... kaj Kotiko rapidegis al la strando kiel sagon, kaj la naĝilo foriris malrapide zigzagante, kvazaŭ li nenion serĉis.

Fine de oktobro, la fokoj komencis forlasi Sanktan Paŭlon por la alta maro, po familioj kaj po triboj; la bataloj ĉesis ĉirkaŭ la vartejoj, kaj la holusĉikio ludis kien ajn ili deziris.

- Venontjare, diris Matka al Kotiko, vi estos holusĉikio; sed ĉijare necesas ke vi lernu kapti fiŝojn.

Ili ambaŭ ekvojiris tra la Pacifiko, kaj Matka montris al Kotiko kiel dormi sur la dorso, la naĝiloj taŭge etenditaj kaj lia malgranda nazo ĝuste ekster la akvo. Ne estas pli komforta lulilo ol la longa, hula balancado de la Pacifiko. Kiam Kotiko sentis piketadojn sur la tuta surfaco de la haŭto, Matka diris al li ke li nun konis "la tuŝosenton de la akvo", ke tiuj lancinadoj kaj tiuj piketadoj aŭguris veteraĉon survoje, kaj ke necesis energie naĝi kaj forfuĝi antaŭen.

- Antaŭ longtempe, ŝi diris, vi scios al kie naĝi, sed nune ni sekvos Porkdemaro, ĉar li estas tre saĝa.

Bando da focenoj plonĝis kaj rapidis tra la akvo, kaj la eta Kotiko plenrapide sekvis ilin.

- Kiel vi scias la itineron ? li flustris.

La bandestro ruligis sian blankan okulon kaj plonĝis :

- Mia vosto lancinas min, junulo, li diris. Tio estas signo de skualo malantaŭ ni. Venu, venu ! Kiam ni estas sude de la Peza Akvo (li volis diri la ekvatoron) kaj ke ni sentas lancinadojn en la vosto, tio signifas ke estas fulmotondro antaŭ si kaj ke necesas stiri norden. Venu, la akvo diras al mi nenion bona ĉi tie.

Tio estis unu el la multaj aferoj kiujn Kotiko lernis, kaj ĉiutage li lernis novajn. Matka instruis lin sekvi moruon kaj hipogloson laŭlonge de la subakvaj benkoj; eltiri la bestojn de roko el ilia truo inter la zosterroj; laŭiri la vrakojn je cent klaftoj profunde ($\pm 190m$), senhezite trairante lukon por eliri tra alian dum postsekvo de fiŝojn; danci sur la pintoj de la ondoj, dum la fulmoj daŭris tra la ĉielo, kaj ĝentile saluti per la naĝilo la mallongvostan albatroson kaj la fregaton dum ili malsupreniras en la vento; salti, je tri aŭ kvar futojn ($\pm 0,9$ aŭ $1,2m$) super la akvo, kiel delfeno, kun la naĝiloj sur la flankoj kaj la vosto kurbigita; lasi la flugfiŝojn trankvilaj, ĉar ili estas tute el ostoj; plenrapide formordi la ŝultron de moruo sub dek klaftoj ($\pm 19m$); kaj neniam halti por rigardi boaton aŭ ŝipon, sed ĉefe remkanoton. Post ses monatoj, tio kion Kotiko ankoraŭ ne sciis pri fiŝkapto en profunda akvo, ne indus esti sciita; kaj dum tiu tuta tempo, li ne unufoje iris sur sekan teron.

Iam, tamen, ĉar li duondormante floris en la varmeta akvo ie ĉirkaŭ la [insularo Johano Fernando](#), li spertis malsaneton kaj mallaboremo invadi lin, tute kiel homoj kiam ili havas "junecon en la kruroj", kaj li memoris la bonan firman sablon de la strandoj de Novastosna je du mil mejlojn ($\pm 3.200Km$) for, la ludojn de siaj kamaradoj, la odoron de la fuko, la blekon de la fokoj kaj iliajn batalojn. En la sama minuto, li sin direktis norden, perpendikle naĝanta, kaj dum li iris, li renkontis dekduojn da siaj kunuloj, ĉiuj al sama loko, kiuj diris al li :

- Saluton, Kotiko ! Ĉi tiun jaron, ni ĉiuj estas holusĉikioj, ni povos danci la fajran dancon en la ŝerojn de Lukanono kaj ludi sur la novan herbon. Sed kie vi prenis ĉi tiun felon ?

La felo de Kotiko estis nun preskaŭ el senmakula blanko, kaj kvankam li tre fieris pri tio, li nur respondis :

- Naĝu rapide ! Mi havas kramfojn en la ostoj, tiom mi senpacience esperas revidi la teron.

Estas tiel kiel ili alvenis al la strandoj kie ili naskiĝis, kaj ili aŭdis de malproksime la maljunajn fokojn, siajn patrojn, batali en la peza nebulo.

Tiun nokton, Kotiko dancis la "fajran dancon" kun la junaj fokoj de la jaro. La maro estas plena de fajro, dum la someraj noktoj, de Novastosna ĝis Lukanono, kaj ĉiu foko lasas poststrion malantaŭ si, kiel el varmega oleo, kaj subita flamo kiam ĝi saltas, kaj la ondoj rompiĝas laŭ grandaj zebrostrioj kaj laŭ fosforeskaj kirloj. Poste ili supreniris enen ĝis la terenoj de la holusĉikioj, sin ruligis de supre malsupren en la petolaj novaj avenoj kaj rakontis rakontojn pri tio kion ili faris dum ili trakuris la maron. Ili parolis pri Pacifiko kiel la lernejoj pri arbaro en kiu ili stangobatis avelojn, kaj se iu komprenus ilin, li hejmeveninta povintus desegni mapon de ĉi tiu oceano kiel oni neniam vidis. La holusĉikioj de tri kaj kvar jaroj falruliĝis de Huĉinsono kriante :

- Flanken, bubetoj ! La maro estas profunda, kaj vi ne ankoraŭ scias ĉion kio estas ene. Atendu esti preterpasintaj Kab-urboⁿ... He ! Etulo, kien vi prenis ĉi tiun felon ?

- Mi ne prenis ĝin, diris Kotiko, ĝi tutsole kreskis.

Kaj ĉe la momento kiam li estis forlasonta sian interparolanton, du viroj kun nigraj haroj, ruĝvangaj kaj plataj vizaĝoj, eliris el malantaŭ duno, kaj Kotiko, kiu neniam antaŭe vidis virojn, tuis kaj mallevis la kapon. La holusĉikioj peze ekiris je kelkaj metroj, poste staris senmovaj por

stulte rigardegi ilin. La viroj tutsimple estis Keriko Boterino, la ĉefĉasisto de fokoj de la insulo, kaj Patalamono, lia filo. Ili venis el malgranda vilaĝo je malpli ol duonmejlo ($\pm 800m$) de la infanvartejoj, kaj ili sin okupis decidi kiuj fokoj ili alpelus al la buĉejoj - ĉar oni kondukas fokojn tutsame kiel ŝafojn - por esti poste transformitaj en peltajn jakojn.

- Ho ! diris Patalamono. Rigardu. Jen blanka foko.

Keriko Boterino fariĝis preskaŭ pala sub sia tavolo de oleo kaj fumo - ĉar li estis Aleutano, kaj la Aleutanoj ne estas zorgemaj homoj. Poste li komencis balbuti preĝon.

- Ne tuŝu lin, Patalamono. Neniam estis blanka foko de kiam mi naskiĝis. Eble li estas la spirito de maljuna Zaharofu kiu pasintjare sin perdis dum forta ventoblovo.

- Mi ĉirkaŭiras, diris Patalamono. Tio alportas malbonŝancon... Ĉu vi vere kredas ke estas la maljuna Zaharofu kiu revenas ? Mi ŝuldas al li ion por ovoĵ de mevo.

- Ne rigardu lin, diris Keriko. Alpelu ĉi tiun aron da kvarjaruloj. La homoj devus hodiaŭ senfeligi ducent el ili, sed estas la komenco de la sezono, kaj ili estas novaj en la laboro. Cent sufiĉos. Rapide !

Patalamono skuis paron de kastanjetoj, konsistigitaj de du klavikloj de foko, antaŭ grego da holusĉikioj, kaj tiuj ĉi subite haltis, snufantaj kaj blovantaj. Poste li proksimiĝis. La fokoj ekmoviĝis, kaj Keriko kondukis ilin internen sen tio ke ili provu unufoje rekuniĝi kun siaj kunuloj. Centoj kaj centoj da fokoj vidis forkonduki la aliajn , sed ili daŭrigis ludi kvazaŭ nenio okazis. Kotiko estis la sola por meti demandojn, kaj neniu el liaj kamaradoj kapablis diri ion al li, krom tio ke ĉiujare la homoj ĉiam kondukis tiamaniere la fokojn dum ses semajnoj aŭ du monatoj.

- Mi tuj sekvos ilin, li diris.

Kaj preskaŭ la okuloj eliris el lia kapo dum li lamis malantaŭ la grego.

- La blanka foko venas malantaŭ ni, kriis Patalamono.
Estas la unua fojo ke foko iam venis memvole al buĉejoj.

- Ne rigardu malantaŭen, diris Keriko. Mi nun certas ke li estas la spirito de Zaharofa !... Necesas ke mi parolos pri tio kun la pastro.

La distanco ĝis la buĉejoj estis nur duonmejlo (+/-800m), sed necesis unu horo por trairi ĝin ĉar, se la fokoj irus tro rapide, Keriko sciis ke ili varmiĝus kaj ke tiam ilia felo tufe foriĝus kiam oni senfeligos ilin. Tiel ke ili iris tre malrapide, preter la terkolo de Otario kaj preter la domo Vebstero ĝis kiam ili atingis la peklejon lokitan tuj ekster vido de la fokoj de la strando. Kotiko sekvis, anhelanta kaj senkonsila. Li kredis sin ĉe la fino de la mondo, sed la kriadoj de la vartejoj malantaŭ li sonis tiel laŭte kiel la bruo de trajno en tunelo.

Finfine Keriko sidiĝis sur la musko, elprenis pezan poŝhorloĝon el stano kaj lasis la gregon malvarmetiĝi dum tridek minutoj... kaj Kotiko povis aŭdi la roson de la nebulo elguti de la rando de lia ĉapo. Poste dek aŭ dek du viroj, ĉiu armita de ferita klabo tri aŭ kvar futojn (+/-90 aŭ 120cm) longa, alproksimiĝis. Keriko indikis unu aŭ du individuoj el la bando kiuj estis morditaj de siaj kamaradoj aŭ varmiĝis, kaj la homoj ĵetis ilin flanken per bategoj de siaj pezaj botoj faritaj el haŭto de rosmara gorĝo. Tiam Keriko diris :

- Ek !

Kaj la homoj komencis svenbati la fokojn plej rapide kiel ili kapablis. Dek minutojn pli poste, Kotiko ne plu rekonis siajn amikojn, ĉar iliaj haŭtoj, levitaj de la nazo ĝis la malantaŭaj naĝiloj, elŝiritaj per unu seka tiro, kuŝis amase sur la grundo.

Sufiĉis por Kotiko. Li sin turnis kaj forgalopis - foko povas tre rapide galopi dum iom da tempo - al la maro, kun siaj etaj komencantaj lipharoj tute hirtigataj pro hororo. Ĉe la terkolo de Otario, kie la grandaj marleonoj kunsidas rande

de la ŝaŭmo, li sin ĵetis, kun naĝiloj super la kapo, en la malvarmetan akvon kaj komencis svingiĝi mizere suspirante.

- Kiu alvenas ? Malmilde diris marleono.

Ĉar, ĝenerale, la marleonoj sin tenas al sia propra socio.

- Skoŝnie ! Oŝen Skoŝnie ! Mi estas sola, tute sola !

diris Kotiko. Oni estas mortiganta ĉiujn holusĉikiojn sur ĉiuj strandoj !

La marleono turnis la okulojn al la tero.

- Absurda ! li diris, viaj geamikoj faras tiom da bruo kiom kutime. Vi verŝajne vidis la maljunan Kerikoⁿ purigantan bandon. Estas tridek jaroj ke li plenumas ĉi tiun metion.

- Estas terure, diris Kotiko sin kontraŭstreĉante en la akvo, dum ondo kovris lin kaj reakirante ekvilibron per unu helica bato de naĝiloj kiu haltigis lin je tri centimetroj de roka eltranĉaĵo.

- Ne malbone pri etulo de la jaro, diris la marleono kiu kapablis estimi bonan naĝanton. Mi supozas ke laŭ via vidpunkto, fakte ĝi estas sufiĉe malbela; sed vi ja, fokoj, ĉar vi daŭre venas ĉi tien de jaro al jaro, homoj nature finas scii tion, kaj se vi ne kapablas trovi insulon kie la homoj neniam venas, vi ĉiam estos alpelata.

- Ĉu ne ekzistas tia insulo ? Kotiko komencis.

- Mi sekvis *poltoos^{on}* (=hipogloson) dum dudek jaroj kaj mi ne povas diri ke mi jam trovis ĝin. Sed aŭskultu... vi ŝajnas plezure babili kun viaj superuloj... kial vi ne iras al Valruso Insulo por paroli kun Viĉmaro. Li eble scias ion. Ne tiel rapidu. Tio estas transirado je ses mejloj (+/-10km) kaj en via situacio mi irus en sekan lokon kaj antaŭe dormus.

Kotiko taksis la konsilon bona; tial, reveninta al sia propra strando, li iris en sekan lokon kaj dormis dum duonhoro, kun tremetoj tute laŭlonge de la korpo kiel faras la fokoj. Poste li sin direktis al Valruso Insulo, malgranda malalta altebenaĵo de roka insulo, preskaŭ meze de nordorienta Novastosna, ĉio el rokaj terlangoj kaj el nestoj

de mevoj, kie la rosmaroj vivis inter si. Li alteriĝis apud la maljuna Viĉmaro, la dika malbela rosmaro, ŝvelaĉa kaj dartra, de la Norda Pacifiko, kun dika kolo kaj longaj dentegoj, kiu estas bonedukita nur kiam li dormas - kiel li nun faris - kun liaj malantaŭaj naĝiloj banantaj duone en ŝaŭmo.

- Vekiĝu ! bojis Kotiko ĉar la mevoj kaŭzis grandan bruon.

- Ha ! Ho ! Hm ! Kio tio estas ? diris Viĉmaro.

Kaj li trafis per siaj dentegoj la rosmaron kiu estis apud li, kaj vekis lin; tiu ĉi vekis sian proksimulon, kaj tiel plu ĝis kiam ili ĉiuj vekigis, malfermegante la okulojn al ĉiuj direktoj krom la taŭga.

- He ! Estas mi, diris Kotiko, naĝanta en la ŝaŭmon kaj simila al eta blanka marlimako.

- Nu ! Ke mi estu... senfeligita ! diris Viĉmaro.

Ili ĉiuj rigardadis Kotikoⁿ, kiel vi povas imagi ke klubo de maljunaj dormemaj sinjoroj rigardadus knabeton. Kotiko ne volis aŭdi pli paroli pri senfeligado dum tiu tago, li jam sufiĉe vidis tion, tiel ke li alvokis :

- Ĉu ne ekzistas loko kien fokoj povas iri, kaj kien homoj neniam venas ?

- Elturniĝu kaj trovu, diris Viĉmaro fermante la okulojn. Forkuru. Ni havas por fari ĉi tie.

Kotiko faris salton de delfeno en la aeron kaj kriis per siaj tutaj fortoj :

- Manĝanto de mituloj ! Manĝanto de mituloj !
Manĝanto de mituloj !

Li sciis ke Viĉmaro neniam kaptis fiŝon dum sia vivo, sed ĉiam elterigis konkulojn kaj algojn, kvankam li ŝajnigis sin kiel terura moŝtulo. Konjekteble, glacimevoj, fraterkuloj kaj gavioj, kiuj ĉiam serĉas okazon por esti malĝentilaj, rekomencis krie, kaj kiel diris al mi Limerŝino, dum preskaŭ kvin minutoj oni ne aŭdintus pafbruon sur Valruso Insulo. La tuta loĝantaro pepis kaj kriis :

- Manganto de mituloj ! Stareek (=maljunulo)!

Dum Viĉmaro ruliĝis de iu flanko sur la alia, grumblante kaj tusante.

- Kaj nun, ĉu vi diras tion al mi ? diris Kotiko, tute spirmanka.

- Iru demandi al Marbovo, diris Viĉmaro. Se li ankoraŭ vivas, li povos diri tion al vi.

- Kiel mi distingos Marbovoⁿ kiam mi renkontos lin ? diris Kotiko, jorante por foriri.

- Li en la maro estas la sola afero pli malbela ol Viĉmaro, kriis iu glacimevo rondirante sub la nazo de Viĉmaro, pli malbela kaj pli malĝentila ! Stareek !

Kotiko revojiris naĝante al Novastosna, lasante la mevojn kii. Sed reveninte li trovis nenian simpation rilate al sia humila provo malkovri sekuran lokon por la fokoj. Oni diris al li ke homoj ĉiam gvidis holusĉikiojn, tio partoprenis en la ordinara tasko, kaj ke se li ne ŝatis vidi malbelajn aferojn, li ne devis iri al la buĉejoj. Sed neniu el la aliaj fokoj vidis la buĉadon, kaj estas tio kiu diferencigis inter li kaj liaj amikoj. Plie Kotiko estis blanka foko.

- Tio kion vi devas fari, diris la maljuna Marlukto, post esti aŭdinta la aventurojn de sia filo, estas kreski kaj fariĝi granda foko kiel via patro, poste starigi infanvartejon sur la strando; kaj tiam ili lasos al vi pacon. Post kvin jaroj de nun vi devus esti kapabla batali por vi mem.

Eĉ la dolĉa Matka, lia patrino, diris al li :

- Vi neniam povos malebligi la buĉadojn. Iru ludi en la maro, Kotiko.

Kaj Kotiko foriris danci la fajran dancon, kun sia eta koro tre peza.

Tiun aŭtunon, li forlasis la strandon tuj kiam li povis kaj ekvojiris sole, pro ideo kiun li havis en sia obstina kapo. Li trovus Marbovoⁿ, se tia persono ekzistis en la vasteco de la

maroj, kaj li malkovros pacan insulon kun bonaj strandoj el firma sablo por la fokoj, kie homoj ne povos atingi ilin.

Nelacigeble, tute sola, li esploris la oceanon, de nordo al sudo de la Pacifiko, naĝante ĝis tricent mejlojn (+/-480Km) dum unu tago kaj unu nokto. Okazis al li pli da aventuroj ol oni scipovis rakonti; li apenaŭ eskapis el la ŝarko gronlanda tiel kiel la blanka; li renkontis ĉiujn nefidindajn diboĉulojn kiuj vagas tra la maroj, kaj la pezajn ĝentilajn fiŝojn kaj la grandajn skarlatajn kaj makuletitajn konkulojn kiuj restas ankritaj ĉe la sama loko dum centoj da jaroj kaj fieregas pro tio; sed li neniam renkontis Marbovoⁿ, kaj neniam li trovis insulon kiu plaĉis al li. Se la strando estis bona kaj firma kun malkruta deklivo kie la fokoj povus ludi, ĉiam estis sur la horizonto fumo de balenisto bolanta grason, kaj Kotiko sciistion kion tio signifis. Aŭ li povis vidi ke la fokoj antaŭe vizitis la insulon kaj estis detruitaj tie de masakroj; kaj Kotiko memoris ke tie kie homoj jam venis, ili ĉiam revenas.

Li vojiris kun maljuna albatroso kun stumpa vosto kiu rekomendis al li la insulojn Kergelenojn kiel la laŭrean lokon por paco kaj silento, kaj kiam Kotiko iris tien, estis apenaŭ se li ne frakasiĝis ĝis eretoj kontraŭ malbonaj nigraj klifoj, dum fortega hajla ŝtormo akompanata de fulmo kaj tondro. Tamen, ĉar li streĉe naĝis kontraŭ la vento, li povis vidi ke eĉ tie iam estis vartejo de fokoj. Kaj estis same en ĉiuj aliaj insuloj kiujn li vizitis.

Limerŝino detaligis da tio longan liston, ĉar li diris ke Kotiko esplorante pasigis kvin sezonojn, kun ĉiujare kvarmonatan paŭzon en Novastosna, kie la holusĉikioj mokis lin kaj liajn imagajn insulojn. Li iris al la Galapagoj, horora seka loko sub la ekvatoro, kie li pensis esti kuirita de la suno; li iris al la insuloj de Georgio, la Orkadoj, la Smeralda insulo, la insulo de la Najtingaleto, la Buvetinsulo, la Krozetinsuloj, kaj ĝis eteta insulo sude de Bonespera Kabo. Sed ĉie la marpopolo ripetis al li la saman aferon. La fokoj iam antaŭe

venis al tiuj insuloj, sed la homoj buĉadis kaj detruis ilin. Eĉ iun tagon, post esti naĝinta centojn da mejloj (+/-160km) en la akvoj de Pacifiko, atingante lokon nomatan Kabo de la Fluoj (estis dum sia reveno de Insulo de Gugh), li trovis sur roko kelkcent favajn fokojn kiuj diris al li ke la homoj ankaŭ venis tien. Tio preskaŭ senesperigis lin, kaj li preteriris la kabon survoje al siaj naskiĝstrandoj, kiam sur la norda vojo, li alteriĝis sur insulon kovritan de verdaj arboj, kie li trovis maljunan... tre maljunan fokon kiu mortiĝis. Kotiko fiŝkaptis por li kaj rakontis al li ĉiujn siajn malsukcesojn.

- Nun, diris Kotiko, mi reiras al Novastosna kaj, se mi estos alpelata al la buĉejoj kun la holusĉikioj, mi ne plu zorgas pri tio.

La maljuna foko, kontraŭe, kuraĝigis lin :

- Provu ankoraŭfoje. Mi estas la lasta el la perdita tribo de Masafuera, kaj dum la tempo kiam la homoj mortigis nin po centmiloj, legendo diskoniĝis sur la strandoj pri blanka foko kiu iam malsuprenirus de la nordo kaj gvidus la popolon de la foko en sekuran lokon. Mi estas maljuna kaj mi ne vivos por vidi tiun tagon, sed aliaj vidos ĝin por mi... Provu ankoraŭfoje.

Kotiko suprentiris siajn lipharojn (ili estis belegaj) kaj diris :

- Mi estas la sola blanka foko iam naskita sur la strandoj, kaj mi estas la sola foko, blanka aŭ nigra, kiu iam pensis serĉi novajn insulojn.

Ĉi tio grave revigligis lin.

Kiam li revenis al Novastosna tiun someron, lia patrino Matka petegis lin edziĝi kaj estigi sian familion, ĉar li ne plu estis holusĉikio sed iu Marlukto estanta tute atinginta sian plenkreskadon, kun blankaj kaj krispaj kolharoj sur la ŝultroj, tiel peza, tiel alta, tiel kuraĝa kiel sia patro.

- Donu al mi alian sezonon, li diris. Memoru, patrino, ĉiam estas la sepa ondo kiu pli alte supreniras la strandon.

Per sufiĉe stranga koincido, estis fokino kiu juĝis, kiel li, ke ŝi prokrastos sian edziniĝon al la sekva jaro kaj Kotiko dancis kun ŝi la fajran dancon laŭlonge de la strando de Lukanono, dum la nokto kiu antaŭis lian foriron por lia lasta marvojaĝo. Ĉifoje li sin direktis okcidenten ĉar li trafis la vojon de granda benko da hipoglosoj, kaj li ĉiutage bezonis almenaŭ cent funtojn (+/-50Kg) da fiŝoj por gardi sin en bonstato. Li ĉasis ilin ĝis tio ke li laciĝis, poste li rondiĝis kaj ekdormis en la ondokavo de la hulo kiu trafas **Kupran Insulon**. Li perfekte konis la marbordon, tiel ke ĉirkaŭ noktomezo, milde trafanta tavolo da fuko, li diris :

- Hm, estas sizigia tajdo ĉivespere !

Turnante sin sub la akvo, li malrapide malfermis la okulojn kaj sin eletendis. Poste li saltis kiel kato, ekvidante grandegajn aĵojn kiuj gapvagis en la akvo de la malprofundaĵoj kaj paŝtiĝis per pezaj franĝoj de fukoj.

- Per la Grandaj Rifondegoj de Magelano, li diris en siaj lipharoj, kiuj do el la tuta profunda maro estas tiuj uloj ?

Ili similis nenion, rosmaron, marleonon, fokon, urson, balenon, ŝarkon, fiŝon, polpon aŭ konkulon, kiun Kotiko iam antaŭe vidis. Ili estis dudek ĝis tridek futojn (+/-6 ĝis 9m) longaj, neniu malantaŭa naĝilo, sed vosto en formo de ŝovelilo kiu ŝajnis eltranĉita el malseka led. Iliaj kapoj estis la plej ridindaj aferoj kiujn oni povis vidi, kaj ili svingiĝis sur la pinto de iliaj vosto en profunda akvo kiam ili ne paŝtiĝis, solene salutante unu la alian kaj svingante siajn antaŭajn naĝilojn kiel dika homo svingas tro mallongajn brakojn.

- Hm ! diris Kotiko. Bonan plezuron, sinjoroj ?

La dikaj estuloj respondis luletante kaj svingante siajn naĝilojn kiel la Ran-Lakeo⁽¹⁹⁾.

Kiam ili rekomencis paŝtiĝi, Kotiko vidis ke ilia supra lipo estis fendita en du pecoj kiujn ili povis disigi ĝis ĉirkaŭ unu

19 Rolanto de "Alicio en Mirlando". Temas pri lakeo kiu ĉiam salutas kaj neniam respondas.

futo (+/-30cm), kaj denove rekunigi kun buŝelo (+/-12Litroj) da fuko en la fendo. Ili enŝovis la fukon en siajn buŝojn kaj solene maĉis.

- Maloportuna maniero manĝi, eligis Kotiko.

Ili denove luletis, kaj Kotiko komencis malpacienĝi.

- Tre bone ! li diris. Se vere vi posedas plian artikon ol la aliaj en via antaŭa naĝilo, tio ne indas tiom afekti. Mi vidas ke vi gracie salutas, sed mi volus koni viajn nomojn.

La fenditaj lipoj moviĝis kaj tordiĝis; la vitrecaj kaj verdetaĵoj okuloj rindiĝis, sed ili ne parolis.

- Nu ! diris Kotiko, vi estas la solaj uloj kiujn mi iam renkontis, kiuj estas pli malbelaj ol Viĉmaro... kaj pli malafablaj !

Tiam li fulmrapide rememoris pri tio kion la glacimevo kriis al li kiam li estis nur etulo de la jaro, en Valruso Insulo, kaj li refalis dorsen en la akvon : li bone vidi tion, li finfine malkovris Marbovoⁿ !

La sirenoj daŭrigis maĉetadi, paŝtiĝi kaj remaĉi en la fuko, kaj Kotiko metis al ili demandojn en ĉiuj lingvoj kiujn li kolektis dum siaj vojaĝoj, ĉar la popolo de la maro parolas preskaŭ tiom da lingvoj kiom la homaj estuloj. Sed la sirenoj ne respondis, ĉar Marbovo ne kapablas paroli. Li havas nur ses ostojn en la kolo anstataŭ sep, kaj oni diras, en la maro, ke estas tio kio malebligas lin paroli, eĉ kun siaj similuloj; sed kiel vi scias, li posedas plian artikon en sia antaŭa naĝilo, kaj svingante ĝin de supre malsupren kaj de dekstre maldekstren, li produktas movadojn kiuj respondas al ia kruda telegrafa kodo.

Ĉe la tagiĝo, la kolharoj de Kotiko staris tute sola, kaj lia pacienco estis foririnta tien kien iras la mortintaj kraboj. Tiam la sirenoj entreprenis tre malrapide vojaĝi al norda flanko, ofte haltante por teni absurdajn interparoladojn, tute per groteskaj salutoj, kaj Kotiko sekvis ilin dirante al si :

- Uloj stultaj ĝis tia grado estus sin amasbuĉigitaj antaŭ longe se ili ne malkovrus kelkan sekuran insulon; kaj tio kio estas sufiĉe bona por Marbovo estas sufiĉe bona por Marlukto... Tio estas egala, mi ŝatus ke ili rapidu.

Ĝi estis elĉerpiga vojaĝo por Kotiko. La grego da sirenoj tage neniam trairis pli ol kvardek aŭ kvindek mejlojn ($\pm 70\text{km}$), nokte haltis por paŝtiĝi kaj senĉese sekvis la marbordon, dum Kotiko naĝis ĉirkaŭe, supre kaj malsupre, sed sen akiri ion ajn pli de ili. Laŭmezure kiel ili antaŭeniris norden, ili interkonsiliĝis per salutoj post ĉiuj kelkaj horoj, kaj Kotiko preskaŭ ronĝis al si la lipharojn pro malpacienco kiam li rimarkis ke ili kontraŭflue iris fluadon de varma akvo. Tiam lia respekto por ili pliiĝis. Iun nokton, ili lasis sin droni tra la brilanta akvo - droni kiel ŝtonoj - kaj unufoje de kiam li konis ilin, ili komencis rapide naĝi. Kotiko sekvis, mirigita de ilia rapideco; li neniam imagis ke Marbovo ekzistu kiel naĝanto. Ili sin direktis al iu klifo de la marbordo, iu klifo kies piedo mergiĝis en profunda akvo, kaj en kiu malfermiĝis nigra truo je dudek klaftoj ($\pm 37\text{m}$) profunde. Tio estis longa, tre longa irvojo, kaj Kotiko multe bezonis freŝan aeron elakviĝante el la malhela tubo tra kiu oni kondukis lin.

- Per mia peruko, li diris elbuŝiĝante en senĝenan akvon, ĉe la alia fino, tute sufokiĝanta kaj anhelanta. Tio estas longa plonĝado, sed ĝi valoras la penon.

La sirenoj estis disaj kaj pigre paŝtiĝis sur la randoj de la plej belaj strandoj kiujn Kotiko iam vidis. Estis longaj rokstrioj, poluritaj de la akva eluziĝo, sterniĝantaj laŭ mejloj, ĝuste konformaj al la instalado de infanvartejoj; kaj estis malantaŭe, kaj suprenirante per malkruta deklivo, ludejoj el malmola sablo; estis huloj por danci en ĝi, densa herbo por sin ruli en ĝi, dunoj por grimpi kaj por falruliĝi; kaj super ĉio, Kotiko sciis per la tuŝo de la akvo, kiu ne erarigas Marluktoⁿ, ke neniam viro venis en la ĉirkaŭaĵo. La unua afero kiun li faris, estis certigi al si ke la fiŝkaptado estis

bona; poste li naĝis laŭlonge de la strandoj kaj nombris la agrablajn malaltajn kaj sabloriĉajn insuletojn duone kaŝitajn en la migrema nebulo. Norde disvolviĝis linio da profundaĵoj, da rifoj kaj da rokoj, kiuj neniam ebligus al ŝipo alproksimiĝi je pli ol ses mejlojn (+/-10Km) de la marbordo; inter la insuloj kaj la tero fluis ŝanelo da profunda akvo kie mergiĝis perpendiklara klifo; kaj ien sub la klifoj enbuŝiĝis la tunelo.

- Ĝi estas alia Novastosna, diris Kotiko, sed dekfoje pli bona. Marbovo devas esti malpli stulta ol mi pensis. la homoj, se estus homoj ĉi tie, eĉ ne kapablus malsupreniri la klifojn, kaj la rifojn flanke de la marbordo ŝirpecetigus ŝipon. Se estas sekura loko en la maro, estas tiu ĉi.

Li ekpensis pri tiu kiun li lasis atendante lin; sed, kvankam li malpacience deziris reiri al Novastosna, li tute esploris la novan landon, por povi respondi ĉiujn demandojn.

Poste li plonĝis, definitive esplorigardis la buŝon de la tunelo kaj trairis ĝin en la suda direkto. Neniu alia ol sireno aŭ foko suspektintus la ekziston de tia rifuĝejo, kaj sin turnante al la klifoj, Kotiko mem dubis ke li iam tuŝis ilin.

Li bezonis dek tagojn por reveni, kvankam sen malŝpari la tempon survoje; kaj surteriĝante preter la terkolo de Otario, la unua ulo kiun li renkontis estis tiu kiun li lasis por atendi lin. Ŝi komprenis vidante liajn okulojn ke li finfine trovis sian insulon.

Sed la holuŝĉikioj, Marlukto lia patro mem, kaj ĉiuj aliaj fokoj mokis lin kiam li rakontis al ili pri sia malkovro, kaj juna foko kun proksimume lia aĝo diris al li :

- Ĉio ĉi estas bela kaj bona, Kotiko, sed vi ne estas alveninta de nekonata loko por sendi nin tien laŭ via volo. Memoru ke ni, la aliaj, ni ĵus batalis por niaj vartejoj, tio kion vi neniam faris. Vi preferas vagi tra la maron.

La aliaj fokoj eksplodis per ridoj pro tiuj paroloj, kaj la juna foko ekskuis la kapon maldekstren dekstren. Li edziĝis tiun jaron, kaj multe menciis tion.

- Kial mi batalus ĉar mi ne havas infanvartejon, diris Kotiko. Mi volas nur montri al vi lokon kie vi estos sekuraj. Por kio utilas batali ?

- Ho ! Se vi evitas, kompreneble, mi havas nenion pli por diri, eligis la juna foko kun maldeca mokrido.

- Ĉu vi venos kun mi, se mi superos ? demandis Kotiko.

Kaj verda ekbrilo flamis en liaj okuloj, ĉar li furiozis devi batali.

- Tre bone, neglekte diris la juna foko, se vi superas, mi venos.

Li ne havis tempon por ŝanĝi sian opinion, ĉar la kapo de Kotiko saltis, kaj liaj dentoj kroĉis en la grason de la kolo de lia kontraŭulo. Poste li refalis sur siajn koksojn kaj tiris sian malamikon laŭlonge de la strando, skuis lin kaj ĵetis lin teren por ĉesi kun li.

Tiam Kotiko, turnante sin al la fokoj, muĝis :

- Mi faris mian plejbonon por via bono dum la kvin pasintaj sezonoj. Mi trovis por vi la insulon kie vi estos sekuraj. Sed krom se oni forŝirus viajn kapojn el viaj malsaĝaj ŝultroj, vi ne kredus al mi. Nu, nun mi tuj instruos vin. Gardu vin !

Limerŝino diris al mi ke neniam en sia vivo - kaj Limerŝino ĉiujare vidas dek mil grandajn fokojn batali - ke neniam, en sia tute mallonga vivo, li vidis ion similan por kontraŭi Kotikoⁿ tra la vartejoj. Li sin ĵetis sur la plej dikan Marluktoⁿ kiun li povis trovi, ekkaptis lin ĉe la gorĝon, strangolis lin, draŝis lin kaj svenbatis lin, ĝis kiam la alia eligis kompatpetan grumbladon, kaj poste ĵetis lin flanken por ataki la sekvantan. Komprenu, Kotiko neniam fastis en la daŭro de kvar monatoj, laŭ la jara kutimo de la grandaj fokoj; liaj ekskursoj tra alta maro gardis lin en perfekta stato, kaj super ĉio, li neniam jam batalis. Tute blanka, lia krispaj kolharoj hirtiĝis pro kolero, liaj okuloj flagris, liaj grandaj kaninoj brilis : li estis belega por vidi. La maljuna

Marlukto, lia patro, vidis lin pasi kiel trombo, trenante sur la sablo la malnovajn griziĝantajn fokojn, kiel tiom da platesoj, kaj rulfaligante la junulojn ĉiudirekten, kaj Marlukto kriis :

- Li eble estas freneza, sed li estas la plej bona ĉampiono de la strandoj ! Ne ataku vian patron, mia filo ! Li kunbatalas kun vi !

Kotiko muĝis por plena respondo, kaj la maljuna Marlukto anaspaŝante eniris en la lukton, kun liaj lipharoj hirtigitaj kaj blovante kiel lokomotivo, dum Matka kaj la fianĉino de Kotiko kaŭriĝis por spekti la spektaklon kaj admiris siajn virojn. Estis grandioza batalo, ĉar unu kaj la alia batalis tiel longe ke restis unu sola foko por maltimi levi la kapon; kaj kiam neniu pli restis, ili fiere paradis sur la strando, flank-al-flanke, muĝante.

Nokte, dum la nordaj fajroj komencis flagreti kaj danci tra la nebulo, Kotiko grimpis nudan rokon kaj kontemplis la disigitajn vartejojn, la vundoplenajn kaj sangantajn fokojn.

- Nun, li diris, mi donis al vi la lecionon kiun vi meritis.

- Per mia peruko - diris la maljuna Marlukto, restarante sin rigide, ĉar li estis terure dolorplena - Orcino ne pli malbone mistraktintus ilin... Filo, mi fieras pri vi... kaj pli bone, mi iros, mi, al via insulo... se ĝi ekzistas.

- Aŭskultu, pezaj porketoj de la maro. Kiu akompanos mi al la tunelo de la Marbovo ?... Respondu, aŭ mi rekomencos la lecionon, muĝis Kotiko.

Aŭdiĝis murmuro, simila al lirlo de la tajdo, ĉe la tuta vasteco de strandoj.

- Ni venos, diris miloj da lacaĵ voĉoj. Ni sekvos Kotikoⁿ, la blankan fokon.

Tiam Kotiko enprofundigis sian kapon inter siajn ŝultrojn kaj orgojle fermis la okulojn. Li nuntempe ne plu estis blanka foko, sed li estis ruĝa de la kapo ĝis la vosto. Malgraŭ tio, li malŝatintus rigardi aŭ tuŝi nur unu el siaj vundoj.

Semajnon pli poste, li kaj lia armeo (nuntempe ĉirkaŭ milo da holusĉikioj kaj da maljunaj fokoj) foriris norden, al la tunelo de la Sirenoj. Kotiko gvidis ilin. Kaj la fokoj kiuj restis en Novastosna, insulte nomis ilin frenezuloj. Sed la sekvan printempon, kiam ili ĉiuj troviĝis inter la benkoj de Pacifikaj fiŝkaptadoj, la fokoj de Kokiko sciigis tiajn rakontojn pri strandoj de preter la tunelo de Marbovo, ke fokoj pli kaj pli nombraj forlasis Novastosnaⁿ. Sendube, ĉi tio ne tuj okazis, ĉar la fokoj ne estas tre spritaj uloj, kaj necesas al ili tempo por pesi la por kaj la kontraŭ de la aferoj; sed de jaro al jaro, pli granda nombro el ili eliris el Novastosna, el Lukanono kaj el la aliaj infanvartejoj, al la trankvilaj ŝirmitaj strandoj kie Kotiko tronas dum la tuta somero, pli granda ĉiujare, pli dika kaj pli forta, dum la holusĉikioj ludas ĉirkaŭ li, en ĉi tiu maro kie neniu homo venas.

* * *

Matene mi trovis miajn fratojn (ho ! kiel mi estas maljuna !)
Tie kie la somera hulo muĝas ĉe la rokaj kabloj.
Ilia kreskanta ĥoro kovras la kanton de la subrifoj,
kaj per ĝojo kantu, strando de Lukanono, per du milionoj da voĉoj !

Kantu la malrapidan dormeton ĉe la rando de la laguno,
La eskadrojn anhelantajn kiuj malsupreniras de la dunoj,
La dancojn, ĉe la noktomezoj vipitaj de marlumoj,
Strandoj de Lukanono, antaŭ ol la homo venis !

Matene mi trovis miajn fratojn (neniam, neniam plu !)
Ili obskurigis la marbordon, ili trib-ope iris;
De plej malproksime kie la voĉo efikis al la marmezo,
Ni vokis la survojjajn bandojn kaj kantis al ili la teron !

Strando de Lukanono... la aveno kun longaj spikoj,
La fluanta nebulo, kaj la tapiŝoj el likenoj,
La altebenaĵoj de niaj ludoj kaj iliaj eluzitaj rokoj,
Strando de Lukanono... Ho strando kie mi naskiĝis !

Matene mi trovis miajn fratojn malĝojaj, solecaj;
Oni mortpafu nin en la akvo, oni svenbatu nin sur la tero,
La viro konduku nin al la peklejo, stulta orfa brutaro,
Tamen ni kantas Lukanonoⁿ... antaŭ ol la viro venis.

Ek suden, suden... Ho Goveroska, iru,
Diru nian funebbron al la Reĝoj de la Maroj dum ve,
Baldaŭ malplena tiel kiel la ovo de la morta ŝarko,
Strando de Lukanono, vi ankoraŭ konas nin !

Lukanono.

(Speco de foka nacia himno, laŭ malĝoja modalo).

* * *

Rikki - Tikki - Tavi.

*Ruĝa Okulo kun sulkiĝinta haŭto,
Ĉe la truo antaŭ li ekĵetita,
Ruĝa Okulo laŭtege kriis :
Venu danci kun la morto !
Okul' al okulo, kaj kap' al kapo,
(Laŭtakte, Nago !)
Iu mortinta, finos la festo !
(Laŭplaĉe, Nago !)
Vico por vico, kaj rondo por rondo
(Kuru, kaŝu vin, Nago !)
Maltrafita ! Mortu akompananton !
(Ve al vi, Nago !)*

Tio ĉi estas la historio de la granda milito, kiun Rikki-Tikki-tavi tutsole trakondukis en la banĉambroj de la granda bangalo, en la kantonmento de **Sugaulio**. Darzeo⁽²⁰⁾, la teksbirdo, helpis lin, kaj Ŝuŝundro, la ondatro, kiu neniam kuraĝas paŝi meze de la planko, sed ĉiam ŝteliras laŭlonge de la muro, donis al li opinion; sed Rikki-Tikki faris la veran laboron.

Li estis mungoto. Li sufiĉe pensigis pri eta kato per la felo kaj la vosto, sed prefere mustelo per la kapo kaj la kutimoj. Liaj okuloj estis rozaj kiel la fino de lia multokupa nazo; li kapablis grati sin ĉie ajn kie plaĉis al li, per iu ajn piedo, de antaŭe aŭ de malantaŭe, laŭ lia elekto; li kapablis ŝveligi sian voston ĝis kiam ĝi aspektis kiel skovelon por purigi botelojn, kaj lia militkrio, kiam li zigzagiris tra la longa herbo, estis : Rik-tik-tikki-tikki-tŝk !

Iam, la altaj someraj akvoĵoj kuntiris lin el la ternesto kie li vivis kun sia patro kaj sia patrino, kaj kunportis lin batantan per la piedoj kaj klukantan, laŭlonge de fosaĵo kiu

²⁰ Darzi signifas tajloron en Hindustana.

borderis vojon. Li tie trovis etan herbtufon kiu flosis, kaj alkroĉis sin al ĝi ĝis kiam li perdis la senton. Kiam li revenis al la vivo, li estis kuŝanta en la varma suno, meze de ĝardena aleo, tre malbonfarta estas vere, kaj knabeto diris :

- Ĝi estas mortinta mungoto. Ni metu ĝin en tombon.

- Ne, diris la patrino, ni prenu ĝin por sekigi ĝin. Eble ĝi ne estas ververe mortinta.

Ili kunportis ĝin en la domon, kie viro prenis ĝin inter sia dikfingro kaj sia montrofingro, kaj diris ke ĝi ne mortis, sed nur duonsufokita; tiam ili envolvis ĝin en kotonon, submetis ĝin al la varmeco de dolĉa fajro, kaj... Rikki-Tikki malfermis la okulojn kaj ternis.

- Nun, diris la viro (li estis anglo kiu ĵus translokiĝis en la bangalon), ne timigu ĝin, kaj ni vidos tion kion ĝi baldaŭ faros.

Estas la plej malfacila afero en la mondo timigi mungoton, ĉar de kapo ĝis vosto, ilia raso konsumiĝas pro scivolemo. La devizo de la tuta familio estas : "Serĉu kaj trovu", kaj Rikki-Tikki estis vera mungoto. Li rigardis la kotonan flokon, decidis ke tio ne estis bona por manĝi, kuris tute ĉirkaŭ la tablo, sidiĝis, reordigis sian felon, gratis sin kaj saltis sur la ŝultron de la knabeto.

- Ne timu, Teoĉjo, diris lia patro. Estas ĝia maniero amikiĝi.

- Uŝ ! Ĝi tiklas min sub la mentono, diris Teoĉjo.

Rikki-Tikki ĵetis rigardon inter la kolumo kaj la kolo de la knabeto, flaresploris lian orelon kaj malsupreniris al la planko, kie li sidiĝis gratante al si la nazon.

- Disinjoro, diris la patrino de Teoĉjo, kaj estas tio kion ni nomas sovaĝan beston ! Mi supozas ke se ĝi estas tiagrade malsovaĝigita, estas ke ni estis bonaj al ĝi.

- Ĉiuj mungotoj estas tiel, diris ŝia edzo. Se Teoĉjo ne tiras al ĝi la voston aŭ ne provas meti ĝin en kaĝon, li kuros tra la domo dum la tuta tago. Ni donu al ĝi ion por manĝi.

Ili donis al ĝi malgrandan pecon da kruda viando. Rikki-Tikki trovis tion bonega, kaj kiam li finis, li eliris sub la verandon, sidiĝis en la suno, kaj pufigis sian felon por sekigi ĝin ĝis la radikoj. Poste li sentis sin pli bona.

- Estas pli por malkovri en ĉi tiu domo, li diris al si, ol ĉiuj uloj de mia familio malkovrus dum sia tuta vivo. Mi restos, certe ja, kaj trovos.

Li uzis la tutan tagon por trairi la domon. Li preskaŭ dronis en la pelvojn, metis sian nazon en la inkon sur skribotablo kaj bruligis ĝin sur la fino de la cigaro de la viro grimpante sur liaj genuoj por vidi kiel oni faris por skribi. Ĉe la noktigo, li kuris en la ĉambron de Teoĉjo por rigardi kiel oni lumigis la petrollampojn; kaj kiam Teoĉjo enlitiĝis, Rikki-Tikki ankaŭ grimpis tien. Sed li estis malkvieta kunulo, ĉar necesis al li, dum la tuta nokto, leviĝi por respondi al ĉiu bruoj kaj trovi la kaŭzon de ĝi. La patrino kaj la patro de Teoĉjo venis por alĵeti lastan rigardon al sia knabeto, kaj trovis Rikki-Tikki^{on} tute vekita sur la kapkuseno.

- Mi ne ŝatas tion, diris la patrino de Teoĉjo; li povus mordi la infanon.

- Li ne faros ion similan, diris la patro. Teoĉjo estas pli sekura kun ĉi tiu besteto ol se li havus sanghundon por gardi lin... Se serpento enirus la ĉambron nun...

Sed la patrino de Teoĉjo ne eĉ volis pensi pri tiaj hororoj.

Frumatene, Rikki-Tikki venis ĉe la unua matenmanĝo sub la verando, portita sur la ŝultro de Teoĉjo; oni donis al li bananon kaj iom da enŝele boligita ovo, kaj li lasis sin preni sur la genuojn de unu post la alia, ĉar bonedukita mungoto ĉiam esperas fariĝi hejma mungoto en iu momento, kaj havi ĉambrojn por trakuri. Nu, la patrino de Riki-Tikki (ŝi iam loĝis en la domo de la generalo en Sugaulio) zorge instruis sian filon pri tio kion li devus fari, se iam li renkontus blankajn homojn.

Poste Rikki-Tikki eliris en la ĝardenon por vidi tion kio estis por vidi. Ĝi estis granda ĝardeno, nur duonkultivita, kun arbustoj de rozoj Marŝalo Nielo tiel dikaj kiel kioskoj, citronuoj kaj oranĝuoj, bosketoj de bambuoj kaj densejoj de altaj herboj. Rikki-Tikki lekis al si la lipojn.

- Jen belega ĉasejo, li diris.

Ĉe tiu penso, lia vosto hirtiĝis laŭ skovelo, kaj li jam kuris de supre malsupren kaj de malsupre supren tra la ĝardeno, flarante ĉiujn flankojn, kiam li aŭdis la plej plendindajn voĉojn eliri el dorna arbustaro.

Estis Darzeo, la teksbirdo, kaj lia edzino. Ili konstruis belan neston alproksimigante du larĝajn foliojn kies randojn ili kudris per fibroj kaj plenigante la internon per kotono kaj lanugaj flokoj. La nesto balanciĝis ĉe iu flanko kaj ĉe alia, dum ili ploris, lokintaj ĉe la enirejo.

- Kion vi havas ? demandis Rikki-Tikki.

- Ni estas tre malfeliĉaj, diris Darzeo. Unu el niaj beboj hieraŭ falis el la nesto, kaj Nago manĝis lin.

- Hm ! diris Rikki-Tikki, jen tio kio estas tre malĝoja... Sed mi estas fremdulo ĉi tie. Kiu estas Nago ?

Darzeo kaj lia edzino, kiel tuta respondo, buliĝis en sian neston, ĉar el la denseco de la herbo, ĉe la piedo de la arbusto, eliris obtuza siblo... abomena glacia sono... kiu saltigis Rikki-Tikki^{on} je du futojn (+/-60cm) dorsen. Tiam, colo post colo (+/-3cm), leviĝis el la herbo la kapo kun la malfaldita kapuĉo de Nago, la dika nigra kobro, kiu certe estis kvin futojn (+/-1,5m) longa de la lango ĝis la vosto. Kiam li levis trionon de sia korpo super la grundo, li restis balanciĝante dekstren kaj maldekstren, ekzakte kiel balanciĝas en la vento leontoda tufo kaj observis Rikki-Tikki^{on} per siaj malbonaj serpentaj okuloj, kiuj neniam ŝanĝas sian esprimon, kio ajn estu lia penso.

- Kiu estas, Nago ? li diris. Estas mi, Nago. La grava Dio Brahmao metis sian markon sur nia tuta popolo kiam la

unua kobro etendis sian kapuĉon por antaŭŝirmi Brahmaoⁿ dormantan en la suno... Rigardu, kaj tremu !

Li plie etendis sian kapuĉon, kaj Rikki-Tikki vidis sur lia dorso la markon de la okulvitroj, kiu pli ekzakte similas al la hokingo de fermilo per agrafilo.

Li timis dum minuto : sed neblas ĉe mungoto timi plu, kaj kvankam Rikki-Tikki neniam renkontis vivan kobron, lia patrino nutris lin per mortaj kobroj, kaj li bone sciis ke la granda afero en la vivo de plenkreska mungoto estas militi kontraŭ serpentoj kaj manĝi ilin. Nago ankaŭ sciis tion, kaj tute funde de sia koro el glacio, li timis.

- Nu, diris Rikki-Tikki, kaj lia vosto denove ŝveliĝis, markita aŭ ne, ĉu vi pensas, ke oni rajtas manĝi birdetojn kiuj falas el nestoj ?

Nago pripensis kaj atentis la plej malgrandan movon de la herbo malantaŭ Rikki-Tikki. Li sciis ke mungoto en la ĝardeno signifis, frue malfrue, morton por li mem kaj liaj; sed li volis malatentigi Rikki-Tikki^{on}. Tial li lasis iomete fali sian kapon kaj klinis ĝin flanken.

- Ni babilu..., li diris. Vi ja manĝas ovojn. Kial ni ne manĝus birdojn ?

- Malantaŭ vi !... Rigardu malantaŭ vi ! kantis Darzeo.

Rikki-Tikki tro multe sciis por preni sian tempon larĝe malfermi la okulojn. Li supren eksaltis tiel alten kiel li kapablis, kaj ĝuste sub li siblis la kapo de Nagino, la malafabla edzino de Nago. Ŝi malantaŭe rampis dum la konversacio, por tuj fini tion; kaj Rikki-Tikki aŭdis ŝian kolersiblon vidante sian maltrafon. Li preskaŭ refalis sur ŝian dorson, kaj maljuna mungoto sciintus ke tiam estis la momento por rompi al ŝi la lumbojn per dentobato; sed li timis la returne teruran vipobaton de la kobro kaj saltis el atingebleco de la atakema vosto, lasante Naginoⁿ ofendita kaj furioza.

- Malica, malica Darzeo ! diris Nago.

Kaj li skurĝis la aeron tiel alten kiel li kapablis atingi direkte al la nesto meze de la dorna arbustaro; sed Darzeo konstruis ĝin ekster trafo de la serpentoj kaj la nesto nur balanciĝis tien ĉi kaj tien.

Rikki-Tikki sentis ke siaj okuloj fariĝas ruĝaj kaj varmegaj (kiam la okuloj de mungoto ruĝiĝas, estas ke ĝi koleras), li firmigis sin sur sia vosto kaj siaj malantaŭaj kruroj kiel kangurueto, rigardis ĉirkaŭ si, kaj dentoklakis pro kolero. Sed Nago kaj Nagino malaperis en la herbo. Kiam serpento fiaskas, ĝi neniam lasas diveni ion pri tio kion ĝi planas poste fari. Rikki-Tikki ne zorgis sekvi ilin, ĉar li ne kredis sin certa samtempe supervenki du serpentojn. Tial, trotante al la sablita aleo apud la domo, li sidiĝis por pripensi. Por li estis serioza afero.

Se vi legas la malnovajn librojn pri natursciencoj, vi vidos ke, kiam mungoto batalas kontraŭ serpento kaj ke okazas esti hazarde mordita, ĝi forkuras por manĝi ian herbon kiu kuracas ĝin. Tio ne estas vera. La venko estas nur afero de akra okulo kaj de rapida piedo, serpenta ekatako kontraŭ mungota salto, kaj ĉar neniu okulo kapablas sekvi la movon de serpenta kapo kiam ĝi batas, temas do pri fenomeno pli miriga ol la magiaj herboj kapablus efiki.

Rikki-Tikki konis sin kvankam juna mungoto kaj estis nur pli kontenta ke li sukcesis tiel lerte eviti trafon de malantaŭe venintan. Li tiris el tio konfidon al si mem, kaj kiam Teoĉjo malsuprenkuris laŭ la pado, Rikki-Tikki sentis sin preta ricevi komplimentojn. Sed ĝuste kiam Teoĉjo kliniĝis, io tordiĝis iom en la polvo kaj tre malgranda voĉo diris :

- Gardu vin, mi estas la Morto !

Estis Karaito⁽²¹⁾, la malgrandega bruna serpento, kun koloro de sablo, kiu ŝatas kaŝiĝi en la polvo. Ĝia mordo estas tiel danĝera kiel tiu de la kobro; sed ĝi estas tiel malgranda,

21 Vorto el la hindia, kun la signifo de "Bungaro", tre venena serpento.

ke neniu atentis pri ĝi, tial ĝi malbonigas nur pli.

La okuloj de Rikki-Tikki denove ruĝiĝis, kaj li dancante supreniris al Karaito kun tiu aparta svingado kaj tiu onduma paŝado kiun li heredis de sia familio. Tio ŝajnas tre amuza, sed tio estas irmaniero tiel perfekte ekvilibra, ke ĉe iu ajn angulo oni povas subite ŝanĝi sian direkton : tio kio, kiam temas pri serpentoj, estas avantaĝo. Rikki ne rimarkis tion, sed li faris tie ion multe pli danĝeran ol kontraŭbatali Nagoⁿ : Karaito estas tiel malgranda kaj povas sin turni tiel facile, ke krom se Rikki mordus ĉe la supra parto de la dorso, tute proksime de la kapo, kontraŭa bato povus atingi lin ĉe la okulo aŭ la lipo. Rikki ne sciis; liaj okuloj estis tute ruĝaj, kaj li balanciĝis antaŭen kaj malantaŭen, serĉante la ĝustan lokon por ekkapti. Karaito impetis. Rikki saltis flanken kaj provis sturmi lin, sed la danĝera griza kapeto siblis tutproksime de lia ŝultro, kaj necesis al li eksalti super la korpo, dum la kapo sekvis de proksime liajn kalkanojn.

Teoĉjo vokis al la flanko de la domo :

- Ho ! Venu vidi ! Nia mungoto estas mortiganta serpenton.

Kaj Rikki-Tikki aŭdis la patrinon de Teoĉjo eligi krion, dum la patro sin pelis eksteren kun bastono; sed, dum la tempo kiam li venis, Karaito riskis nesingardan atakon, kaj Rikki-Tikki eksaltis, saltis sur la dorson de la serpento, lasis fali sian kapon tre malsupren inter siaj antaŭaj kruroj, mordis la dorson plej alten kiel li povis atingi, kaj forruliĝis. Ĉi tiu mordovundo paralizis Karaitoⁿ, kaj Rikki-Tikki estis voronta lin komencante per la vosto, laŭ la kutimon de sia familio por tagmanĝi, kiam li memoris ke abunda manĝo plipezigas mungoton, kaj ke povante tuj bezoni de sia tuta forto kaj de sia tuta lerteco, necesis al li resti nemanĝinte. Li foriris preni polvan banon sub tufoj da ricinoj, dum la patro de Teoĉjo batis la kadavron de Karaito.

- Por kio tio utilas ? pensis Rikki-Tikki; mi aranĝis ĉion.

Tiam la patrino de Teoĉjo prenis lin en la polvo kaj ĉirkaŭbrakis lin, plorante ke li savis Teoĉjoⁿ de la morto; kaj la patro de Teoĉjo deklaris ke li estas providenco; kaj Teoĉjo rigardis tion ĉion per larĝaj, konsternitaj okuloj.

Rikki-Tikki sufiĉe amuziĝis pri ĉiuj ĉi embarasojn kiujn nature li ne komprenis. La patrino de Teoĉjo povintus tiel bone karesi la infanon pro ludi en la polvo. Rikki amuziĝis kiel eble plej.

Tiun vesperon ĉe la tagmanĝo, promenante de flanko al alia inter la glasoj sur la tablo, estintus facile por li trompanĝi bonajn aferojn trifoje pli ol necesis, sed li havis Nagoⁿ kaj Naginoⁿ estantaj en memoro, kaj malgraŭ la tuta plezuro esti flatita kaj dorlotita de la patrino de Teoĉjo, kaj resti sur la ŝultro de Teoĉjo, liaj okuloj subite ruĝiĝis, kaj li eligis sian longan militkrion : Rik-tik-tikki-tikki-tŝk !

Teoĉjo kunportis lin enlitigi kaj insistis por ke li dormu sub lia mentono. Rikki-Tikki estis tro bone edukita por mordi aŭ ungrati. Sed li foriris, tuj kiam Teoĉjo ekdormis, por fari sian noktan rondon ĉirkaŭ la domo, kaj en la mallumo kurante albatigi kontraŭ Ŝuŝundroⁿ, la ondatroⁿ, kiu sin ŝovis laŭlonge de la muro.

Ŝuŝundro estas besteto kun rompita koro. Li ploretadas kaj pepadas dum la tuta nokto, klopodante sin rekuraĝigi por kuri meze de ĉambroj; sed li neniam sukcesas.

- Ne mortigu min, diris Ŝuŝundro preskaŭ plorante, Rikki-Tikki, ne mortigu min !

- Ĉu vi pensas ke mortigisto de serpentoj mortigas ondatrojn ? diris malestime Rikki-Tikki.

- Ĉiuj kiuj mortigas serpentojn, estos mortigataj de serpentoj, diris Ŝuŝundro, pli plendinda ol neniam. Kaj kiel esti certa ke Nago ne rigardos min kiel vin dum ia malluma nokto ?

- Ne estas la plej eta danĝero, diris Rikki-Tikki, ĉar Nago estas en la ĝardeno, kaj mi scias ke vi ne iras tien.

- Mia kuzo Ŝŭa, la rato, rakontis al mi..., komencis Ŝuŝundro.

Kaj tiam li haltis.

- Rakontis kion ?

- Ŝŝ ! Nago estas ĉie, Rikki-Tikki. Vi devintus paroli kun Ŝŭa en la ĝardeno.

- Mi ne parolis kun li... Do necesas diri al mi. Rapide, Ŝuŝundro, aŭ mi tuj mordos vin !

Ŝuŝundro sidiĝis, kaj ploris, tiom multe ke la larmoj fluis laŭlonge de liaj lipharoj.

- Mi estas tre kompatinda ulo, li plorsingultis. Mi neniam havas sufiĉe da kuraĝo por troti meze de ĉambroj... Ŝŝ ! Mi ne bezonas ion diri al vi... Ĉu vi ne aŭdas, Rikki-Tikki ?

Rikki-Tikki akriĝis la orelojn. La domo estis tiel kvieta kiel eblis, sed ŝajnis al li distingi nepercepteblan kra-kraⁿ... bruon tiel delikata kiel tiu de vespo paŝanta sur fenestra vitro... sekan gratbruon de skvamoj sur la briko.

- Estas Nago aŭ Nagino, li diris al si, kiu rampas tra la dukto de la banĉambro... Vi pravas, Ŝuŝundro, mi devintus paroli kun Ŝŭa.

Li enŝoviĝis en la banĉambrom de Teoĉjo, sed tie il trovis neniun, poste en la banĉambrom de la patrino de Teoĉjo. Malsupre de la gipse stukita muro, briko estis forigita por la trapaso de akvodukto, kaj ĉe la momento kiam Rikki-Tikki enŝoviĝis en la ĉambrom, laŭlonge de la speco de putmureto el masonaĵo kie la bankuvo estis metita, li aŭdis Nagoⁿ kaj Naginoⁿ flustri ekstere en la lunlumo :

- Kiam la domo estos malplena, diris Nagino al sia edzo, necesos ke li foriru; tiam ni reekposedos la ĝardenon. Eniru tute malrapide kaj rememoru ke la viro kiu mortigis Karaitoⁿ, estas la unua homo por mordi. Poste revenu diri al mi tion kio okazis, kaj ni kune postĉasos Rikki-Tikki^{on}.

- Sed ĉu vi certas ke estas io por gajni mortigante la

homojn ? demandis Nago.

- Ĉio por gajni. Kiam estis neniu en la bangalo, ĉu ni havis mungoton en la ĝardeno ? Tiel longe kiel la bangalo restas senhoma, ni estas reĝo kaj reĝino de la ĝardeno; kaj memoru ke tuj kiam niaj ovoj estos eloviĝintaj en la melonbedo... kiel ili povos esti morgaŭ... niaj infanoj bezonos spacon kaj trankvilon.

- Mi ne pensis pri tio, diris Nago. Mi tuj iros, sed estas neutile poste postkuri Rikki-Tikki^{on}. Mi mortigos la viron kaj lian edzinon, poste la infanon se mi povos, kaj trankvile foriros. Tiam la bangalo estos senhoma, kaj Rikki-Tikki foriros.

Rikki-Tikki tutkomplete ekstrems pro kolerego kaj malamo aŭdante tion. Poste li vidis la kapon de Nago eliri el la dukto, sekvita de la kvin futoj de sia longa korpo skvama, kaj malvarma. Tiel furioza kiel li estis, li tamen tre timis vidante la longon de la granda kobro. Nago kurbiĝis, levis la kapon kaj rigardis en la banĉambro, tra la mallumo kie Rikki-Tikki povis vidi liajn okulojn brilegi.

- Se mi nun mortigus lin en ĉi tiu loko, Nagino scius tion; kaj aliflanke, se mi rekte ekbatalus kontraŭ li sur la planko, la avantaĝoj estus por li... Kion fari ? pensis Rikki-Tikki.

Nago ondiĝis tie ĉi kaj tie, kaj Rikki-Tikki aŭdis lin trinki el la plej dika terkruĉo kiu utilis por plenigi la bankuvon.

- Jen kiu estas bone, diris la serpento. Nun kiam Karaito estis mortigata, la viro havis bastonon. Li ankoraŭ povas havi ĝin; sed kiam li matene venos al la bano, li ne havos ĝin. Mi atendos ĉi tie ĝis kiam li venos... Nagino... ĉu vi aŭdas min ?... Mi estas atendonta ĉi tie, en la malvarmeto, ĝis la tago.

Neniu respondo venis de ekstere, el tio Rikki-Tikki konkludis ke Nagino foriris. Nago refaldiĝis sur si mem, ringo post ringo, tute ĉirkaŭ la malkava fundo de la

terkruĉo, kaj Rikki-Tikki restis kvieta kiel la morto.

Post unu horo, li ekmoviĝis, muskolon post muskolo, al la terkruĉo. Nago estis dormanta, kaj Rikki-Tikki rigardadis lian grandan dorson, demandante al si kiu estus la plej bona loko por bona kapto.

- Se mi ne rompos al li la lumbojn ĉe la unua salto, Rikki diris al si, li ankoraŭ povos lukti; kaj... se li luktas... Ho Rikki !

Li konsideris la dikecon de la kolo sub la kapuĉo, sed estis tro multe por li; kaj mordo apud la vosto nur kolerigus Nagoⁿ.

- Necesas ke estu la kapo, li fine diris; ĉe la kapon super la kapuĉo; kaj kiam unufoje mi tie tenos lin, necesos ne plu malteni lin.

Do li saltis. La kapo kuŝis iom ekster la terkruĉo, sub la kurbo de sia ventro kaj ĉe la momento kiam liaj dentoj kroĉis, Rikki kontraŭstreĉis sian dorson laŭ la konvekseco de la argila kruĉo por najli la kapon al tero. Ĉi tio donis al li sekundon de kapto kiun li uzis kiel eble plej bone. Poste li estis trafita de dekstre kaj de maldekstre kiel rato skuita de hundo, antaŭen kaj malantaŭen sur la planko, supren kaj malsupren, kaj ronde laŭ grandaj cirkloj; sed liaj okuloj estis ruĝaj, kaj li rezistadis dum la korpo de la serpento travipis la plankon kiel vipo de plugilo, renversante la stanajn uzaĵojn, la sapujon, la broson por frotado kaj sonis kontraŭ la metala vando de la bankuvo. Kroĉante, li plistreĉis la enpremon de siaj makzeloj, ĉar li sentis sin certe svenbatota kaj, por la honoro de la familio, li preferis ke oni trovu lin kun la dentoj fermitaj sur sia predo. Malsana pro vertiĝo, disbatita de batoj, la ekfrapoj ŝajnis al li dispecigonta lin, kiam io eliĝis kiel fulmotondro ĝuste malantaŭ li; ia brulanta blovego senkonsciigis lin kaj flamo brunbruligis al li la harojn. La viro, vekita de la bruo, malŝargis la du pafiltubojn de sia fusilo sur Nago, ĝuste malantaŭ la kapuĉo.

Rikki-Tikki, kun la okuloj fermitaj, daŭrigis elteni, ĉar nun li estis tute certa ke li mortis; sed la kapo ne plu moviĝis kaj la viro, levprenante la mungoton, diris :

- Ĝi ankoraŭ estas la mungoto, Alico; kaj estas nia vivo kiun la etulo nun savis.

Tiam la patrino de Teoĉjo venis, kun la vizaĝo tute blanka, kaj kontemplis tion kio restis pri Nago; kaj Rikki-Tikki trenis sin ĝis la ĉambro de Teoĉjo, kie li pasigis preskaŭ la reston de la nokto skuante sin milde por ekscii ĉu li vere estis rompita en kvardek pecojn, kiel li imagis tion.

Kiam la mateno alvenis, li estis tre rigida, sed tre kontenta pri siaj heroaj faroj.

- Nun mi devas regali Naginoⁿ, kaj ŝi estos pli malbona ol kvin Nagoj; plie, kiu scias kiam la ovoj pri kiuj ŝi parolis eloviĝos... Dia boneco !... Necesas ke mi iru vidi Darzeoⁿ, li diris.

Sen atendi la matenmanĝon, Rikki-Tikki kuris al la dorna arbusto kie Darzeo laŭtvoĉe kantis triumfkanton. La novaĵo pri la morto de Nago faris la rondiron de la ĝardeno ĉar la balaanto ĵetis la korpon sur la sterkon.

- Ho ! Stulta tufo da plumoj, kolere diris Rikki-Tikki. Ĉu estas la momento por kanti ?

- Nago mortis... mortis... mortis ! kantis Darzeo. La brava Rikki-Tikki kaptis lin per la kapo kaj tute ne rezignis. La viro alportis la bastonon kiu faras bum^{on}, kaj Nago falis en du pecoj ! Li ne plu rekomencos manĝi miajn bebojn.

- Ĉio ĉi estas sufiĉe vera ! Sed kie estas Nagino ? demandis Rikki-Tikki, zorge rigardante ĉirkaŭ si.

- Nagino venis al la banĉambra dukto por alvoki Nagoⁿ, daŭrigis Darzeo; kaj Nago eliris sur la fino de bastono... la balaanto levprenis lin sur la fino de bastono, kaj ĵetis lin sur la sterkon !... Ni kantu la faman Rikki-Tikki^{on} kun ruĝa okulo !

Kaj Darzeo ŝvelis sian gorĝon kaj kantis.

- Se mi povus atingi vian neston, mi rulfaligus viajn

bebojn eksteren ! diris Rikki-Tikki. Vi ne scias fari aferojn en sia tempo. Vi estas tie en via nesto, sufiĉe sekure, sed ĉi tie, malsupre, estas por mi milito. Ĉesu kanti dum minuto, Darzeo.

- Por la amo de la fama, de la bela Rikki-Tikki, mi tuj ĉesos, respondis Darzeo... Kio estas, ho mortiganto de la terura Nago ?

- Por la tria fojo, kie estas Nagino ?

- Sur la sterko, apud la staloj, travivanta la funebnon pro Nago... Glora estas Rikki-Tikki, la heroo kun blankaj dentoj.

- Diablen miajn blankajn dentojn ! Ĉu vi iam aŭdis diri kien ŝi gardas siajn ovojn ?

- En la melonbedo, ĉe la fino, tutproksime al la muro, ĉe la loko kie la suno varmegas dum preskaŭ la tuta tago. Ŝi kaŝis ilin tie antaŭ semajnoj.

- Kaj vi neniam pensis ke tio indus diri tion al mi ?... Ĉe la fino, tutproksime al la muro, vi diras ?

- Rikki-Tikki... ĉu vi ne estas manĝonta ŝiajn ovojn ?

- Ne ĝuste manĝi ilin; ne... Darzeo, se restas al vi grajno da saĝeco, vi tuj flugos al la staloj, ŝajnigos havi rompitan flugilon, kaj lasos Nagino postĉasi vin ĝis tiu arbeto. Necesas al mi iri al la melonbedo, kaj se mi irus nun, ŝi vidus min.

Darzeo estis eta komplico kies la plumita cerbo ne povis teni samtempe pli ol unu ideon; kaj sciante ke la infanoj de Nagino naskiĝis el ovo, kiel siaj, ne ŝajnis al li unuavide, ke taŭgis detrui ilin. Sed lia edzino estis racia birdo, ŝi sciis ke la ovo de kobro signifis junajn kobrojn iom poste; tial ŝi forflugis el la nesto kaj lasis Darzeoⁿ varmigi la bebojn kaj daŭrigi sian kanton pri la morto de Nago. Darzeo, en kelkaj punktoj, multe aspektis kiel homoj.

Ŝi alflugetis apud la sterko, sub la nazo de Nagino, kaj ĝemis :

- Ho ! Mi havas rompitan flugilon !... La knabeto de la domo ĵetis al mi ŝtonon, kaj rompis ĝin.

Poste ŝi komencis flugeti pli malespere ol neniam.

Nagino levis la kapon kaj siblis:

- Estas vi kiu avertis Rikki-Tikki^{on} kiam mi volis mortigi lin. Sen mensogi, vi malbone elektis la lokon por lami.

Kaj ŝi sin direktis al la edzino de Darzeo glitante sur la polvo.

- La knabeto frakasis ĝin per ŝtonbato ! Kriis per akuta voĉo la edzino de Darzeo.

- Bone ! Tio povas esti konsoleto por vi, kiam vi estos morta, scii ke mi ankaŭ kaŭzos la morton de la knabeto. Mia edzo kuŝas sur la sterko ĉi-matene, sed antaŭ la nokto, la knabeto estos tre kviete kuŝanta en la domo... Por kio ja kuri ?... Mi certas kapti vin... Stultuletino, rigardu min !

La edzino de Darzeo tro multe sciis por fari tian aferon. Ĉar tuj kiam la okuloj de birdo renkontas tiujn de serpento, ĝi estas kaptita per tia timo, ke ĝi ne plu povas moviĝi. La edzino de Darzeo, dolore pepante, daŭrigis flugeti sen forlasi la grundon, kaj Nagino plivigligis sian rapidon.

Rikki-Tikki aŭdis ilin supreniri laŭ la pado kiu malproksimigis ilin de la staloj, kaj galopis al la ekstremo de la melonbedo piede de la muro. Tie, en la varma humnesto, super la melonoj, li trovis, lerte kaŝitajn, dudek kvin ovojn je la dikeco proksimume de la ovoj de la [kokino de Bantam](#)⁽²²⁾, sed kun blanketaj haŭtoj anstataŭ ŝeloj.

- Mi ne alvenis unu tagon tro frue, li diris.

Ĉar li povis vidi junajn kobrojn volvintajn ene de la haŭto, kaj li sciis ke tuj kiam ili eloviĝas, ili ĉiuj povas mortigi homon ne malpli ol mungoton. Li disiĝis per unu dentobato la pintojn de la ovoj tiel rapide kiel li kapablis, zorgante dispremi la junajn kobrojn, kaj plugante de tempo al tempo la

22 Raso de nana hejma kokino.

humneston por vidi ĉu li ne preterlasis iun. Fine, restis nur tri ovoj kaj Rikki-Tikki komencis kaŝridi, kiam li aŭdis la edzinon de Darzeo plejlaŭte krii :

- Rikki-Tikki, mi kondukis Naginoⁿ direkte al la domo..., ŝi eniris sub la verandon, kaj... Ho ! Rapide venu... ŝi volas mortigi !

Rikki-Tikki tretis du ovojn, falruliĝis el la melonbedo kun la tria ovo en la buŝo kaj kuregis al la verando tiel rapide kiel liaj kruroj kapablis porti lin.

Teoĉjo, lia patrino kaj lia patro estis tie antaŭ sia matenmanĝo. Sed Rikki-Tikki vidis ke ili nenion manĝis. Ili sin tenis en ŝtona senmoveco, kaj iliaj vizaĝoj estis blankaj. Nagino volviĝinta sur la maton, apud la seĝo de Teoĉjo, je oportuna distanco por atingi la nudan kruron de la juna knabo, balanciĝis tien kaj reen, kantante triumfkanton.

- Filo de viro kiu mortigis Nagoⁿ, ŝi siblis, restu kvietaa... Mi estas ne ankoraŭ preta... Atendu iom... Restu bone senmovaj, ĉiuj tri !... Se vi moviĝas, mi frapas... kaj se vi ne moviĝas, mi ankoraŭ frapas... Ho ! Malsaĝuloj kiuj mortigis mian Nagoⁿ !

La okuloj de Teoĉjo restis fiksitaj al lia patro, kaj ĉio kion lia patro povis fari, estis flustri :

- Restu kvietaa, Teoĉjo... Necesas ne movi... Teoĉjo, restu trankvile.

Estas tiam kiam Rikki-Tikki alvenis kaj kriis :

- Turnu vin, Nagino; turnu vin, kaj defendu vin !

- Por ĉiu faro estas horo, ŝi diris, sen movi la okulojn.

Mi reguligos post momento mian konton kun vi. Rigardu viajn amikojn, Rikki-Tikki. Ili estas senmovaj kaj blankaj... Ili estas timegigitaj... Ili ne kuraĝas moviĝi... Kaj se vi alproksimiĝas per unu paŝo, mi frapas.

- Iru rigardi viajn ovojn, diris Rikki, en la melonbedo apud la muro. Iru vidi, Nagino !

La granda serpento duonturniĝis, kaj vidis la ovon sur la

planko de la verando.

- Ha... a! Donu ĝin al mi, ŝi diris.

Rikki-Tikki metis siajn krurojn ambaŭflanke de la ovo, dum liaj okuloj fariĝis sangoruĝaj.

- Kiu prezo por serpenta ovo ?... Por juna kobro ?... Por juna kobro-reĝo ?... Por la lasta... la lasta el la lastaj de la kovitaro ? La formikoj estas manĝantaj ĉiujn aliajn sur la tero apud la melonoj.

Nagino piruetis sur si, forgesante la tutan ceteraĵon por la savo de la sol sola ovo; kaj Rikki-Tikki vidis la patron de Teoĉjo rapide antaŭenigi larĝan manon, ekkapti Teoĉjoⁿ ĉe la ŝultro kaj forpreni lin super la tablon kaj la tetasojn, ŝirmite kaj neatingebla de Nagino.

- Ŝtelita! Ŝtelita! Ŝtelita! Rik-tik-tŝk! triumfe ridklukis Rikki-tikki. La infano estas sekura, kaj estas mi... mi... mi... kiu kaptis Nagoⁿ ĉe la kapuĉon dum la pasinta nokto, en la banĉambro.

Poste li komencis salti ĉiuflanden, per la kvar kruroj kune, revenante por flugtuŝi la plankon per la kapo.

- Li ĵetis min de flanko al alia, sed li ne sukcesis igi min malteni. Li estis morta antaŭ ol la viro duigis lin... Estas mi kiu faris tion! Rikki-Tikki-Tŝk-Tŝk!... Venu, Nagino. Venu kaj ni batalu! Vi ne longe estos vidvino.

Nagino vidis ke ŝi estis perdinta ĉiun eblecon mortigi Teoĉjoⁿ, kaj la ovo kuŝis inter la kruroj de Rikki-Tikki:

- Donu al mi la ovon, Rikki-Tikki. Donu al mi la lastan el miaj ovojn, kaj mi foriros por neniam plu reveni, ŝi diris, mallevante sian kapuĉon.

- Jes, vi foriros kaj vi neniam plu revenos; ĉar vi iros sur la sterkon por kuniĝi kun Nago. Defendu vin, vidvino! La viro iris serĉi sian fusilon! Defendu vin!

Rikki-Tikki saltegis tute ĉirkaŭ Nagino, sin tenante ĝuste ekster la trafpovo de la batoj, kun liaj malgrandaj okuloj kiel du braĝoj. Nagino kuntiriĝis kaj sin ĵetegis sur

lin. Rikki-Tikki faris salton en la aeron kaj refalis malantaŭen. Unu fojo, iu alia, poste ankoraŭ, ŝi volis bati lin, sed ĉiufoje ŝia kapo frapis kun obtuzan bruon kontraŭ la maton de la verando, dum ŝi spirale rekuntiriĝis kiel risorto de poŝhorloĝo. Poste Rikki-Tikki ronde dancis por alveni malantaŭ ŝin, kaj Nagino turniĝis por resti vidalvide al li... kaj la brueto de ŝia vosto sur la mato sonis kiel sekaj folioj forblovitaj de la vento.

Rikki-Tikki estis forgesinta la ovon. Ĝi ankoraŭ kuŝis sub la verando kaj Nagino iom post iom proksimiĝis al ĝi, ĝis kiam fine, dum Rikki-Tikki reakiris spiron, ŝi ekkaptis ĝin en sian buŝon, sin direktis al la ŝtupoj de la verando kaj malsupreniris laŭ la pado kiel sago, Rikki-Tikki malantaŭ ŝi.

Kiam la kobro kuras por savi sian vivon, li alprenas la aspekton de vipŝnuro kiu travipus la kolon de ĉevalo. Rikki-Tikki sciis ke necesis al li atingi ŝin, aŭ ke ĉio estus por refari. Nagino rekte rapidegis direkte al la longaj herboj, apud la dorna arbusto, kaj kurante, Rikki-Tikki aŭdis Darzeoⁿ ankoraŭ kantantan sian absurdan triumfkanteton. Sed la edzino de Darzeo, pli saĝa, forlasis sian neston vidante Naginoⁿ alveni, kaj frapis siajn flugilojn ĉirkaŭ lia kapo. Se Darzeo helpintus ŝin, ili povus reenirigi ŝin. Sed Nagino nur mallevis sian kapuĉon, kaj daŭrigis sian vojiron. Tamen tiu paŭzmomento alvenigis Rikki-Tikki^{on} sur ŝin, kaj ĉar ŝi eniĝis en la ratruo kie ŝi kaj Nago kutimis loĝi, la malgrandaj blankaj dentoj de Rikki-Tikki fermiĝis sur ŝia vosto, kaj li eniris malantaŭ ŝi. Nu tre malmulte da mungotoj, kiaj ajn estu ilia saĝeco kaj ilia sperto, zorgus sekvi kobron en ĝian truon. Estis mallume en la truon; kaj kiel scii ĉu ĝi ne estis vastiĝonta kaj dononta sufiĉan spacon al Nagino por sin turni kaj frapi ! Li kolere alkroĉiĝis kun la piedoj disigitaj por roli kiel bremsajn sur la malhelaj deklivoj de la varmeta kaj duonmalseka humtero. Poste la herbo ĉirkaŭ la buŝo de la truon ĉesis moviĝadi, kaj Darzeo diris :

- Estas finita pri Rikki-Tikki ! Necesas al ni kanti lian mortkanton... La brava Rikki estas morta !... Ĉar Nagino certe mortigos lin subtere.

Pro tio li ekkantis kanton el la plej funebrecan, kiun li improvizis sub la efiko de la emocio. Kaj, kiam li precize alvenis al la plej kortuŝa parto, la herbo denove tremetis, kaj Rikki-Tikki, kovrita de tero, sin trenis ekster la truon, unu kruron post la alia, lekante al si la lipharojn. Darzeo haltis kun surpriza krieto. Rikki-Tikki iom skuis la polvon kiu makulis sian felon kaj ternis.

- Estas finita, li diris. La vidvino neniam plu revenos.

Kaj la ruĝaj formikoj, kiuj loĝas inter la tigoj de herbo, aŭdis lin kaj malsupreniris laŭ longaj procesioj por vidi ĉu li diris vere.

Rikki-Tikki buligis sin en la herbojn kaj dormis tie kie li estis... dormis, dormis ĝis malfrua horo de posttagmezo, ĉar li plenumis malfacilan tagon de laboro.

- Nun, li diris, kiam li vekigis, mi tuj iros hejmen.

Rakontu al kupristo⁽²³⁾, Darzeo, por ke li rakontu tion al la ĝardeno, ke Nagino mortis.

La kupristo estas birdo kiu faras bruon tute similan al la bato de malgranda martelo sur kupra vazo; kaj se li ĉiam faras tiun bruon, estas ĉar li estas la publika anoncisto de ĉiu hindua ĝardeno, kaj li rakontas la novaĵojn al tiuj kiuj bonvolas aŭdi ĝin.

Kiam Rikki-Tikki reiris laŭ la pado, li aŭdis lin preludi per la notoj pri sia "gardu vin", kiel unu el tiuj malgrandaj gongoj sur kiuj oni anoncas la tagmanĝon; poste sonis la monotona "Ding-dong-tok !" Nago estas morta... "dong" ! Nagino estas morta ! "Ding-dong-tok !" Je ĉi tiu signalo, ĉiuj birdoj komencis kanti en la ĝardeno, kaj la ranoj kvaki; ĉar Nago kaj Nagino kutimis manĝi ranojn tiel bone kiel

23 Birdo konata pro lia alvoko kiu similis al kaldronisto batanta metalon per martelo.

birdojn.

Kiam Rikki revenis en la domon, Teoĉjo kaj la patrino de Teoĉjo (ŝi ankoraŭ aspektis tre pala ĉar ŝi svenis) kaj la patro de Teoĉjo eliris renkonte al li, kaj preskaŭ ploris pro kormoliĝo pri li. Tiun vesperon li manĝis ĉion kion oni donis al li, ĝis ne plu povi manĝi pli, kaj li enlitiĝis, portita sur la ŝultro de Teoĉjo, kie la patrino de Teoĉjo ankoraŭ retrovis lin, revenante pli malfrue, dum la nokto.

- Li savis al ni la vivon kaj tiun de nia filo, ŝi diris al sia edzo. Ĉu vi pensas pri tio ?... Li savis la vivon al ni ĉiuj !

Rikki-Tikki abrupte vekigis, ĉar la mungotoj dormas malprofunde.

- Ho ! Estas vi ! li diras. Pri kio vi turmentiĝas ? Ĉiuj kobroj estas mortaj; kaj se restus iu..., mi ĉeestas.

Rikki-Tikki prave povis fieri pri si; sed li ne fariĝis tro fiero pri ĝi, kaj li ekde nun gardis ĉi tiun ĝardenon kiel vera mungoto... per la dento kaj per la poplito, tiel bone ke neniam kobro maltemis montri sian kapon ene de la muroj.

* * *

Tajloro kaj kantoro mi estas,
Mi scias duoblajn plezurojn;
Fiera pri mia vigla kanto,
Fiera kudri mian domon.

Supren, poste suben, tiel mi teksis mian muzikon, mian domon.

Patrino, relevu la kapon !
Neniom da danĝero kiu minacas nin;
Kantu ankoraŭ al viaj idoj,
Mortinta, en la ĝardeno kuŝas morto.

La teruro kiu dormis sub la rozoj, dormas sur la sterko, senmova kaj morta.

Kiu do liberigas nin, kiu ?
Kiu estas lia tute potenca nomo ?
Estas la pura, la fama Rikki
Tikki kies okulo estas el sango...

Rik-tikki-tikki kun adoleska eburo, la ĉasisto kies okulo estas el sango !

Danku lin per gracoj, birdoj,
Kun vosto laŭ oriflamo,
Najtingalo, donu vortojn...
Ne, ĉar lia laŭdo bezonas min.

Aŭskultu, mi kantas laŭdon al Rikki, ho fiero vosto, flama okulo !...

LA ODO DE DARZEO.

(Kantita honore al Rikki-Tikki-tavi).

* * *

(Ĉi tie Rikki-Tikki interrompis, tiel la resto de la kanto estas perdita).

Toomaj de la Elefantoj.

*Mi memoras de kiu mi estis. Mi rompis ŝnuron kaj ĉenon.
Mi memoras pri mia arbarego kaj pri mia malnova vigleco.
Mi ne plu volas vendi mian dorson por fasko da kanoj,
Mi volas reiri al miaj samranguloj, al la verdaj loĝejoj
de la fermitaj kopsoj :*

*Mi volas foriri ĝis la tago, foriri je la nova mateno.
Inter la pura kiso de la ventoj, la klara kareso de la akvo :
Mi forgesos la ringon de mia piedo, la piedligilon kiu volas
submeti min.
Mi volas revidi miajn malnovajn amojn, la ludojn de miaj
fratoj sen mastro.*

Kala Nago⁽²⁴⁾ - alidire Nigra Serpento - servis al la registaro de Hindio, laŭ ĉiuj manieroj per kiuj elefanto povas servi, dum kvardek sep jaroj; kaj ĉar li estis almenaŭ dudek jaraĝa kiam li estis kaptita, tio nune faris al li ĉirkaŭ sepdek jarojn, la matura aĝo por la elefantoj.

Li memoris esti puŝanta per dika leda pufaĵo ligita sur la frunto, por liberigi kanonon enkotigitan en profunda koto; kaj tio estis antaŭ la afgana milito de 1842, kiam li ankoraŭ ne atingis la plenecon de sia forto. Lia patrino, Radhao Pjari⁽²⁵⁾ - Radhao la favoratino - kaptita dum la sama ĉaso ol li, ne neglektis diri al li, antaŭ ol liaj malgrandaj dentoj, liaj infanaj dentegoj, falis : "La elefantoj kiu timas, ĉiam trafiĝas de doloro"; kaj Kala Nago sciis ke la konsilo estis saĝa, ĉar la unuan fojon kiam li vidis obuson eksplodi, li retropaŝis kriante, faligis vicon da fusiloj faskigitaj, kaj la bajonetoj pikis lin ĉe liaj plej molaj partoj. Tial antaŭ ol li

24 Kâla signifas tempon en sanskrito sed ankaŭ la nigran koloron → Kala nago = Nigra kobro

25 Pyari el la hindia, kun la signifo de "aminda".

estis dudek kvin jaraĝa, estis por li finita timi, kaj li fariĝis la plej amata kaj la plej bone prizorgata elefanto ĉe la servo de la registaro de Hindio. Li transportis tendojn, dek du cent funtojn (+/-600Kg) da tendoj, dum la paŝado tra Supra Hindio; li estis suprentirita sur ŝipon ĉe la fino de vaporgruo; kaj post tagoj kaj tagoj de travojaĝo, oni devigis lin porti haŭbizon sur la dorso tra stranga kaj malglata lando, tre for de Hindio; li kontemplis la imperiestron **Teodoro**ⁿ etenditan mortan en **Magdala**; poste revenis per la sama vaporŝipo, kun ĉiuj titoloj, diris la soldatoj, ĉe la medalo de Abisenio. Li vidis siajn kunulajn elefantojn morti pro malvarmo, pro epilepsio, pro malsato kaj pro sunfrapo en loko nomita **Ali Musjid**, dek jarojn pli poste; poste li estis sendita suden je miloj da mejloj (1000mejlaj = +/-1600Km) por tiri kaj stakigi dikajn trabojn el tektona ligno, en la lignejoj de **Molamjajn**. Tie, li duonmortigis junan malobeeman elefanton kiu volis eviti sian justan parton de laboro. Post tio, li forlasis la transporton de ĉarpentlignoj, kaj oni dungis lin, kun kelkaj dudekoj da kunuloj dresitaj por tiu tasko, por helpi al la kapto de sovaĝaj elefantoj en la montaroj de **Garo**.

La elefantojn ! La Registaro de Hindio prizorgas ilin kun ĵaluza zorgo : ĝi havas tute kompletan servon kiu okupas sin nur spuri, kapti, dresi kaj sendi ilin al unu fino de la lando aŭ al la alia laŭ la bezonoj de la laboro.

Kala Nago stare estis almenaŭ dek futojn (+/-3m) alta ĉe la ŝultroj; liaj dentegoj estis stumpigitaj je kvin futoj (+/-1,5m) kaj por malebligi ilin fendiĝi, oni provizis iliaj finoj per kupraj bendoj; sed li kapablis uzi ĉi tiujn stumpojn pli bone ol iu ajn ne dresita elefanto siajn verajn akrajn dentegojn. Kiam, post semajnoj kaj semajnoj pasigitaj por zorge alpeli la disajn elefantojn en la montoj, la kvardek aŭ kvindek sovaĝaj monstroj estis pelitaj en la lastan ĉirkaŭbaritejon, kaj la dika heroso, farita el ligitaj arbotrunkoj, falis kun bruego malantaŭ ili, Kala Nago, ĉe la unua komando, eniris en

ĉi tiun pandemonion de fajroj kaj elefantblekoj (estis ĝenerale en plennokto, kaj la flagrema lumo de la torĉoj malfaciligis juĝi la distancojn) : li elektis en la tuta bando la plej sovaĝa el la portantoj de dentegoj, kaj turmentis lin kaj taŭzis lin ĝis redukti lin al kvieto, dum la viroj rajdintaj sur la dorsoj de la aliaj elefantoj, ĵetis kaptoŝnuron al la plej malgrandaj kaj ligis ilin. Estis nenio pri la batalarto kiun Kala Nago, la maljuna kaj saĝa Nigra Serpento, ne sciis : li pli ol unu fojon, eltenis dum sia tempo la sturmon de la vundita tigro, kaj kun sia karna rostro zorge volvita por eviti akcidentojn, li frapis flanken en la aeron, per rapida kapbato laŭ la movo de falĉilo, la eksaltantan bestion - bato de sia propra invento - renversis ĝin kaj, genuiĝanta sur ĝin per la tuta pezo de siaj imponaj genuoj, li elpremis el ĝi la vivon kun stertoro kaj hurlo; tiam restis sur la grundon nur stria, taŭzita ruinulo kiun li tiris per la vosto.

- Jes ! diris Granda Toomaj, lia mahuto - la filo de Toomaj la Nigrulo kiu forkondukis lin al Abisinio, kaj la nepo de Toomaj de la Elefantoj kiu vidis kapti lin - estis nenio en la mondo kiun timis la Nigra Serpento, krom mi. Li vidis tri generaciojn de nia familio nutri kaj strigli lin, kaj li vivos por vidi la kvaran.

- Li ankaŭ timas min ! diris Malgranda Toomaj, starante sin plengrande, kvar futojn (+/-1,2m), sen alia vesto ol ŝirpeco da ŝtofo.

Li estis dekjara; li estis la plejaĝa filo de Grand Toomaj, kaj laŭ la kutimo, li prenis la postenon de sia patro sur la kolo de Kala Nago, kiam li mem estos plenkreska, kaj manuzus la pezan *ankus*^{ph(26)} el fero, la pikilo por elefantoj, kiun la manoj de sia patro, de sia avo kaj de sia praavo, estis polurinta. Li sciis tion kion li diris; ĉar li naskiĝis en la ombro de Kala Nago, li ludis per la pinto de lia rostro antaŭ ol scii

26 Hindia vorto kies mi ne trovis bonan tradukon. Ĝi estas la metala pika hokstango uzata de mahutoj por dresi la elefantojn.

paŝi, li malsuprenirigis lin en la akvon de kiam li sciis paŝi, kaj Kala Nago ne havus la ideon malobei al la akutan voĉeton kiu kriis al li liajn ordonojn, ne pli ol li havus la ideon mortigi la etan brunan bebon, la tagon kiam Granda Toomaj alportis lin sub la dentegojn de Kala Nago kaj ordonis al li saluti tiun kiu estos lia mastro.

- Jes, diris Malgranda Toomaj, li timas min.

Kaj li paŝis per longajn paŝojn al Kala Nago, nomis lin "maljunan grasan porkon", kaj igis lin levi la piedojn unu post la alia.

- Ŭah ! diris Malgranda Toomaj, vi estas dika elefanto.

Kaj li skuis sian taŭzitan kapon, ripetante tion kion diris lia patro :

- La registaro povas ja pagi la prezon de la elefantoj, sed estas al ni, mahutoj, ke ili apartenas. Kiam vi estos maljuna, Kala Nago, venos kelka riĉa Raĝo kiu aĉetos vin al la Registaro, pro via staturo kaj viaj bonaj manieroj, kaj vi havos nenion pli por fari ol porti orajn ringojn al viaj oreloj, oran baldakenon sur via dorso, ruĝajn drapiraĵojn kovritaj de oro sur viaj flankoj kaj paŝi ĉe la kapo de la reĝa procesio. Tiam mi estos sidanta sur via kolo, ho Kala Nago, kun ankus^o el arĝento en la mano, kaj homoj kuros antaŭ ni, kun oraj bastonoj, kriante, "Lasu pasi la elefanton de la Reĝo !" Tio estos bela, Kala Nago, sed ne tiel bela kiel ĉasi en la ĝangaloj.

- Pa ! diris Granda Toomaj, vi estas nur knabeto kaj tiel sovaĝa kiel bubalido. Tiu maniero pasigi sian vivon por kuri de supre malsupren de la montoj ne estas tio kio estas la plej bona en servo de la Registaro. Mi maljuniĝas kaj mi ne ŝatas sovaĝajn elefantojn. Donu al mi elefantajn liniojn, el brikoj, stalon por besto, solidajn palisojn por ŝnurligi ilin sekure, kaj larĝajn glatajn vojojn por spertigi ilin anstataŭ ĉi tiu iroreiro ĉiam en nomada tendaro... Ha ! La kazernoj de **Kanpuro** estis bonaj. Estis tute proksime bazaro, kaj nur tri laborhoroj

tage.

Malgranda Toomaj memoris la elefantajn liniojn de Kanpuro kaj diris nenion. Li multe preferis la tendaran vivon, kaj malŝatis la larĝajn, glatajn vojojn, la ĉiutagan disdonadon de fojno ĉe la furaĝa provizejo, kaj la longajn horojn kiam estis nenio farenda krom priatenti Kala Nagoⁿ surloke moviĝadantan inter siaj palisoj. Tio kion ŝatis Malgranda Toomaj estis la grimpado laŭ la implikitaj vojoj kiujn nur elefanto povas akcepti, kaj poste la malsupreniro al la valo, la mallonga apero de sovaĝaj elefantoj paŝtiĝantaj je mejlojn for, la fuĝo de apro; de pavo timigitaj sub la piedoj de Kala Nago, la varmaj blindigaj pluvoj, kiam ĉiuj montetoj kaj valoj fumis, la belaj matenoj plene de nebulo, kiam neniu sciis kie vespere ni kampadus, la pacienca kaj zorgema postsekvo de sovaĝaj elefantoj, kaj la freneza kuro, la flamoj kaj la tohuvabohuo de la lasta nokto, kiam ili venis torente enfali ene de la palisarojn, kiel rokoj en terfalo, malkovris la neeblecon eliri el ĝi, kaj sin ĵetis kontraŭ la masivaj fostoj, por fine esti repelitaj de krioj, de flagraj torĉoj kaj de salvoj da blankaj kartoĉoj. Tie, eĉ knabeto povis sin utile okupi, kaj Toomaj helpis tiom kiom tri knabetoj. Li tenis sian torĉon kaj svingis ĝin, kaj kriis kiel eble plej bone. Sed la vera bona tempo estis kiam oni komencis elirigi la elefantojn, kiam la *keddah*⁽²⁷⁾, tio estas la palisaro, similis pentraĵon de la mondfino, kaj kiam, ne plu kapablante sin aŭdi unu la aliajn, la viroj devis signi unu la aliajn. Tiam Malgranda Toomaj, kun liaj nigraj haroj, blankigitaj de la suno, ondiĝantaj sur liaj ŝultroj kaj kun aspekto de koboldo en la torĉlumo, grimpis sur unu el la skuitaj fostoj; kaj tuj ĉe la unua kvietiĝo, oni aŭdis la akutajn kriojn de kuraĝigo kiujn li ĵetis al Kala Nago inter la elefantblekoj kaj la krakoj, la klakado de la ŝnuroj, kaj la muĝadoj de piedligitaj elefantoj.

27 Hindia vorto kiu nomas ĉirkaŭbaritejon por la elefantoj.

- *Maîl, maîl, Kala Nago !* (Nu, nu, Nigra Serpento !)
- Dant do !* (Iu dentega batego !)
- Somalo ! Somalo !* (Atentu ! Atentu !)
- Maro ! Mar !* (Frapu, frapu !)
- Arre ! Arre ! Hai ! Hai ! Kya-a-ah !* (Gardu vin pri la fosto !)

Kaj la grava batalo inter Kala Nago kaj la sovaĝa elefanto iris ĉi tie kaj tien tra la *keddah*⁽²⁷⁾, kaj la maljunaj kaptantoj de elefantoj viŝis ŝviton kiu inundis iliajn okulojn, kaj trovis la tempon por aldirekti kapsignon al Malgranda Toomaj, tute svingodancante pro ĝojo sur la supro de la fosto.

Li faris pli ol svingodanci ! Iam nokte, li lasis sin gliti de supre de sia fosto, enŝoviĝis inter la elefantoj, levprenis la liberan finon de ŝnuro falita grunden, kaj vigle ĵetis ĝin al la viro kiu provis kapti malgrandan ribelemulon (la junuloj ĉiam donas pli da malfacilaĵo ol la plenkreskuloj). Kala Nago vidis lin, ekprenis lin per sia rostro, transdonis lin al Granda Toomaj kiu tuj vangofrapis lin, kaj relokis lin sur la foston. La morgaŭon matene li admonis lin kaj diris al li :

- Bonaj elefantaj linioj , el brikoj, kaj kelkaj tendoj por porti, ĉu tio ne sufiĉas, ke vi bezonu iri memstare kapti elefantojn, eta sentaŭgulo ? Jen nun, ĉi tiuj kompatindaj ĉasistoj, kies salajro ne proksimas la mian, parolis pri la afero al mastro Petersen.

Malgranda Toomaj ektimis, li ne sciis multe pri la blankuloj, sed mastro Petersen estis por li la plej grava blankulo en la mondo : li estis la ĉefo de ĉiuj operacioj en la *keddah*⁽²⁷⁾, tiu kiu kapis ĉiujn elefantojn por la registaro de Hindio, kaj kiu pli sciis pri la kutimoj kaj moroj de la elefantoj ol iu ajn homo en la mondo.

- Kio ! Kio povas okazi ? diris Malgranda Toomaj.

- Tio kio povas okazi, tutsimple la pli malbonaĵo, mastro Petersen estas frenezulo : alie, kial li irus ĉasi ĉi tiujn sovaĝajn demonojn ?... Li eĉ povas postuli de vi fariĝi ĉasisto

de elefantoj por iri dormi ien ajn, en tiuj malkvietaj ĝangaloj, por iam esti finfine surpaŝita en la *keddah*⁽²⁷⁾. Estas feliĉe ke ĉi tiu malsaĝaĵo finiĝas sen akcidento. La venontan semajnon, la ĉaso finiĝos, kaj ni ja, de la ebenaĵoj, ni reiros al niaj postenoj. Tiam ni paŝos sur bonajn stratojn kaj ni ne plu pensos pri ĉio ĉi. Sed, filo, mi koleras ĉar vi enmiksigis en ĉi tiu tasko : estas la afero de tiuj homoj de **Asamio**, tiuj fiaj vaguloj de la ĝangalo. Kala Nago volas obei al neniu krom mi, tial mi devas iri kun li al la *keddah*⁽²⁷⁾. Sed li estas nur elefanto por batalo, kaj li ne helpas por ligi la aliajn; estas tial kial mi restas komforte sidanta, kiel taŭgas por mahuto - ne ia simpla ĉasisto ! - iu mahuto, mi diris, iu viro kiu ricevas pension ĉe la fino de sia servo. Ĉu la familio de Toomaj de Elefantoj estas farita por sin vidi tretata de piedoj en la koto de iu *keddah*⁽²⁷⁾ ? Malbonkondukta !

Malbona ! Maldigna filo ! Iru lavi Kala-Nagoⁿ, atentigu pri liajn orelojn, kaj vidu ĉu li ne havas dornojn en la piedoj; alie mastro Petersen tre certe kaptos vin, kaj faros de vi sovaĝan ĉasiston,... unu el tiuj estuloj kiuj postsekvas la spurarojn de elefantoj, iun ĝangalan urson. Pu ! Fi do ! Iru !

Malgranda Toomaj foriris sen diri vorton, sed li rakontis ĉiujn siajn plendmotivojn al Kala Nago dum li ekzamenis liajn piedojn.

- Tio ne gravas, diris Malgranda Toomaj, kuspante la randon de lia grandega dekstra orelo : ili diris mian nomon al mastro Petersen, kaj eble... eble... kiu scias ?... Aj ! Jen dika dorno kiun mi forprenis de vi !

La kelkaj sekvaj tagoj estis uzitaj por kunigi la elefantojn, por irigi inter du malsovaĝigitaj elefantoj la nove kaptitajn bestojn, por ne havi tro da embarasoj per ili vojirante suden, al la ebenaĵojn, poste por kolekti la kovrilojn, la ŝnurojn kaj ĉio kio povintus esti difektita aŭ perdita en la arbarego. Mastro Petersen venis sur la dorson de sia inteligenta Pudmini : li estis irinta kalkuli ilian salajron

ĉe aliaj tendaroj en la montoj, ĉar la sezono ekfinesiĝis; kaj nun sidinta ĉe tablo sub arbo, indiĝena komizo elpagis ilian salajron al la mahutoj. Tuj pagita, ĉiu viro reiris al sia elefanto kaj rekuniĝis kun la linio kiu sin tenis preta por foriri. La ĉaspelistoj, la ĉasistoj, la gvidantoj, ĉiuj viroj de la regula *keddah*⁽²⁷⁾, kiuj restas en la ĝangaloj unu jaron sur du, estis rajdintaj sur la dorso de la elefantoj apartenantaj al la konstantaj fortoj de mastro Petersen, aŭ apogintaj kontraŭ la trunkoj de arboj, kun ilia fusilo transverse en la brakoj; ili moketis la mahutojn kiuj foriris, kaj ridis kiam la nove kaptitaj elefantoj rompis la vicadon por kuri al ĉiuj flankoj. Granda Toomaj direktis sin al la komizo kun Malgranda Toomaj malantaŭ li, kaj Maŝua Appa, la ĉefo de la ĉaselistoj, duonlaŭte diris al unu el siaj amikoj :

- Jen bona semo de ĉasisto kiu forflugas ! Estas kompatindaĵo sendi ĉi tiun junan koko de ĝangalo por transformiĝi en la ebenaĵoj.

Nu, mastro Petersen havis orelojn tute ĉirkaŭ la kapo, kiel devas havi homo kiu pasigas sian vivon aŭskulti la plej senbruan el vivantaj estuloj, la sovaĝan elefanton. Li turnis sin sur la dorson de Pudmini kie li kuŝis laŭ sia tuta longeco, kaj diris :

- Kio do estas ? Mi ne sciis ke ekzistis viro inter la ĉasistoj de la ebenaĵo, kiu havis sufiĉe da kapablon por ligi eĉ mortan elefanton.

- Li ne estas viro, sed infano. Li eniris en la *keddah*⁽²⁷⁾, dum la lasta preno, kaj ĵetis la ŝnuron al Barmao, jen li, kiam ni provis forigi de lia patrino tiun junan elefanton kiu havas verukon sur la ŝultro.

Maŝua Appa fingre montris Malgrandan Toomaj^{on}, mastro Petersen rigardis lin, kaj Malgranda Toomaj kliniĝis al la grundo.

- Li, ĵeti ŝnuron ? Li ne estas pli alta ol keĵlo por paliseto... Knaĉjo, kiel vi nomiĝas ? diris mastro Petersen.

Malgranda Toomaj tro timis por movi la buŝon, sed Kala Nago estis malantaŭ li; la infano signis per la mano, kaj la elefanto levis lin per sia rostron kaj tenis lin ĉe la nivelo de la frunto de Pudmini, fronte al la granda mastro Petersen. Tiam Malgranda Toomaj kovris al si la vizaĝon per siaj manoj, ĉar li estis nur infano, kaj krom pri tio kio tuŝis la elefantojn, li estis tiel timema kiel infano povas tiel esti.

- Ho ! Ho ! diris mastro Petersen ridetante sub siaj lipharoj, kaj kial vi lernigis al via elefanto tiun artifikon ? Ĉu estas por helpi vin ŝteli verdan tritikon de la tegmentoj de la domoj kiam oni metas la spikojn por sekigi ?

- Ne la verdan tritikon, Protektanto de la Malriĉulo... la melonojn, diris Malgranda Toomaj.

Kaj ĉiuj viroj sidintaj ĉirkaŭe plenigis la aeron per rideksplodo. La plejmulto el ili lernigis tiun artifikon al siaj elefantoj kiam ili estis knaboj. Malgranda Toomaj pendiĝis je ok futojn (+/-2,5m) en aero, kaj li treege dezirintus esti ok futojn subteren.

- Li estas Toomaj, mia filo, mastro ! diris Granda Toomaj, kuntirante la brovojn. Li estas malbona infano, kaj li finiĝos en malliberejo, mastro.

- Pri tio, vi permesos al mi pridubi ! diris mastro Petersen. Knabo, kiu en lia aĝo, maltimas alfronti plenan *keddah*⁽²⁷⁾ ne finiĝas en malliberejo... Prenu, knabo, jen kvar *annoj*⁽²⁸⁾ por aĉeti bombonojn, ĉar vi havas veran kapeton sub tiu granda stoplejo da haroj. Je la venonta momento, vi ankaŭ povos fariĝi ĉasisto.

Granda Toomaj sulkigis la brovojn pli forte ol neniam.

- Memoru tamen, ke la *keddah*⁽²⁷⁾ ne estas lokoj kie devas ludi la infanoj ! aldonis mastro Petersen.

- Ĉu necesos neniam iri tien, mastro ? demandis Malgranda Toomaj kun dika suspiro.

28 Malnova angla monero uzata en Hindio kaj Pakistano (= 1/16 rupio).

- Jes ! respondis denove ridetante mastro Petersen. Kiam vi estos vidinta la elefantojn danci !... Estos la momento... Venu trovi min kiam vi estos vidinta la elefantojn danci, kaj tiam mi lasos vin eniri en ĉiujn *keddah^{ojn(27)}*.

Estis alia eksplodo de ridadoj, ĉar la ŝerco estas malnova inter ĉasistoj de elefantoj : estas maniero diri neniam. Estas, kaŝitaj for en la arbaregoj, grandaj glataj maldensejoj kiujn oni nomas la "balejoj de la elefantoj", sed oni malkovras ilin nur hazarde, kaj neniu homo iam vidis la elefantojn danci. Kiam ĉasisto fanfaronas pri sia lerteco kaj pri sia braveco, la aliaj diras al li :

- Kaj kiam vi vidis la elefantojn danci ?

Kala Nago remetis Malgrandan Toomaj^{on} sur la grundon, kaj la infano denove kliniĝis tre malalten, foriris kun sia patro kaj donis la arĝentan moneron de kvar annoj al sia patrino, kiu nutris lastnaskiton. Poste la tuta familio lokiĝis sur la dorson de Kala Nago, kaj la vico da elefantoj, grumblanta, krianta, disvolviĝis laŭlonge de la monta vojo al la ebenaĵo. Estis tre movoplena paŝado, pro la novaj elefantoj kiuj kaŭzis embarason ĉe ĉiu vadejo, kaj kiuj necesis flati aŭ frapi ĉiujn du minutojn.

Granda Toomaj ĉagrene gvidis Kala-Nagoⁿ ĉar li estis tre malkontenta. Koncerne Malgrandan Toomaj^{on}, li estis tro feliĉa por paroli : mastro Petersen rimarkis lin kaj donis al li monon; tial li spertis tion kion spertis simpla soldato elvokita el la rangoj por ricevi laŭdojn de sia ĉefkomandanto.

- Kion volas diri mastro Petersen per la danco de la elefantoj ? li fine mallaŭte demandis al sia patrino.

Granda Toomaj aŭdis lin kaj grumblis :

- Ke vi neniam estos unu el tiuj bubaloj de monto, la ĉaspelistoj. Jen tio kion li volis diri... He ! tien, vi, fronten, kio baras la vojon ?

Mahuto, kun du aŭ tri elefantoj antaŭe, iu viro de Asamio, sin turnis, kolere kriante :

- Venigu Kala-Nagoⁿ, kaj draŝu por mi ĉi tiun adoleskanton kiun mi tie havas, por instrui al li sin teni. Kial mastro Petersen elektis min por vojiri kun vi ja, azenoj de rizejo !... Gvidu vian beston flanken, Toomaj, kaj lasu lin labori per la dentegoj... Inter ĉiuj Dioj de la montoj, ĉi tiuj novaj elefantoj estas demonaj... aŭ ili flaras siajn kamaradojn en la ĝangalo !

Kala Nago frapis la novulon en la ripojn ĝis perdiĝi al ĝi la spiron, dum Toomaj diris :

- Ni senigis la montojn de sovaĝaj elefantoj, dum la lasta ĉaso. Estas nur pro la neglektemo per kiu vi kondukas ilin. Ĉu mi estas taskita pri ordo laŭ la tuta longo de la vico ?

- Aŭskultu lin ! kriis la alia mahuto : "Ni senigis la montojn !..." Ho ! Ho ! Vi estas ruzaj, vi ja, homoj de la ebenaĵo. Ĉiuj, krom terulaĉo kiu neniam vidis la ĝangalon, scius tion kion ili ja bone scias, ke la ĉasado finiĝis por ĉi tiu sezono : tiam, ĉi-vespere, ĉiuj sovaĝaj elefantoj faros... Sed kial malŝpari tion kion ni scias antaŭ testudo de rivero ?

- Kion ili faros ? kriis Malgranda Toomaj.

- Hoj ! Knaĉjo. Ĉu do vi ĉeestas ? Nu, mi tuj diros tion al vi : ĉar vi, vi havas komunan saĝon. Ili dancos, jen ! Kaj via patro kiu senigus ĉiujn montojn de ĉiuj elefantoj, bone farus meti duoblan ĉenon ĉe siaj palisetoj, ĉi-vespere.

- Kion li rakontas ? diris Granda Toomaj. Dum kvardek jaroj, de patro al filo, ni gardis elefantojn, kaj ni neniam aŭdis paroli pri ĉi tiuj dancoj.

- Jes, sed homo de la ebenaĵoj, kiu vivas en kabano, konas nur la kvar murojn de sia kabano... Nu, lasu viajn elefantojn sen piedligiloj, ĉi-vespere, vi vidos tion kio okazos. Pri ilia danco, mi vidis la lokon kie... Bapree bap !⁽²⁹⁾ Kiom da kurbiĝoj havas ĉi tiun riveron **Dihing** ? Jen denove vadejo, kaj necesas al ni peli la idojn por naĝi. Tenu vin

29 Bapree bap ! = esprimo de surprizo kiun Kipling derivas de hindia, iom modifante ĝin.

trankvile, vi aliaj, tien malantaŭen !...

Tiel babilante, kverelante kaj vadante tra la riveroj, ili faris sian unuan etapon, ĝis ia tendaro destinita por ricevi la novajn elefantojn. Sed ili perdis paciencon longtempe antaŭ ol alveni tien.

Tie la bestoj estis katenitaj ĉe la postaj kruroj al la pezaj masoj de la palisetoj; oni metis pliajn ŝnurojn al novuloj; oni amasigis antaŭ ili la furaĝon. Poste, la mahutoj de la monto reiris al mastro Petersen, sub la posttagmeza suno, konsilante al la viroj de la ebenaĵo esti aparte zorgemaj tiun vesperon; kaj ili ridis kiam tiuj ĉi demandis al ili la kialon pri tio.

Malgranda Toomaj atentis pri la vespermanĝo de Kala Nago; kaj ĉar vesperiĝis, li vagis tra la tendejo, feliĉa preter ĉia esprimo, serĉante tamtamon. Kiam hindua infano sentas al si la koron ĝojega, li ne kuras ĉiuflanken kaj ne faras senbridan bruegon. Li sidiĝas teren, kaj donas al si sole malgrandan feston. Kaj Malgranda Toomaj aŭdis mastron Petersen^{on} alparoli al li ! Se li ne trovintus tion kion li serĉis, li farintus malsanon. Sed la vendisto de bombonoj de la tendejo pruntedonis al li malgrandan tamtamon - tamburon, kiu oni frapas per la manplato - kaj li sidiĝis teren, kun la gamboj krucitaj, antaŭ Kala-Nago, ĉe la momento kiam la steloj komencis aperi, kun la tamtamo sur la genuoj; kaj li tamburis, tamburis, tamburis, kaj ju pli li pensis pri la granda honoro kiu estis farita al li, des pli li tamburis, tute sola inter la furaĝo de la elefantoj. Estis nek ario nek paroloj, sed tamburadi feliĉigis lin. La novaj elefantoj tiris la ŝnurojn, plorpepis de tempo al tempo kaj trumpetis, kaj li povis aŭdi sian patrinon, en la kabano de la tendejo, kiu lulis lian etan fraton per malnova, malnova kanto pri la granda dio Ŝivo, kiu iam diris al ĉiuj bestoj tion kion ili devis manĝi... Ĝi estas tre milda lulkanto kaj pri kio jen la unua strofo :

Ŝivo kiu ŝutis la rikoltojn kaj blovigis la ventojn,

*Sidinta ĉe la pordoj en florado dum tago de pratempo,
Donis al ĉiu lian parton : porvivaĵon, laboron, destinon,
De la almuzulo sur la sojlo ĝis la kronita kapo.
Ĉiajn aferojn Li faris, Ŝivo la Antaŭsavanto,
Mahadeo ! Mahadeo !⁽³⁰⁾ Ĉiajn aferojn :*

La dorno por la rufa kamelo, la fojno por la plugbovoj.

Kaj la mamu de patrinoj por la dormanta kapo, ho fileto de mia amo !

Malgranda Toomaj akompanis la kanton per ĝoja *tunk-tunk* ĉe la fino de ĉiu strofo, ĝis la momento kiam li estis dormema kaj etendis sin sur la furaĝo, apud Kala Nago. Fine la elefantoj komencis kuŝiĝi, unu post la alia, laŭ sia kutimo; kaj baldaŭ, Kala Nago, ĉe la dekstro de la linio, sole restis stara : li malrapide balanciĝis, ĉi tie tien, kun oreloj antaŭen streĉitaj por aŭskulti la vesperan venton kiu mildege blovis tra la montoj. La aero estis plene de ĉiuj bruoj de la nokto kiuj, kunigitaj, faras unu solan grandan silenton : la *klik-klako* de bambua tigo kontraŭ la alia, la susuro de vivanta afero en la denseco de la ĝangalo, la gratbruo kaj la obtuza krio de birdo duone vekiginta (la birdoj dumnokte vekigas multe pli ofte ol oni pensas), akvofalo, tre malproksime...

Malgranda Toomaj dormis dum kelka tempo... Kiam li vekigis, estis brila lunlumo, kaj Kala Nago ankoraŭ vigilis, stare, kun la oreloj streĉitaj. Malgranda Toomaj turniĝis en la susura furaĝo kaj rigardis la kurbon de la grandega dorso kontraŭ la ĉielo kies ĝi kaŝis la duonon de la steloj; kaj dum li rigardis, li aŭdis, tiel foren ke tiu ĉi bruo apenaŭ faras kiel pikadon de pinglo en la silento, la kornan alvokon de sovaĝa elefanto. Ĉiuj elefantoj, en la linioj, ekstaris sur la piedoj, kvazaŭ frapitaj de kuglo, kaj iliaj grumbladoj fine vekis la dormantajn mahutojn; ĉi tiuj eliris kaj frapis sur la kejlajn de la palisetoj per dikaj maleoj, poste ĉirkaŭstreĉis tiun ŝnuron kaj nodis tiun alian, kaj ĉio rekvietiĝis. Unu el la

30 Alia hinda nomo de Ŝivo (kiu signifus "Granda Dio").

novaj elefantoj preskaŭ elingigis sian paliseton : Granda Toomaj forprenis la ĉenon de Kala Nago, metis ĝin al la alia kiel piedligilon, la antaŭa piedo kunligita kun la malantaŭa piedo, poste li volvis plektaĵon de herbo sur la kruro de Kala Nago, kaj diris al li ne forgesi ke li estis firme ligita. Li sciis ke li mem, lia patro kaj lia avo, faris la samon certe centfoje. Kala Nago ne respondis al ĉi tiu ordono per sia kutima gluglo. Li restis senmova, rigardante foren tra la lunlumo, kun la kapo iom levita, la oreloj etenditaj kiel ventumiloj, direkte al la grandaj ondolinioj kiujn faris de la montaroj de Garo.

- Atentigu, ĉu li estos trankvila ĉi-vespere ! diris

Granda Toomaj al Malgranda Toomaj.

Kaj li reeniris en la kabanon kaj reendormiĝis.

Malgranda Toomaj ĵus estis ankaŭ reendormiĝonta, kiam li aŭdis la ŝnuron de kŭaro⁽³¹⁾ (fibro de kokoso) rompiĝi kun negrava tintado. Kaj Kala Nago ruliĝis el siaj palisetoj, tiel malrapide kaj silente kiel nubo fluas el la valo.

Malgranda Toomaj trotetis malantaŭ li, nudpiede sur la vojo, en la lunlumo, vokante mallaŭte :

- Kala Nago ! Kala Nago ! Prenu min kun vi, ho Kala Nago !

La elefanto turnis sin sen bruo, retrovenis tri paŝojn, mallevis sian rostron, levis la infanon sur sian kolon kaj antaŭ ol Malgranda Toomaj estis nur fiksinta siajn genuojn, li enŝoviĝis en la arbaregon.

Venis el la linioj fanfaro da furiozaj elefantblekoj; poste silento refalis sur ĉion, kaj Kala Nago revojiris. Kelkfoje tufo da altaj herboj balais liajn flankojn laŭ la tuta longo, kiel ondo balaas la flankojn de ŝipo, kaj kelkfoje pendanta bukedo de sovaĝaj piprarboj skrapis lian dorson de iu fino al alia, aŭ bambuo krakis je la ektuŝo de lia ŝultro; sed intertempe li moviĝis sen ia bruo, drivanta tra la densa

31 La traduko estas mia propra... La franca teksto metis "caire", sed mi trovis "coir".

arbarego de Garo kiel tra fumo. Li sekvis suprenirantan vojon, sed kvankam Malgranda Toomaj observis la stelojn tra la maldensiĝoj de la arboj, li ne kapablis diri en kiu direkto. Fine Kala Nago atingis la kreston kaj haltis dum minuto, kaj Malgranda Toomaj povis vidi la suprojn de la arboj, kiel punktitan felon kiu etendiĝus sub la lunlumo laŭ mejloj kaj mejloj, kaj la nebulon el blueta blanko, sur la rivero, en la fundo. Toomaj sin klinis antaŭen, rigardis, kaj li sentis ke la arbarego estis maldorma sub li, maldorma, vigla kaj plene da estuloj. Unu el tiuj dikaj brunaj vespertoj kiuj sin nutras per fruktoj, tuŝetis al li la orelon; la pikiloj de histriko kraketis en subbaro; kaj en la mallumo, inter la trunkoj de arboj, li aŭdis apron kiu diligente serĉfosis la varman molan teron kaj esplorante flaris. Poste la branĉoj fermiĝis super lia kapo, kaj Kala Nago komencis malsupreniri la deklivon de la valo, ĉi-foje ne plu pace, sed kiel eskapinta kanono malsupreniras krutan taluson, impete. La grandegaj membroj moviĝis laŭ reguleco de piŝtoj, per paŝolongo de ok futoj ($\pm 2,5m$), kaj oni aŭdis susurojn de sulkita haŭto ĉe la faldoj de la artikoj. La disrompitaj veproj krakis ĉiuflanke kun la bruo de ŝiritaj toloj; la junaj plantetoj kiujn li flankenmetis dekstren kaj maldekstren per siaj ŝultroj, resaltis dorsen kaj vipofrapis al li la flankojn; grandaj trenajoj de interplektitaj kaj kompaktaj lianoj pendis de liaj dentegoj, dum li ĵetis la kapon ambaŭflanken kaj boris sian vojon.

Tial Malgranda Toomaj platigis sin kontraŭ la granda kolo, pro timo ke pendanta branĉo balau lin al la grundo kaj li deziris al si denove retroviĝi en la linioj. La herbejo fariĝis marĉa, kaj la piedoj de Kala Nago suĉis kaj gluis al la tero kiam li metis ilin, kaj la nokta nebulo ĉe la fundo de la valo frostigis Malgrandan Toomaj^{on}. Estis ŝprucadoj kaj vadado, puŝo de rapida akvo, kaj Kala Nago eniris en la fluejon de rivero, palpante sian vojon ĉe ĉiu paŝo. Super la bruo de la

fluado kiu kirliĝis ĉirkaŭ la fortaj kruroj, Malgranda Toomaj povis aŭdi aliajn plaŭdadojn kaj novajn fanfarojn almonte kaj alvale, grandegajn grumbladojn, kolerajn zumadojn; kaj en la tuta ĉirkaŭaĵo, kiel ondadoj, nebulaj ombroj ruliĝis.

- He ! li duonlaŭte diris, kaj liaj dentoj kunbatis. La elefantaj popoloj estas ekstera ĉi-vespere. Estas la danco, do !

Kala Nago bruege eliris el la akvo, blovis en sian rostron por malplenigi ĝin, kaj komencis novan supreniron; sed ĉi-foje li ne plu estis sola kaj ne plu devis trabori al si vojon. Ĝi jam estis farita : sur ses futojn (+/-2m) larĝa, rekte antaŭ li, tute klinitaj, la ĝangalaj herboj provis restariĝi kaj sin teni. Multaj elefantoj certe sekvis ĉi tiun vojon antaŭ kelkaj minutoj pli frue. Malgranda Toomaj turniĝis, kaj malantaŭ li, granda sovaĝa portanto de dentegoj, kun okuletoj de porkidoj, brilaj kiel braĝo, apenaŭ elakviĝis el la nebula rivero. Poste la arboj denove refermiĝis, kaj ili daŭris grimpi, kun fanfaroj kaj krioj kaj ĉie la bruo de rompitaĵoj branĉoj.

Finfine, Kala Nago haltis inter du arbtrunkoj, sur la supro de la monto : ili estis parto de ĉirkaŭaĵo kreskinta ĉirkaŭ neregula spaco de proksimume tri aŭ kvar akreoj (+/-120-160aroj), kaj sur tiu tuta spaco, Malgranda Toomaj povis vidi tion, la grundo estis piedpremita ĝis fariĝi tiel malmola kiel brika kahelaro. Kelkaj arboj stariĝis en la centro de la senarbejo, sed ilia ŝelo estis eluzita, kaj sube la ligno mem aperis, brila kaj glata, sub la makuloj de lunlumo. Lianoj pendis de la supraj branĉoj, kies kloŝformaj floroj, grandaj konvolvuloj el vaksa blanko, falis kvazaŭ pezigitaj de dormo al tero. Sed, en la limoj de la senarbejo, ne estis ero de verdaĵo : nenio ol la tretita tero; la lunlumo donis al ĝi fergrizan nuancon, krom ĉi tie kaj tie, kie staris kelkaj elefantoj kies ombroj estis nigraj kiel inko. Malgranda Toomaj rigardis retenante sian spiron, kun la okuloj preskaŭ

ekster la kapo; kaj dum li rigardis, elefantoj ĉiam pli multnombraj eliris de inter la arbtrunkoj, balanciĝantaj, por eniri la apertan spacon. Malgranda Toomaj sciis nur kalkuli ĝis dek; li kalkulis kaj rekalkulis per siaj fingroj, ĝis kiam li perdis sian nombron da dekoj, kaj li eksentis kapturon. Ekster la senarbejo, li povis aŭdi la bruegon de la elefantoj en la ĝangalo, dum ili traboris sian vojon al la supro de la monto; sed tuj alvenintaj en la rondon de arbtrunkoj, ili moviĝis kiel fantomoj.

Tie estis sovaĝaj virseksuloj kun blankaj dentegoj, kun mortaj folioj, nuksoj kaj branĉetoj restitaj en la sulkoj de iliaj koloj kaj de iliaj oreloj; grasaj malrapidemaj inoj kun siaj etaj elefantoj el roza nigro, apenaŭ altaj je tri aŭ kvar futoj ($\pm 0,9-1,2m$), kiuj ne sukcesis ne moviĝi kaj kuris sub iliaj mamojn; junaj elefantoj kies dentegoj ĵus komencis pinti, kaj kiuj sin montris tute fieraj pro tio; senenergiaj kaj maldikaj inoj, restintaj maljunaj fraŭlinoj, kun siaj malkvietaj kavaj vizaĝoj kaj rostroj el malglata ŝelo; maljunaj soluloj sulkitaj, de ŝultro al flanko, de cikatroj kaj vundoj de antaŭe, kaj la kotplatoj de siaj solecaj banoj ankoraŭ pendantaj de iliaj ŝultroj; kaj estis elefanto kun rompita dentego kaj la spuroj de plena atako, la terura sulko de tigras ungegoj sur sia flanko. Ili sin tenis fronte unu la alian, aŭ duope promenis tien kaj reen, aŭ restis balanciĝante kaj anaspaŝante sole. Ili estis dudekoj kaj dudekoj. Toomaj sciis ke tiel longe li restus trankvila sur la kolo de Kala Nago, neniu damaĝo povus okazi al li : ĉar sovaĝa elefanto, eĉ en la tumulto de la *keddah*⁽²⁷⁾, ne levus sian rostron por elpreni viron el la kolo de dresita elefanto; kaj tiuj ĉi apenaŭ pensis pri la viroj tiun nokton. Dum momento ili tremetis kaj streĉis la orelojn antaŭen : oni aŭdis soni la katenoj de piedringo en la arbarego. Sed estis Pudmini, la plej preferata elefantino de mastro Petersen, kun ŝia ĉeno mallonge rompita, kiu grimpis, grumblante kaj spiregante, la

flankon de la monto; ŝi devis esti rompinta siajn palisetojn, kaj rekte veni de la tendejo de mastro Petersen. Kaj Malgranda Toomaj vidis alian elefanton, kiun li ne konis, kun profundaj skrapvundoj fare de la ŝnuroj sur la dorso kaj la brusto. Li ankaŭ devis esti eskapinta el tendejo starigita en la ĉirkaŭaj montoj.

Fine, oni ne plu aŭdis elefantojn paŝi en la arbarego, kaj Kala Nago peze paŝis de inter la arboj kaj antaŭeniris meze de la amaso, klukante kaj gluglante; kaj ĉiuj elefantoj komencis sin esprimi en sia lingvo kaj moviĝi tien kaj tien. Ankoraŭ kuŝanta, Malgranda Toomaj malkovris dudekojn kaj dudekojn da larĝaj dorsoj, da moviĝantajn orelojn, da skuiĝantajn rostrojn kaj da malgrandajn ruliĝantajn okulojn. Li aŭdis la klakadon de la dentegoj kiam ili hazarde interkruciĝis; la sekan susuradon de la interplektiĝantaj rostroj; la frotadon de la grandegaj flankoj kaj ŝultroj, en la tumulto; la senĉesan flikflak^{on} kaj la hiŝ^{on} de la grandaj vosto. Poste nubo kovris la lunon, kaj estis la nigra nokto; sed la puŝoj, la susuroj kaj la gargarbruoj ne malpli daŭris, pace kaj regule. La infano sciis Kala Nagoⁿ ĉirkaŭitan de elefantoj, kaj vidis nenian ŝancon elirigi lin el la kunveno; li kunpremis la dentojn kaj tremetis. En iu *Keddah*⁽²⁷⁾, almenaŭ estis lumo de torĉoj kaj krioj, sed ĉi tie li estis tute sola en la mallumo, kaj rostro unufoje leviĝis kaj tuŝis al li la genuon. Poste iu elefanto trumpetis, kaj ĉiuj imitis lin dum kvin aŭ dek teruraj sekundoj.

La roso pluvigis el la arboj, laŭ larĝaj gutoj, sur la nevideblajn dorsojn. Kaj bruo aŭdiĝis, obtuza muĝo unue ne tre certa, kaj Malgranda Toomaj ne kapablis diri tion kion ĝi estis; la bruo laŭtiĝis, laŭtiĝis, kaj Kala Nago levis siajn antaŭajn piedojn unu post la alia, kaj remetis ilin sur la grundon - unu, du, unu du! - kun tiom da precizeco kiom la falmartelegoj. La elefantoj nun ĉiuj kune frapis per la piedoj, kaj tio sonoris kiel milittamburo batita antaŭ la buŝo

de kaverno. La roso ankoraŭ falis de la arboj, ĝis la momento kiam ne plu restis de ĝi sur la folioj; kaj la obtuza rulbruo daŭris, la grundo oscilis kaj tremetis, tiel bone ke Malgranda Toomaj metis siajn manojn sur siajn orelojn por ne plu aŭdi. Sed estis tuta vibrado, senmezura, kiu trairis lin tutkomplete, la ekbato de tiuj centoj da tiel pezaj piedoj sur la kruda tero. Unu fojon aŭ du, li sentis Kala Nago kaj ĉiuj la aliaj antaŭeniri je kelkaj paŝoj, kaj la martelado tiam fariĝis bruo de dispremataj vegetaĵoj, kies suko spruciĝis; sed unu minuton aŭ du pli poste, estis denove la rulbruo de la piedoj sur malmoligita tero. Arbo krakis kaj ĝemis ien apud li. Li etendis la brakojn kaj sentis la ŝelon, sed Kala Nago antaŭenpaŝis, ankoraŭ tretanta, kaj la infano ne plu sciis kie li estis en la senarbejo. La elefantoj ne plu donis signojn de vivo. Nur unufoje, du aŭ tri etuloj kune krietis; tiam li aŭdis obtuzan baton kaj la bruon de lukto, kaj la martelado rekomencis. Nun estis ja du longaj horoj ke tio daŭris, kaj Malgranda Toomaj suferis en ĉiu el siaj nervoj; sed li sentis, per la odoro de la aero en la nokto, ke la ektagiĝo estis venonta.

La mateno aperis laŭ pale flava tavolo malantaŭ la verdaj montetoj; kaj ĉe la unua radio, la piedpremado haltis, kvazaŭ la lumo estintus ordono. Antaŭ ol la bruo finiĝis resoni en la kapo de Malgranda Toomaj, eĉ antaŭ ol li ŝanĝis pozicion, ne plu estis ununura videbla elefanto krom Kala Nago, Pudmini kaj la elefanto skrapvundita de ŝnuroj; kaj nenia signo, nenia murmuro aŭ flustrado sur la deklivoj de la montoj, lasis konjekti kien la aliaj foriris. Toomaj rigardis per ĉiuj siaj okuloj. La senarbejo, tiom kiom li memoris, plivastiĝis dumnokte. Estis grandnombraj arboj staraj en la mezo, sed la ĉirkaŭaĵo de vepro kaj de ĝangalaj herboj estis forpuŝitaj. Malgranda Toomaj ankoraŭfoje rigardis; nun li komprenis la marteladon. La elefantoj plivastigis la tretitan spacon, reduktis al branĉetaĵoj, pro multege piedfrapi, la

densajn herbojn kaj la sukajn kanojn, la branĉetaĵojn al pajlaĵo, la pajlaĵon al maldikaj fibroj, kaj la fibrojn al malmoligita tero.

- Uf ! diris Malgranda Toomaj, kaj liaj palpebroj ŝajnis al li tre pezaj; Kala Nago, sinjoro mia, ni ne forlasu Pudmini^{on}, kaj ni reiru al la tendaro de mastro Petersen, aŭ mi baldaŭ falos de via kolo.

La tria elefanto rigardis foriri la du aliaj, brue snufis, turnis sin, kaj reiris laŭ la vojo per kiu li venis. Li nepre apartenis al ia stablo de indiĝena princeto, je kvindek, sesdek aŭ cent mejlojn de tie (+/-80, 100, 160Km).

Du horojn pli poste, dum mastro Petersen manĝis sian unuan matenmanĝon, liaj elefantoj kies ĉenoj estis tiun nokton duobligitaj, komencis trumpeti, kaj Pudmini kotita ĝis la ŝultroj, kun Kala Nago lametanta sur siaj dolorigitaj piedoj, faris ilian eniron en la tendejon. La vizaĝo de Malgranda Toomaj estis palega kaj laca, lia hararo plena de folioj kaj malseka de roso, sed la infano faris la geston por saluti mastron Petersen^{on} kaj kriis per malfortiĝanta voĉo :

- La danco..., la elefantdanco ! Mi vidis ĝin... kaj mi mortas !

Kaj ĉar Kala Nago kuŝiĝis, li deglitis de lia dorso, sveninta.

Sed la indiĝenaj infanoj ne havas nervojn pri kiuj indas paroli : post du horoj, li rekonsciiĝis, komforte kuŝita en la hamako de mastro Petersen, kun la ĉasjako de mastro Petersen sub la kapo, glaso da varma lakto aldonita de iom da brando kaj de iomete da kinino en la ventro; kaj dum la maljunaj haraĵaj kaj cikatroplenaj ĉasistoj de la ĝangalo, sidantaj laŭ tri vicoj profunde antaŭ li, rigardis lin kvazaŭ li estis reaperanto, li rakontis sian historion per naivaj vortoj, laŭ la infana maniero, kaj konkludis :

- Nun, se mi mensogas nur per unu vorto, sendu homojn por vidi; kaj ili trovos ke la elefantoj, trepaŝante,

plivastigis sian bal-lokon, kaj ili trovos dekojn kaj dekojn kaj multfoje da dekoj da spuroj kondukantaj al ĉi tiu balejo. Ili pligrandigis ĝin per siaj piedoj. Mi vidis tion. Kala Nago prenis min kun li, kaj mi vidis. Eĉ, Kala Nago havas krurojn tre lacaj.

Malgranda Toomaj klinis sin malantaŭen kaj dormis dum la tutan posttagmezon, kaj ankoraŭ dormis ĉe krepusko; kaj dum li dormis, mastro Petersen kaj Maŝua Appa sekvis la spurojn de la du elefantoj, laŭ vojiro de dek kvin mejloj (+/- 15km) tra la montoj. Mastro Petersen pasigis dek ok jarojn de sia vivo por kapti elefantojn, kaj li nur unufoje ĝis tiam malkovris similan bal-lokon. Maŝua Appa ne bezonis dufoje rigardi la senarbejon por vidi tion kio okazis, nek priskrapi per la piedfingro la kompaktan kaj piedpremitan teron.

- La infano verdiras, li elbuŝigis. Ĉio ĉi lastvespere okazis, kaj mi nombris sepdek spurojn kiuj transiras la riveron. Vidu, mastro, kie la fera ringo de Pudmini detranĉis la ŝelon de ĉi tiu arbo ! Jes, ŝi ankaŭ ĉeestis.

Ili sin rigardis unu la alian, poste iliaj okuloj vagis de supre malsupren; kaj ili miris : ĉar la kutimoj de elefantoj transpasas la mensan kampon de iu ajn nigra aŭ blanka homo.

- Kvardek kvin jarojn, diris Maŝua Appa, mi sekvis monsinjoron la Elefanton, sed mi neniam aŭdis diri ke hominfano vidis tion kion ĉi tiu infano vidis. Per ĉiuj dioj de la montoj, tio estas... Kion ni povas diri ?...

Kaj li skuis la kapon.

Kiam ili revenis al la tendaro, estis la horo de la vespermanĝo. Mastro Petersen manĝis sole en sia tendo, sed li donis ordonojn por ke oni disdonu du ŝafojn kaj kelkajn kortobirdojn, kun duobla porcio da faruno, da rizo kaj da salo, ĉar li sciis ke okazos festo. Granda Toomaj tutrapide venis de la ebenaĵo por ekserĉi sian filon kaj sian elefanton, kaj nun kiam li trovis ilin, li rigardis ilin kvazaŭ li timis ambaŭ.

Kaj efektive estis festo, ĉirkaŭ la grandaj tendarfajroj

kiuj flamis ĉe la fronto de la linioj da piedigitaj elefantoj, kaj Malgranda Toomaj estis la heroo. La famaj ĉasistoj de elefantoj, kun bronzita haŭto, ĉaspelistoj, gvidantoj kaj ŝnurĵetantoj, kaj tiuj kiuj scias ĉiujn sekretojn por dresi la plej sovaĝajn elefantojn, pasis lin unu al la alia, kaj faris al li markon sur la frunto per la sango de la koro mem de ĵuse mortigita ĝangalokoko, por montri ke li estis arbaristo, nun inicita, kaj libera en la tuta vasteco de la ĝangaloj.

Kaj ĉe la fino, kiam la flamoj falis kaj mortis, kaj kiam pro la ruĝaj rebriloj de la braĝoj, la elefantoj aperis kvazaŭ ili estis ankaŭ trempitaj en la sango, Maŝua Appa, la ĉefo de ĉiuj ĉaspelistoj de ĉiuj *kedda*^{oj(27)}, Maŝua Appa, la alia memo de mastro Petersen, kiu dum kvardek jaroj neniam vidis konstruitan vojon, Maŝua Appa, tiel fama, tiel fama, ke neniam oni nomis lin alie ol Maŝua Appa, saltis sur siaj piedoj, levante Malgrandan Toomaj^{on} laŭ la brakforto super sia kapo kaj kriis :

- Aŭskultu, fratoj ! Aŭskultu ankaŭ vi, miaj sinjoroj, tie en la linioj, ĉar estas mi, Maŝua Appa, kiu parolas ! Ĉi tiu etulo ne plu nomiĝos Malgranda Toomaj, sed Toomaj de la Elefantoj, kiel lia prapatro estis nomita antaŭ li. Tion kion neniam homo vidis, li vidis dum la longa nokto, kaj la favoro de la elefanta popolo kaj de la dioj de la ĝangaloj estas kun li. Li fariĝos fama ĉaspelisto, li fariĝos pli fama ol mi, jes mi, Maŝua Appa ! Li sekvos la freŝan spuron, la difektitan spuron kaj la miksitan spuron, per klara vidkapablo ! Ne okazos al li domaĝon en la *keddah*⁽²⁷⁾ kiam li kuros sub la ventro de la soluloj por ŝnuri ilin, kaj se li glitos sub la piedojn de sturmanta virulo, la virulo rekonos lin kaj ne piedpremos lin. Hajai ! Miaj sinjoroj, ĉi proksime en la ĉenoj, li kriis kurante al la fronto de la vico de palisetoj, jen la etulo kiu vidis viajn dancojn ĉe la fundo de viaj kaŝitaj rifuĝejoj, la spektiĝo kiun neniu homo vidis ! Omaĝu lin, miaj sinjoroj, *Salaam Karo*, miaj infanoj. Salutu Toomaj^{on} de la

Elefantoj ! *Gunja Perŝad*, haha ! *Hira Guj, Birĉi Guj*, haha !...
Kaj vi, *Pudmini*, vi vidis lin dum la danco; kaj ankaŭ vi, *Kala Nago*, ho mia perlo de Elefantoj !... Haha ! Kune ! Por Toomaj de la Elefantoj ! *Barrao* !

Kaj ĉe la signalo de ĉi tiu sovaĝa vivukrio, la tuta linio da elefantoj levis siajn rostrojn ĝis kiam la fino de ĉiu tuŝis la frunton, kaj ili ekkantis la plenan saluton, la eksplodan salvon da trumpetoj kiujn nur la vicreĝo de Hindio aŭdas, la "Salaamut" de *Keddah*⁽²⁷⁾.

Sed ĉi-foje por la sola honoro de Malgranda Toomaj kiu vidis tion kion neniam homo antaŭe vidis, la dancon de la elefantoj, nokte, tute sola, meze de la montoj *Garro* !

* * *

Ŝivo kiu ŝutis la rikoltojn kaj blovigis la ventojn,
Sidinta ĉe la pordoj en florado dum tago de pratempo,
Donis al ĉiu lian parton : porvivaĵon, laboron, destinon,
De la almozulo sur la sojlo ĝis la kronita kapo.
Ĉiajn aferojn Li faris, Ŝivo la Antaŭsavanto,
Mahadeo ! Mahadeo !⁽³⁰⁾ Ĉiajn aferojn :
La dorno por la rufa kamelo, la fojno por la plugbovoj.
Kaj la mammo de patrinoj por la dormanta kapo, ho fileto de mia amo !

Al riĉulo li donas tritikon, milion al malriĉulo, li alportas
Manĝrestaĵojn al la sanktulo kiu serĉas de pord'al pordo,
Al tigro brutojn, kadavraĵojn al vulturo,
Ostojn al malafablaj lupoj kiu nokte hurlas ĉirkaŭe;
neniu ŝajnis al li tro alta, neniu ŝajnis al li tro malalta...
Ĉe lia flanko, Parvati sekvis ĉiun el iliaj paŝoj;
Poste, ludeme, de ŝia edzo por provi la intencon
Ŝi ekprenis la lokuston kaj kaŝis ĝin en sia sino !

Estas tiel ke estis trompita Ŝivo la Antaŭsavanto,
Mahadeo ! Mahadeo ! Venu, rigardu,
Tre altaj estas la rufaj kameloj, pezaj la plugbovoj,
Sed estis la malplej grava el aferoj, ho fileto de mia amo !

Kiam ĉiuj estis preterpasintaj, ŝi rideme diris : Ho Majstro,
Tiom da miloj da malsatuloj, ĉu vi sukcesis nutri ilin ?
Ŝivo, ridanta, respondis : Ĉiuj havas parton, la ilian
Ĉiuj, eĉ la tute malgranda kiu kaŝiĝas sur via koro.

La ŝtelistino Parvati eltiris el sia malfermita robo
La malplej grava el la tute malgrandaj kiu ronĝis verdajn herbojn,
Tiun antaŭvidiston, ŝi timis kaj miris antaŭe
Ŝivo la Disdonanto, kiu nutras ĉiun vivantulon.
Ĉiajn aferojn Li faris, Ŝivo la Antaŭsavanto,
Mahadeo ! Mahadeo !⁽³⁰⁾ Ĉiajn aferojn :
La dorno por la rufa kamelo, la fojno por la plugbovoj.
Kaj la mammo de patrinoj por la dormanta kapo, ho fileto de mia amo !

ŜIVO KAJ LA LOKUSTO.

(La kanto kiun la patrino de Toomaj kantis al sia bebo).

* * *

Servo de la Reĝino.

Pluvis torente dum longa monato - pluvis sur tendaro de tridek mil homoj kaj de miloj da kameloj, elefantoj, ĉevaloj, bovoj kaj muloj, ĉiuj kunigitaj en loko nomata **Raŭalpindi**, por esti revuita de la vicreĝo de Hindio.

La vicreĝo ricevis viziton de la emiro de Afganio - la sovaĝa reĝo de ankoraŭ pli sovaĝa lando - kaj la emiro kuntiris kiel korpogardistojn okcent virojn kun iliaj ĉevaloj, kiuj neniam vidis tendaron aŭ lokomotivon en sia vivo - sovaĝaj viroj kaj sovaĝaj ĉevaloj naskitaj ie funde de Mezasio. Ĉiunokte oni povis esti certa ke grupo el ĉi tiuj ĉevaloj rompus siajn piedligilojn kaj galopus de supre malsupren de la tendaro tra la koto, en la mallumo, aŭ ke la kameloj rompus siajn piedligilojn, kaj komencus kuri kaj fali super la ŝnuroj de la tendoj, kaj oni povas imagi kian plezuron tio estis por la homoj kiuj bezonis dormi.

Mia tendo stariĝis for de la linioj de kameloj, kaj mi kredis ĝin ŝirmitan; sed iun nokton, iu abrupte ŝovis sian kapon enen kaj kriis:

- Eliru, rapide ! Ili venas ! Mia tendo estas surteren !

Mi sciis kiuj tiu "ili" volis diri; tial mi surmetis miajn botojn, mian pluvmantelon, kaj mi hastis eksteren en la haoson. La eta Vikseno⁽³²⁾, mia terhundo, eliris tra la alia flanko; poste ni aŭdis muĝi, grumbli, gargari, kaj mi vidis la tendon enfali, dum la masto abrupte rompiĝis, kaj komenci danci kiel freneza fantomo. Kamelo enkaptiĝis en ĝi, kaj tute malseka kaj furioza kiel mi estis, mi ne sukcesis deteni min ridi. Poste mi daŭrigis kuri, ĉar mi ne sciis kiom da kameloj povis esti eskapitaj; kaj post nelonge mi estis ekster vido de la tendaro, vadante tra la koto. Fine, mi stumblis sur

32 El la angla vorto "*Vixen*" kiu signifas esperante "*Vulpino aŭ Megero*".

la kulaso de kanono, kaj mi ekkonsciis ke mi troviĝis en la apudeco de la artileriaj linioj, tie kie oni disjungis la kanonojn por la nokto. Ĉar mi ne volis pli longe vadadi en la pluveto kaj en la mallumo, mi metis mian pluvmantelon sur la buŝon de iu kanono, konstruis specon de vigvamo pere de du aŭ tri ŝargostangojn hazarde tie trovitajn, kaj mi kuŝiĝis laŭlonge de la afusto de alia kanono, demandante al mi kien iris Vikseno kaj kie mi mem ja povis troviĝi.

Ĝuste kiam mi pretigis por dormi, mi aŭdis klikadon de jungilaro kaj grumblado dum mulo preterpasis antaŭ mi skuante siajn malsekajn orelojn. Ĝi apartenis al baterio de ŝraubaj kanonoj, ĉar mi povis aŭdi bruon de rimenoj, de ringoj, de ĉenoj, kaj de ĉiajn aferojn sur ĝia remburita selo. - La ŝraubaj kanonoj estas tute malgrandaj kanonoj faritaj el du partoj kiujn oni kune ŝraŭbas kiam alvenas la tempo uzi ilin. Oni kunportas ilin sur la montojn, ĉien kie kapablas iri mulo, kaj ili estas granda helpo sur ŝtonaj terenoj.

Malantaŭ la mulo, estis kamelo, kies la dikaj molaj piedoj surtretis kaj glitis en la koto, kaj kiu svingis la kolon kiel perdita kokino. Feliĉe, mi sufiĉe konis la lingvaĵon de la bestoj - ne tiun de la sovaĝaj bestoj, sed la lingvaĵon de la tendaraj bestoj, kompreneble - kiun lernigis al mi la indiĝenoj, por scii tion kion ili diris. Devis esti la sama kiu sterniĝis sur mia tendo, ĉar li alparolis al la mulo :

- Kion fari ! Kien iri ? Mi baraktis kun blanka afero kiu ŝvebis, kaj ĝi prenis bastonon kaj batis min sur la kolo.

Ĝi estis la rompita mato de mia tendo, kaj mi estis tre kontenta ekscii tion.

- Ĉu ni daŭrigas kuri ?

- Ho, estas vi, diris la mulo, vi kaj viaj amikoj, kiuj tiel malordigis la tendaron ? Perfekte. Vi estos frapita pro tio ĉimatene, sed mi povas tiel bone doni al vi partopagon.

Mi aŭdis la klikadon de jungilaroj, kaj la kamelo ricevis en la ripoj du kalcitrojn kiuj sonis kiel tamburo.

- Tio sciigos vin, li diris, kiel alifojie kuri, tra baterio da muloj, nokte, kriante : "Ŝtel' kaj fajron ! Kuŝiĝu, kaj gardu trankvile vian grandan stultan kolon.

La kamelo refaldiĝis laŭ maniero de kameloj, orte, kaj kuŝiĝis plorblekante. Ni aŭdis en la mallumo ritman bruon de hufoj sur la grundo, kaj granda trupĉevalo alvenis laŭ la galopeto de servosoldato, kvazaŭ ĝi estis en parado, transiris la kulason de kanono, kaj refalis tute proksime al la mulo.

- Estas hontinde, li diris blovante tra la nazegoj. Ĉi tiuj kameloj denove enfalis en niajn liniojn... Estas la tria fojo ĉisemajne. La rimedo por ĉevalo resti freŝa se oni ne lasas lin dormi !... Kiu estas ĉi tie ?

- Mi estas la mulo de la kulas-peco de la kanono numero du el la Unua Ŝtraŭba Baterio, diris la mulo, kaj la alia estas unu el viaj amikoj. Li ankaŭ vekis min. Kaj vi ?

- Numero dek kvin, trupo E, Kvinaj Lancistoj... La ĉevalo de Rikĉjo Kunlifo. Iom da spaco, bonvolu, tie.

- Ho, pardonu, diris la mulo. Estas tiel mallume ke ni apenaŭ vidas. Ĉu ĉi tiuj kameloj estas sufiĉe naŭzaj ? Mi forlasis miajn liniojn por serĉi iom da sereneco kaj da kvieteco ĉi tie.

- Miaj sinjoroj, diris la kamelo kun humileco, ni faris malbonajn sonĝojn dumnokte, kaj ni tre timis ! Mi estas nur unu el kameloj de la ĉar-transporto de la 39a Indiĝena Infanterio, kaj mi ne estas tiel kuraĝa kiel vi, Viaj Sinjoroj.

- Do kial vi ne restis por porti la pakaĵojn de la 39a Indiĝena Infanterio, anstataŭ kuri ĉien en la tendaro ? diris la mulo.

- Estis tiel malbonaj sonĝoj, diris la kamelo. Mi estas tre trista. Aŭskultu !... Kio tio estas ?... Ĉu necesas al ni denove kuri ?

- Kuŝu vin, diris la mulo, aŭ vi baldaŭ rompos viajn longajn krurajn stangojn inter la kanonoj. Li streĉis orelon kaj aŭskultis.

- Bovoĵ ! li diris. Bovoĵ de baterioĵ. Parolo mia, vi kaj viaj amikoj, vi vere vekis la tendaron ! Necesas konsiderindan bruegon por ellitiĝi bovoĵ de baterio.

Mi aŭdis ĉenon ternivele treniĝi, kaj jungitaro de tiuj grandaj, taciturnaj, blankaj bovoĵ, kiuj trentiras la pezajn kanonojn de sieĝo kiam la elefantoj ne plu volas antaŭeniri sub pafado, alvenis ŝultron ĉe ŝultro; tuj post ili, preskaŭ paŝante sur la ĉeno, sekvis alia mulo de baterio, kiu panike alvokis "Vilĉjo".

- Li estas unu el niaj rekrutoj, diris la maljuna mulo al la trupĉevalo. Ĉi tie, junulo. Sufiĉas kriaĉi, la mallumo ankoraŭ neniam suferigis iun ajn.

La bovoĵ de baterio samtempe kuŝiĝis kaj komencis remaĉis, sed la juna mulo alpremiĝis kontraŭ Vilĉjo.

- Aferoj ! li diras. Timigaj kaj abomenaj aferoj, Vilĉjo! Ili eniĝis en niajn liniojn dum ni dormis. Ĉu vi pensas ke tio mortigos nin ?

- Mi deziregas piedbati vin, numero unu, diris Vilĉjo. Ĉu ni havas ideon pri mulo de kvar futoj ses colaj (+/-1,35m) kun via edukado, kiu malhonoras la Baterio antaŭ ĉi tiu ĝentlemano.

- Milde, milde ! diris la trupĉevalo. Memoru ke ni estas ĉiam tia por komenci. La unuan fojon kiam mi vidis homon (estis en Aŭstralio, kaj mi estis trijaraĝa), mi kuris duontagon, kaj se tio estintus kamelo, mi ankoraŭ kurus.

Preskaŭ ĉiuj niaj ĉevaloj de angla kavalerio, en Hindio, estas importitaj el Aŭstralio kaj dresitaj de la soldatoj mem.

- Estas vere, finfine, diris Vilĉjo. Sufiĉas tiel tremi, junulo. La unuan fojon kiam oni metis al mi sur la dorso la kompletan jungilaron kun ĉiuj ĝiaj ĉenoj, mi staris min sur miaj antaŭaj kruroj, kaj per multe da kalcitroj, mi ĵetis ĉion grunden. Mi ne jam akiris la veran sciencon de kalcitrado, sed tiuj de la baterio diris ke ili neniam vidis ion similan.

- Sed estis nek jungilaro, nek io ajn kiu tintis, diris la

juna mulo. Vi scias, Vilĉjo, ke nun tio egalas al mi. Estis aferoj grandaj kiel arboj, kaj ili falis de supre malsupren de la linioj kaj gargaris; mia brido rompiĝis kaj mi ne kapablis trovi mian rajdanton... Mi eĉ ne povis trovi vin, Vilĉjo; do mi forkuris kun... kun ĉi tiuj ĝentlemanoj.

- Hm! diris Vilĉjo. Tuj kiam mi aŭdis diri ke la kameloj estis eskapintaj, mi foriris por mia propra konto. Por ke mulo de baterio... de baterio de ŝraŭbaj kanonoj... nomas ĝentlemanojn, bovojn de baterio, necesas ke li sentas sin tre kortuŝita. Kiu vi estas, vi aliaj, tie sur grundo?

La bovoj retropuŝis sian nutraĵon, kaj ambaŭ respondis samtempe:

- La sepa jugo de la unua kanono de la Dika Baterio de Sieĝo. Ni dormis kiam la kameloj alvenis, sed kiam oni paŝadis sur ni, ni leviĝis kaj ni foriris. Pli bone valoras kviete dormi en la koto ol estis ĝenata sur bona pajlaĵo. Ni diris al via amiko ĉi tie, ke ne estas io por timi, sed li sciis tiom da aferoj ke li alie pensis pri tio. Uah!

Ili daŭrigis remaĉi.

- Jen tio kio estas ke timi, diris Vilĉjo. Ni estas taŭzetataj de bovoj de baterio. Mi pensas ke tio feliĉigas vin, junulo.

La dentoj de la juna mulo sonoris, kaj mi aŭdis, ke li parolis pri ne timi iun ajn malnovan bifstekon de la mondo; sed la bovoj kontentiĝis klaktintigi siajn kornojn unu kontraŭ la alia, kaj daŭrigis remaĉi.

- Nun ne ekkoleru post esti timinta. Tio estas la plej malbona speco de kovardeco, diris la trupoĉevalo. Estas tre pardoninde timi dumnokte, laŭ mi, kiam oni vidas aferojn kiujn oni ne komprenas. Ni eskapis el niaj palisetoj dekduojn da fojoj, po bandoj de kvarcent kvindek kune, kaj tio ĉar nova rekruto komencis rakonti al ni rakontojn pri viperoj kiujn ni trovas hejme en Aŭstralio, tiagrade ke ni mortis pro timo je la nura vido de la pendantaj ŝnuroj de niaj kolbridoj.

- Ĉio ĉi tute estas tre bona en la tendaro, diris Vilĉjo; mi ne ĉesas mem eksciti, por ŝerco, kiam mi ne eliris ekde unu tago aŭ du; sed kion vi faras dum kampanjo ?

- Ho, estas multe pli tikla problemo, diris la trupĉevalo. Rikĉjo Kunlifo tiam estas sur mia dorso, kaj batas al mi per siaj genuoj la ripojn; ĉio kion mi devas fari, estas rigardi kien mi metas la piedon, bone kunstreĉi mian gropon, kaj obei al kondukiloj.

- Kio tio estas : obei al kondukiloj ? demandis la juna mulo.

- Per la bluaj gumarboj de Aŭstralio, nazbruis la trupĉevalo, ĉu vi volas kredigi al mi ke oni ne instruis al vi en via metio, tion kio estas obei al kondukiloj ? Por kio vi estas bona, se vi ne povas tuj turniĝi kiam la kondukilo tuŝas al vi la kolon ? Estas afero pri vivo kaj morto por via homo, kaj kompreneble pri vivo kaj morto por vi. Oni komencas premi, kun la grupo kunstreĉita, ĉe la momento kiam oni sentas la premon de la kondukilo sur la kolo. Se oni ne havas spacon por turniĝi, oni iomete baŭmas kaj oni refalas sur siaj antaŭaj kruroj. Jen tio kio estas obei al kondukiloj.

- Oni ne instruas la aferojn tiamaniere, malvarme diris Vilĉjo, la mulo. Oni instruas nin obei al la homo kiu estas ĉe nia kapo : antaŭeniri kiam li diras tion al ni, kaj retroiri kiam li ankaŭ diras tion al ni. Mi supozas ke tio estas tutsama. Nun, tutposte, ĉi tiu bela metio de fantazio kaj de plumtufo, kiu devas esti tre malbona por viaj poplitoj, al kio vi alvenas ?

- Tio dependas, diris la trupĉevalo. Ĝenerale necesas al mi eniri meze de amaso da kriegantaj kaj longharaj homoj armitaj de tranĉiloj... de longaj brilaj tranĉiloj, pli malbonaj ol la tranĉiloj de bestokuracisto... kaj mi devas atentigi por ke la boto de Rikĉjo ĝuste tuŝu, sen premi, la boton de lia najbaro. Mi povas dekstren vidi la lancon de Rikĉjo per mia dekstra okulo, kaj mi scias ke ne estas danĝero. Mi ne volus

esti la viro aŭ la ĉevalo kiu troviĝus sur nia vojo al Rikĉjo kaj mi, kiam ni urĝiĝas.

- Ĉu la tranĉiloj doloras ? demandis la juna mulo.

- Nu... Mi unufoje trafiĝis de ĝi tra la brusto... sed ne estis kulpo de Rikĉjo...

- Mi vere prizorgintus de kiu tio estis kulpo, se oni dolorigis min ! interrompis la juna mulo.

- Devas esti, reparolis la trupĉevalo. Se vi ne fidas al via homo, vi povas tiel bone tuj forgalopi. Estas tio kion faras kelkaj el niaj ĉevaloj, kaj mi ne riproĉas ilin. Kiel mi diris, ne kulpis Rikĉjo. La viro estis surgrunde kuŝinta, kaj mi etendiĝis por ne dispremi lin, sed li ektranĉvundis min de malsupre supren. La venontan fojon kiam mi devos transpasi surtere kuŝintan homon, mi metos la piedon sur li... kaj firme.

- Hm ! diris Vilĉjo, ĉio ĉi ŝajnas tre absurda. La tranĉiloj estas malagrablaj instrumentoj en ĉiuj cirkonstancoj. Tio kio estas la plej bona, estas grimpi monton, kun bone ekvilibritan selon sur via dorso, alkroĉi sin per la kvar piedoj kaj la oreloj, grimpi, rampi kaj enŝoviĝi ĝis kiam oni elvenas je centoj da futoj super ĉiuj aliaj, sur elstaraĵo kie estas ĝuste la loko por viaj hufoj. Tiam, oni haltas kaj oni ne plu moviĝas... neniam petu al homo teni al vi la kapon, junulo... oni ne moviĝas dum oni ŝtraŭbas la kanonojn, kaj poste oni rigardas fali inter la altaj branĉoj de arboj, tre for suben, la malgrandaj obusoj similaj al papavetoj.

- Ĉu vi do neniam stumblas ? demandis la trupĉevalo.

- Oni diras ke kiam mulo grumblas, oni povas fendi kokinan orelon, respondis Vilĉjo. De tempo al tempo, eble malbone ligita selo faligos mulon, sed estas tre malofte. Mi dezirus povi instrui al vi nian metion. Estas bela afero. Nu, necesis al mi tri jaroj por kompreni tion kion homoj volis de mi. La tuta scienco konsistas en ne siluetiĝi kontraŭ la ĉiellinio, ĉar se vi farus tion, oni povus pafi al vi. Memoru ĉi tion, junulo. Ĉiam restu kaŝita kiel eble plej bone, eĉ se

necesas al vi tiucele fari mejlan (+/-1,6Km) ĉirkaŭvojon. Estas mi kiu kondukas la baterion, kiam oni alvenas al tia grimpado.

- Lasi sin mortpafi sen havi eblecon sturmi homojn kiuj pafas ? diris la trupĉevalo profunde pripensanta. Mi ne kapablas elteni ĉi tiun ideon. Mi volus sturmi... kun Rikĉjo.

- Ho ne, vi ne volus; vi scias ke tuj en pozicio, estos la kanonoj kiuj plenumos la tutan sturmon. Jen kiu estas scienca kaj klara; sed la tranĉiloj... pu !

Estis kelka tempo ke la kamelo de ĉar-transporto balancis sian kapon tien kaj reen, provante enŝovi vorton en la konversacio. Kaj mi aŭdis lin kiu timeme diris, tusante por liberigi la gorĝon :

- Mi... mi... mi iom militis, sed ne estis grimpante aŭ kurante tiel.

- Ne. Nun kiam vi diras tion, reparolis Vilĉjo, ni rimarkas tion. Vi ne multe aspektas iun faritan por grimpi aŭ kuri... Nu, kiel tio okazis por vi, maljuna pakaĵo de fojno ?

- Laŭ la vera maniero, respondis la kamelo. Ni ĉiuj kuŝiĝis...

- Ho, Vost-rimeno kaj Martingalo ! ekkriis la trupĉevalo inter siaj dentoj. Kuŝinta !

- Ni kuŝiĝis... ĉirkaŭ centoj, daŭrigis la kamelo, laŭ granda kvadrato, kaj la viroj amasigis niajn korbojn, niajn ŝarĝojn kaj niajn selojn, ekster la kvadrato, kaj ili pafis super niaj dorsoj... jes... de ĉiuj flankoj de la kvadrato.

- Kiaj homoj ? Ĉu hazarde iu ajn homoj ? demandis la trupĉevalo. Oni lernigas nin ĉe la kavaleria lernejo, sin kuŝi kaj lasi niajn majstrojn pafi super ni, sed Rikĉjo Kunlifo estas la sola viro al kiu mi fidintus por fari tion. Tio tiklas min ĉe la pasejo de la rimenoj kaj, plie, mi povas vidi nenion kun mia kapo sur la tero.

- Kio al vi gravas kiu pafas super vi ? respondis la kamelo. Estas multaj homoj kaj multaj kameloj tute proksime, kaj amasoj de fumo. Mi tiam ne timas. Mi restas

trankvila, kaj atendas.

- Kaj tamen, diris Vilĉjo, vi havas malbonajn sonĝojn, kaj vi vespere malordigas la tendaron... Nu ! Antaŭ ol mi sterniĝu... mi ne parolas pri kuŝiĝi... kaj mi lasu homon pafi super mia korpo, miaj kalkanoj kaj lia kapo havus ion por diri unu la alian. Ĉu oni iam aŭdis paroli pri io simila ?

Estis longa silento. Poste unu el la bovoj de baterio levis sian dikan kapon por diri :

- Ĉi ĉio vere estas tre absurda. Estas nur unu maniero batali.

- Ho ! Daŭrigu, diris Vilĉjo. Mi petas vin, ne zorgu pri mi. Mi supozas ke vi, vi batalas starigante vin sur la vosto ?

- Nur unu maniero, ili ambaŭ diris samtempe (*ili devis esti ĝemeloj*). Jen ĝi : meti niajn dudek jungilarojn al la dika kanono tuj kiam Duobla Vosto komencas trumpeti (*Duobla vosto estas la nomo el la tendara slango, per kiu ni nomas la elefanton*).

- Kial Duobla Vosto trumpetas ? demandis la juna mulo.

- Por sciigi ke li ne iras pli proksime de la fumo kontraŭen... Duobla Vosto estas grava timulo... Tiam ni tiras ĉiuj kune la dikan kanonon... Heja Hula ! Heejah ! Hula ! Ni nek grimpas kiel katoj nek kuras kiel bovidoj. Ni iras tra la glata ebenaĵo, per la dudek jugojn samtempe, ĝis kiam oni disjungas nin; poste ni paŝtiĝas dum la dikaj kanonoj babilas tra la ebenaĵo kun ia urbo malantaŭ termuroj. Kaj pecoj de muro disfalas, kaj la polvo leviĝas kvazaŭ tien la grandaj gregoj reeniras en la stalon.

- Ho ! Kaj vi elektas ĉi tiun momenton por paŝtiĝi ? diris la juna mulo.

- Ĉi tiu momento aŭ alia. Manĝi ĉiam estas bona. Ni manĝas ĝis kiam oni remetas al ni la jugon, kaj denove tiras la kanonon por reveni tien kie Duobla Vosto atendas ĝin. Foje estas en la urbo dikaj kanonoj kiuj respondas, kaj kelkaj el ni estas mortigitaj, sed tiam estas pli por paŝtiĝi por tiuj kiuj restas. Estas la Destino... nenio alia ol la Destino... Ne

gravas, Duobla Vosto estas grava timulo. Jen la vera maniero batali... Ni estas du fratoj, ni devenas de Hapuro. Nia patro estis sankta virbovo de Ŝivo. Ni diris.

- Nu, mi certe lernis ion ĉi-vespere, diris la trupĉevalo. Ĉu sinjoroj de la baterio de ŝtraŭbaj kanonoj, vi sentas vin inklinaj por manĝi kiam oni pafas al vi per dikaj kanonoj, kaj ke Duobla Vosto sekvas malantaŭe ?

- Proksimume tiom kiom ni sentas nin inklinaj por ruligi nin surgrunde kaj lasi homojn sterniĝi sur ni, aŭ por kuri inter homoj kun tranĉilegoj. Mi neniam aŭdis tiajn sensencaĵojn. Iu elstaraĵo de monto, iu bone ekvilibrigita ŝarĝo, iu rajdanto al kiu ni povas fidi por lasi vin meti la piedojn laŭ via plaĉo, kaj mi estas via mulo; sed... la aliaj aferoj... ne ! diris Vilĉjo stamfante.

- Evidente, diris la trupoĉevalo, ne ĉiuj estas faritaj el la sama ligno, kaj mi bone vidas ke en la familio, flanke de via patro, oni devis esti malrapidaj por kompreni multajn aferojn.

- Ne zorgu pri la familio de mia patro, ekkriis Vilĉjo kolere; ĉar ĉiuj muloj malŝatas aŭdi rememorigi al si ke ilia patro estis azeno. Mia patro estis ĝentlemano el la sudo, kiu ne ĝenintus sin por dispecigi iun ajn ĉevalon. Ne forgesu tion, vi, dika **Brumbajo** !

Brumbajo volas diri sovaĝan ĉevalon sen origino. Imagu la sentojn de **Ormondo** se ĉevalo de omnibuso insulte nomis lin ĉevalaĉon, kaj vi povas imagi tion kion resentis la aŭstralia ĉevalo. Mi vidis la blankaĵon de liaj okuloj ardi en la mallumo.

- Diru do, filo de virazeno importita el Malago, li eligis kunpremante la dentojn, mi sciigos al vi ke mi parenciĝas, flanke de mia patrino, kun **Karabeno**, la venkinto de la Pokalo de Melburno, kaj ni ne kutimas, en mia lando, lasi nin surtreti per mulo kun lango de papago kaj kapo de porko en baterio da petardistoj kaj pizĵetistoj. Ĉu vi estas preta ?

- Staranta sur la malantaŭaj kruroj ! kriaĉis Vilĉjo.

Ili ambaŭ vidalvide baŭmis, kaj mi antaŭvidis furiozan batalon, kiam gluglanta voĉo kaj kiu obtuze vibris, eliris dekstre el la mallumo.

- Infanoj, kion vi havas por batali ? Trankviliĝu.

La du bestoj refalis, nazbruantaj pro naŭzo, ĉar nek ĉevalo nek mulo povas elteni la voĉon de elefanto.

- Estas Duobla Vosto ! diris la trupĉevalo. Mi ne povas elteni lin. Iu vosto ĉe ĉiu fino, estas tro.

- Ekzakte mia opinio, diris Vilĉjo premante sin kontraŭ la ĉevalon por trankviligi sin. Ni havas komunajn punktojn.

- Mi supozas ke ni heredis tiujn punktojn de niaj patrinoj, diris la trupĉevalo. Pri tio ne indas kvereli... He ! Duobla Vosto, ĉu vi estas ligita ?

- Jes, diris Duobla Vosto kies rido ruliĝis laŭ sia tuta rostro... Mi estas ĉe la paliseto por la nokto. Mi aŭdis tion kion vi diris. Sed ne timu, mi restas tie kie mi estas.

La bovoj kaj la kamelo duonlaŭte diris :

- Timi Duoblaⁿ Vostoⁿ... kia sensencaĵo !

Kaj la bovoj daŭrigis :

- Ni bedaŭras ke vi aŭdis, sed estas vere. Duobla Vosto, kial vi timas kanonojn kiam ili parolas ?

- Nu, diris Duobla Vosto frotante unu el siaj malantaŭaj kruroj kontraŭ la alia, ekzakte kiel knabeto kiu recitas fablon, mi ne tute scias ĉu vi komprenus.

- Ni ne komprenas, sed tamen necesas ĝisfine tiri la kanonojn, diris la bovoj.

- Mi scias tion, kaj mi ankaŭ scias ke vi estas multe pli bravaj ol vi pensas tion. Sed, pri mi, estas malsama. La kapitano de mia baterio la alian tagon nomis min "Paĥiderman Anakronismon".

- Estas alia maniero batali, mi supozas, diris Vilĉjo, kiu reakiris siajn spiritojn.

- Vi, vi ne scias tion kion tio volas diri, kompreneble. Mi, mi scias tion. Tio signifas : inter bona kaj malbona, kaj

estas ĝuste tie kie mi estas. Mi kapablas vidi en mia kapo tion kio okazos kiam obuso eksplodas; kaj vi, bovoj, vi ne kapablas.

- Mi kapablas, diris la trupĉevalo... almenaŭ iom. Mi provas ne pensi pri tio.

- Mi vidas pli bone ol vi, kaj mi pensas pri tio... mi havas pli granda surfaco ol iu ajn por antaŭgardi, kaj mi scias ke, kiam mi malsanas, neniu scias la rimedo por kuraci min. Ĉio kio ili povas fari, estas interrompi la soldon de mia mahuto ĝis kiam mi resaniĝu, kaj mi ne povas fidi al mia mahuto.

- Ha ! diris la trupĉevalo. Tio klarigas ĉion. Mi povas fidi al Rikĉjo.

- Vi povus meti tutan regimenton de Rikĉjo^j sur mian dorson, sen ke mi konduku pli bone. Mi scias ĝuste sufiĉe por senti min malkomfortan, kaj ne sufiĉas por malgraŭ ĉio antaŭeniri.

- Ni ne komprenas, diris la bovoj.

- Mi scias ke vi ne komprenas. Ne estas al vi ke mi parolas. Vi ne scias tion kio estas la sango.

- Jes, ni scias tion, rebatis la bovoj. Estas ruĝa materio kiu sorbigas la teron kaj kiu odoras.

La trupĉevalo donis kalcitron, faris salton kaj nazbruis.

- Ne parolu pri tio, li diris. Mi sentas tion de ĉi tie, nur pensante pri tio. Tio dezirigas min forkuri... kiam mi ne havas Rikĉjoⁿ sur la dorson.

- Sed ne estas tio ĉi tie, diris la kamelo kaj la bovoj. Kial vi estas tiel stulta ?

- Tio estas malbona afero, diris Vilĉjo. Mi ne emas forkuri, sed mi ne ŝatas paroli pri tio.

- Vi komprenas ! diris Duobla Vosto swingante sian voston por klarigi.

- Certe. Jes, ni estis ĉi tie dum la tuta nokto, diris la bovoj.

Duobla Vosto frapis la grundon per la piedo, tintigante

sian ferrington.

- Ho, mi ne parolas kun vi ja. Vi ne kapablas vidi internen de viaj kapoj.

- Ne. Ni vidas per niaj kvar okuloj, diris la bovoj. Ni vidas rekte antaŭ ni.

- Se mi kapablus nur pri tio kaj nenio alia, vi ne bezonus tiri la dikajn kanonojn. Se mi estus kiel mia kapitano... li povas vidi aferojn ene de sia kapo antaŭ ol la pafado ekas, kaj li tremas de supre malsupren, sed li tro scias por fuĝi... se mi estus kiel li, mi povus tiri la kanonojn anstataŭ vi. Sed se mi estus tiel klera kiel ĉio ĉi, mi neniam venintus ĉi tie. Mi estus reĝo en la arbarego, kiel mi kutimis esti, dormante dum la duono de la tago kaj banante kiam tio plaĉis al mi. Mi ne recevis bonan banon ekde monato.

- Ĉio ĉi estas tre bela, diris Vilĉjo, sed ne sufiĉas doni al iu afero nomon kiu ne finiĝas, por ŝanĝi ion ajn al ĝi.

- Ŝŝ! diris la trupĉevalo. Mi kredas ke mi komprenas tion kion Duobla Vosto volas diri.

- Vi komprenos pli bone post unu minuto, kolere diris Duobla Vosto. Nun klarigu al mi kial vi ne ŝatas ĉi tion!

Li komencis furioze trumpeti per sia tuta forto.

- Ĉesu! diris kune Vilĉjo kaj la trupĉevalo.

Kaj mi povis aŭdi ilin stamfi kaj tremi. La trumpetado de elefanto ĉiam estas malagrabla, ĉefe en malluma nokto.

- Mi ne haltos, diris Duobla Vosto. Ĉu vi ne klarigos tion al mi, bonvolu? Hhrrmf! Rrrt! Rrrmf! Rrrhha!

Poste li subite ĉesis, kaj mi aŭdis en la mallumo etan plendon kiu informis min ke Vikseno finfine retrovis min. Ĝi sciis tiel bone kiel mi, ke la afero en la mondo kiun elefanto plej multe timas, estas hundeto kiu bojas; tial ĝi haltis por persekuti Duoblaⁿ Vostoⁿ en siaj palisetoj, kaj bojis ĉirkaŭ liaj dikaj piedoj. Duobla Vosto turniĝadis, kaj kriis:

- Foriru, hundeto! Ne flaru miajn maleolojn, aŭ mi piedbatos vin. Bona hundeto... afabla hundeto... Nu! Nu!

Reiru hejmen, malbela bojanta besteto !... Ho, kial neniu forprenas ĝin ? Ĝi tuj mordos min en minuto.

- Ŝajnas, diras Vilĉjo al trupĉevalo, ke nia amiko Duobla Vorto timas preskaŭ ĉion. Ĉe la nuna horo, se oni donus al mi plenan porcion po ĉiu hundo kiun mi piedbatis sur la manovrkampo, mi estus preskaŭ tiel dika kiel Duobla Vosto.

Mi fajfis, kaj Vikseno kuris al mi, tute kotkovrita, lekis al mi la nazon, kaj rakontis al mi longan rakonton pri siaj serĉadoj por trovi min tra la tendaro. Mi neniam sciigis al ĝi ke mi komprenis la lingvon de bestoj, ĉar ĝi prenintus ĉiajn liberecojn. Tial mi butonis sur ĝi la antaŭaĵon de mia surtuto, dum Duobla Vosto turniĝadis, tretis la grundon, kaj grumblis en si mem :

- Estas eksterordinare ! Tute eksterordinare ! Estas domaĝo kiu daŭras en nia familio... Nun, kien foriris ĉi tiu malbona besteto ?

Mi aŭdis lin palpi ĉirkaŭ li per sia rostro.

- Mi kredas ke ni ĉiuj havas niajn mankojn, ĉiu siajn, li daŭrigis nazpuriĝante.

- Antaŭ momento, vi mem, sinjoroj, ŝajnis terurigitaj, mi kredas, kiam mi trumpetis.

- Ne vere terurigitaj, diris la trupĉevalo, sed tio faris al mi kvazaŭ mi havis krabrojn anstataŭ mia selo. Ne rekomencu.

- Mi timas hundeton, kaj la kamelo kiu estas ĉi tie, timas malbonajn songojn en la nokto.

- Estas tre feliĉe al ni ke ni ne devas ĉiuj sammaniere batali, diris la trupĉevalo.

- Tio kion mi ŝatus scii, diris la juna mulo, kiu delonge silentis, tio kion mi volus scii, estas kial ni devas batali.

- Ĉar oni diras tion al ni, eligis la trupĉevalo kun malestima nazbruo.

- Ordonoj, diris Vilĉjo la mulo.

Kaj liaj dentoj klakis.

- Hukm hai⁽³³⁾ ! diris la kamelo kun gluglado.

Kaj Duobla Vosto kaj la bovoj ripetis :

- Hukm hai !

- Jes, sed kiu donas la ordonojn ? demandis la rekruta mulo.

- La viro kiu paŝas ĉe via kapo.

- Aŭ sidas sur via dorso.

- Aŭ tenas la ŝnuron de via nazo.

- Aŭ tordas al vi la voston, diris Vilĉjo, la trupĉevalo, la kamelo kaj la bovoj, unu post la alia.

- Sed, kiu donas al ili ordonojn ?

- Jen vi volas tro multe scii, junulo, diris Vilĉjo, kaj estas la bona maniero altiri al vi piedbaton. Ĉio kiun vi devas fari, estas obei al la viro kiu estas ĉe via kapo kaj sen meti demandon.

- Li pravas, diris Duobla Vosto. Mi ne kapablas ĉiam obei, ĉar mi estas inter bona kaj malbona; sed Vilĉjo pravas. Obeu al la homo apud vi kiu donas ordonon, aŭ vi haltigos la tutan baterion kaj estos plie bastonita.

La bovoj de baterio sin levis por foriri.

- Mateniĝas, ili diris. Ni estas reirontaj al niaj linioj. Estas vere ke ni vidas nur antaŭ niaj okuloj, kaj ke ni ne estas tre lertaj; sed ni tamen estas la solaj ĉi-vespere, kiuj ne timis. Bonan vesperon, kuraĝuloj.

Neniu respondis kaj la trupĉevalo petis ŝanĝi la interparoladon :

- Kie estas ĉi tiu hundeto ? Hundo ie signifas ke homo estas.

- Mi estas ĉi tie, jepis Vikseno, sub la kulaso de la kanono kun mia viro. Estas vi, dika besto, dika ventkapa kamelo, tien, estas vi kiu faligis nian tendon. Mia homo estas tre kolerigita.

- Pa ! diris la bovoj. Li devas esti blanka ?

- Kompreneble, li estas tia, diris Vikseno; ĉu vi kredas ke estas nigra bovisto kiu zorgas pri mi ?

- Huah ! Ŭaĉ ! Ugh ! diris la bovoj. Ni hastege foriru.

Ili enprofundiĝis en la koton, kaj faris tiel bone ke ili traigis sian jugon en la timonon de municikesto, kie ĝi restis fiksita.

- Nun estas, diris trankvile Vilĉjo; ne baraktu. Jen vi en paneo ĝis la tago... Kio diable okazas al vi ?

La bovoj aŭdigis la longajn siblajn ronkojn, kutimajn al hindaj brutoj, interpuŝiĝis, albatigis, turniĝadis, piedfrapis, glitis kaj fine preskaŭ falis en la koton, grumblante pro furiozo.

- Vi baldaŭ rompos vian kolon post momento, diris la trupĉevalo. Kio okazas al vi, kiam oni parolas pri blankulo ? Mi vivas kun ili.

- Ili... nin... manĝas ! Tiru ! diris la bovo kiu estis plej proksima.

La jugo klakis kun seka bruo, kaj ili peze malaperis.

Mi ne sciis antaŭe tion kio terurigis la hindan brutaron vidante la angloj : Ni manĝas bovaĵon !... viandon al kiu neniam tuŝas kondukanto de brutaro, kaj nature la brutaro ne ŝatas tion.

- Ke oni skurĝu min per miaj ĉenoj de ŝarĝoselo, se mi pensintus ke du dikaj blokoj kiel tio povus perdi la kapon ? diris Vilĉjo.

- Ne gravas, mi tuj iros vidi ĉi tiun viron. La plejmulto el blankuloj, mi scias tion, havas aferojn en siaj poŝoj, diris la trupĉevalo.

- Mi do forlasas vin. Mi ne povas diri ke mi amas ilin pli ol tio. Cetere, la blankuloj kiuj ne havas lokon por dormi plejofte estas ŝtelistoj, kaj mi havas sur la dorso multe da proprietaĵon de la registaro. Venu, junulo, kaj ni reiru al niaj linioj. Bonan nokton, Aŭstralio. Ni vidos vin morgaŭ en la

parado, mi supozas ? Bonan nokton, malnova fojnpakego !... Provu meti bridon al viaj sentoj, ĉu ne ? Bonan nokton, Duobla Vosto ! Se vi morgaŭ preterpasos nin sur la tereno, ne trumpetu. Tio perturbas la vicigon.

Vilĉjo la mulo foriris paŝetante per sia samtempe lama kaj milita paŝado de malnova soldato; la kapo de la trupĉevalo venis priserĉi en mian bruston, kaj mi donis al li biskvitojn, dum Vikseno, kiu estas la plej vanta el la hundinoj, fabelis al li mensogojn pri dudekoj da ĉevaloj kiujn ŝi kaj mi posedis.

- Mi morgaŭ iros al la parado en mia kariolo, ŝi diris. Kie vi estos ?

- Maldekstre de la dua skadro. Estos mi kiu reguligos la paŝadon por mia tuta trupo, mia sinjorineto, li ĝentile diris. Nun necesas al mi reiri apud Rikĉjoⁿ. Mia vosto estas tute kota, kaj li bezonos du horojn de laborego por strigli min antaŭ la parado.

La granda revuo de ĉiuj tridek mil viroj posttagmeze okazis, kaj Vikseno kaj mi, ni okupis bonan lokon, tute apud la vicreĝo kaj la emiro de Afganio. Ĉi-tiu, kapvestita de alta kaj dika ĉapo el nigra astrakano, surhavis meze grandan stelon el diamantoj. La unua parto de la revuo estis splenda, kaj la regimentoj defilis, ondo post ondo da ĉiuj kune moviĝantaj kruroj kaj da fusiloj ĉiuj en linio, ĝis malklarigi niajn okulojn. Poste la kavalerio alvenis kun la sono de la grandioza galopo de Boni Dundee⁽³⁴⁾, kaj Vikseno starigis la orelojn en la loko kie ŝi estis sidinta en la kariolo. La dua skadro de la Lancistoj pasis antaŭ ni, kaj la trupĉevalo aperis, kun vosto kiel ŝpinita silko, faranta riverencojn, kun iu orelo rekta kaj la alia kuŝanta, reguliganta la kadencon por sia tuta skadro. Kaj liaj kruroj marŝis kiel laŭ valso-takto. Poste venis la dikaj kanonoj, kaj mi vidis Duoblaⁿ Vostoⁿ kaj du aliajn elefantojn fronte jungitajn al sieĝkanono de

34 Malnova ario de kungrupigo de la Stuart-partizanoj en la epoko de Kromvelo. Ĝi ĝenerale kadencas la galopajn paradojn de la angla kavalerio.

kvardek, dum dudek jungitaroj de bovoj marŝis malantaŭe. La sepa paro havis novan jugon, kaj ŝajnis sufiĉe rigida kaj laca. Fine alvenis la ŝtraŭbaj kanonoj : Vilĉjo, la mulo, kondukis kvazaŭ li komandis ĉiujn trupojn, kaj lia jungilaro estis oleita kaj polurita, ĝis palpebrumigi la okulojn. Mi aplaŭdas, tute sola, Vilĉjoⁿ, la mulon, sed li neniapreze rigardintus dekstren aŭ maldekstren.

La pluvo denove falis, kaj dum kelka tempo estis tro da nebuleto por vidi tion kion la trupoj faris. Ili estis formintaj grandan duoncirklon tra la ebenaĵo, kaj disvolviĝis laŭ linio. Ĉi tiu linio plilongiĝis, plilongiĝis kaj plilongiĝis ĝis kiam ĝi atingis tri kvaronojn de mejlo (+/-1200m) de iu alo al alia - solida muro da viroj, ĉevaloj kaj pafiloj. Poste tio marŝis rekte al vicreĝo kaj emiro, kaj laŭmezure kiel tio alproksimiĝis, la grundo komencis tremi, kiel la ferdeko de vaporŝipo kiam la maŝinoj superigas la premon.

Krom ĉeesti tie, vi ne kapabas imagi kian timigan efikon ĉi tiu amasa alveno de trupoj estigas al spektantoj, eĉ kiam ili scias ke tio estas nur revuo. Mi rigardis la emiron. Ĝis tiam li ne eksterigis ombbron de signon de miro aŭ ion ajn; sed tiam liaj okuloj komencis pli kaj pli malfermiĝi, li kunigis la kondukilojn de sia ĉevalo kaj rigardis malantaŭ si. Dum momento, li ŝajnis esti elingigonta sian sabron kaj boronta al si vojon tra la Angloj, viroj kaj virinoj, kiuj troviĝis en la veturiloj malantaŭe.

Finfine la antaŭenpaŝado subite finiĝis, la grundo ĉesis tremi, la tute kompleta linio kliniĝis, kaj tridek muzikaĵoj samtempe ekludi. Estis la fino de la revuo, kaj la regimentoj reiris al siaj tendaroj sub pluvo, dum infanteria muziko komencis ludi :

La bestoj iris duope, hura !

La bestoj iris duope,

La elefanto kaj la mulo de Baterio,

Kaj ili ĉiuj eniris en la Arkeon

Por ŝirmi sin de la pluvo !

Mi tiam aŭdis maljunan estron de Centrazio, kun longa griza hararo, kiu venis kun la emiro, meti demandojn al indiĝena oficiro.

- Nun, li diris, kiel oni atingis ĉi tiun mirindaĵon ?

La oficiro respondis :

- Ordono estis donita, al kiu ni obeis.

- Sed ĉu la bestoj estas do tiel inteligentaj kiel homoj ? demandis la estro.

- Ili obeas, kiel faras la homoj : mulo, ĉevalo, elefanto, aŭ bovo, obeas al sia kondukanto, la kondukanto al sia serĝento, la serĝento al sia leŭtenanto, la leŭtenanto al sia kapitano, la kapitano al sia majoro, la majoro al sia kolonelo, la kolonelo al la brigadisto komandanta tri regimentojn, la brigadisto al la generalo, kiu obeas al la vicreĝo, kiu estas la servisto de la Imperiestrino. Jen kiel tio realiĝas.

- Mi ja dezirus ke estu same en Afganio ! diris la estro; ĉar tie ni obeas nur al nia propra volo.

- Kaj estas pro tio, diris la indiĝena oficiro frizante siajn lipharojn, ke via emiro al kiu vi ne obeas, devas veni ĉi tien por ricevi la ordonojn de nia vicreĝo.

* * *

Elefantoj de baterio.

Aleksandro prunteprenis de ni la forton de Alcido,
La saĝecon de niaj fruntoj, la lertecon de niaj genuoj,
De tiam, sur la submetitaj kortumoj ankoraŭ pezas lia solida jugo.
Al dekfutaj jungilaroj cedu lokon, ĉiuj,
Al procesio de dikaj sieĝpecoj !

Bovoj de baterio.

Ĉi tiuj jungitaj herooj timas kuglegon de kvar,
La pulvoro ĝenas ilin, ili ne plu ŝatas batali,
Tiam, ni aperas en la ludo, ni hastas, ni ĉiuj, bovoj,
Al dudekjugaj jungilaroj cedu lokon, ĉiuj,
Al procesio de dikaj sieĝpecoj !

Ĉevaloj de kavalerio.

Per mia marko ĉe la ŝultro, ne estas kantoj
Kiu valoras la arion de Lancistoj, Husaroj kaj Dragonoj,
Pli bone plaĉas al mi ol "Striglado" aŭ "En la stalo"
La galopo por defili de *Boni Dundeo* !

Fojno, respekto, strigado kaj mordaĵo,
Bonaj rajdantoj kaj spaco eksteren,
Laŭ skadroj ! Laŭ kolumno ! Kaj mi vetas
Ke oni bone vidas vin defili ĉe *Boni Dundeo*.

Ŝarĝomuloj.

Kiam miaj kunuloj kaj mi prenas, laŭlonge de la dekliva vojo,
Perditan padon el malkavaj ŝtonoj, ni paŝas sen manki,
Ĉar ni kapablas rapidi kaj grimpi, miaj knaboj,
Ĉie ajn, aperi kaj diri : Jen !
Sed kiam ĉe la supro ni nin flanke lokas,
La kompleta feliĉo estus se ni havus unu anstataŭan kruron aŭ du !

Do dankon, serĝento, kiu antaŭe iras kiam la vojo ne estas larĝa,
Kaj ve al vi, damnita kondukanto, kiu ne rekte alligas vian ŝarĝon :
Ĉar ni kapablas rapidi kaj grimpi, miaj knaboj,
Ĉie ajn, aperi kaj diri : Jen !
Sed kiam ĉe la supro ni nin flanke lokas,
La kompleta feliĉo estus se ni havus unu anstataŭan kruron aŭ du !

Kameloj de la komisarejo.
Ni neniam havis malnovan kamelan rekantaĵon
Por helpi treni nian lampaŝadon,
Sed ĉiu el niaj koloj estas trombono el haŭto
(Rtt-ta-ta-ta ! Ĉiu estas trombono el haŭto !)
Nia sola paŝada kanto, aŭskultu ĝin :
Ne povas ! Ne volas ! Ne iros ! Nenion scii !
Ke ni transdonu ĝin kaj iru vidi !

Iu ŝarĝo turniĝas, domaĝe, se ĝi ne estas la mia !
Iu ŝarĝo glitis - haltu, hura ! Ni bone kriui !
Urr ! Iarrh ! Grr ! Arrh ! Iu ricevas kaj ne por nenio !

Ĉiuj bestoj kune.
Ni estas la Infanoj de la Tendaro,
Ni servas, ĉiu siarange,
Filo de jugo, de ŝarĝoselo, de portaĵo,
Jungilaro sur flanko, aŭ sako sur dorso.
Vidu nian ondoforman linion,
Tiel kiel duoblan piedligilon,
Kiu tra la ebenaĵo iras, glitanta,
Balai ĉion en la kampo de la sango;
Dum ĉe niaj flankoj, la viroj,
Polvaj, mutaj kaj kun okuloj pezaj,
Ne scias kial ni estas,
Ili kaj ni, kondamnitaj sen reveno
Por suferi kaj ĉiam paŝadi.
Ni servas, ĉiu siarange,
Filo de jugo, de ŝarĝoselo, de portaĵo,
Jungilaro sur flanko, aŭ sako sur dorso !

PARADKANTO DE LA BESTOJ DE LA TENDARO.

* * *